

NED KATRYN

RAPORTO
PRI LA
OKA KONGRESO
DE
ESPERANTISTOJ

(Krakovo 1912)

Eltirita el *Lingvo Internacia*



PARIS

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

33, RUE LACÉPÈDE, 33

1912

LA OKA KONGRESO

Postkongresaj pripensoj.

La solan instrukcion, kiun, kiel ĉefredaktoro, mi donis al nia Kongresa raportonto estis:

«Skribu libere, senpartie, laŭkonscience, *gajan, amuzan* raporton!»

Kiamaniere,—sprita filozofo, kiu ridetas kaj ŝercas,—li sukcesis, tion konstatos kun plezuro kaj danko niaj legantoj. Pli longa, ol la antaŭaj, estas tiu ĉi raporto, kiu preskaŭ plenigas trioblan kajeron, sed tro longa trovos ĝin neniue.

Bona estis la Kongreso.

Oficiale ĝi decidis, ke ĝi nenion decidis, kaj el ĉiuj eblaj decidoj tiu ĉi vere estis la plej saĝa.

Ĝi prokrastis la demandon pri centra internacia organizaĵo, kaj pro tio, oni devas ĝin ankaŭ gratuli. Ni esperas, ke por la sukceso, por la ĝojo de niaj estontaj Kongresoj, por la bono de Esperanto oni daŭrigos same agi.

Kiel tute prave skribis H. Hodler en la gazeto «*Esperanto*», niaj Kongresoj devas esti antaŭ ĉio festoj, propagandaj festoj, en kiuj oni devas serĉi sole tion, kio nin unuigas kaj zorgi eviti tion, kio antaŭ la publiko nin disigas kaj semas en niajn vicojn la malkonfidon kaj la malfidon.

Ĉar Esperanto estas *oficiale* nur lingvo, paroli je la nomo de Esperanto rajtas nur la L. K. kaj ĝia Akademio, kies rolo estas la konservado de la lingvo de l' Fundamento.

Tute stranga, ne verŝajna, estas la supozo, ke ian tagon ia registaro, antaŭ ol akcepti Esperanton, postulus kelkajn ŝanĝojn, kiel ekz. la forigon de l' akuzativo aŭ la anstataŭigon de nia multnombra finiĝo *j* per *i*, *n* aŭ *x*, sed, eĉ tiam, neniuj tutmonda esperantista reprezentantaro, se ĝi estus ebla (kaj efektive ĝi estas nepre neebla), havus la rajton diskuti pri tiuj ĉi lingvaj punktoj, kiujn oni devus resendi al la L. K., regule reprezentata de la Akademio.

Sekve tiu ĉi argumento por pravigi la starigon de ia oficiala reprezentantaro de l' Esperantistoj estas senvalora.

Pli firmaj ne estas la aliaj argumentoj, nelingvaj.

Ju pli ni iros antaŭen, des pli ni konstatos, ke inter ni Esperantistoj *nur* la lingvo estas komuna, sekve nur ĝi vere *oficialaĵo*. Pri ĉiuj aliaj aferoj: pacemo aŭ militemo, patriotismo aŭ internaciismo, socialismo aŭ konservativismo, liberpensado aŭ religio, kaj, en nia propra organizaĵo, demokratismo aŭ aŭtoritatismo, «centrismo» aŭ kunfederiĝo, apartenado al ia aktiva esperantista societo aŭ ne,—plej diversaj estas la opinioj, kaj neniuj homo aŭ komitato havas la rajton, *je la nomo de l' Esperantistaro*, aprobi aŭ malaprobi unu aŭ alian el tiuj vidmanieroj, nek elĵeti el nia Esperantistaro tiujn, kiuj ne same opinias kiel ili pri ĉio tio ĉi.

Ni ne bedaŭru tiujn nunajn vivkondiĉojn. Post la dudekkvinjara heroo periodo alvenas nova pli praktika, dum kiu nia tasko estas enpenetri,—precipe per persona, ne esperantista influo,—en ĉiujn rondojn, por ilin almiliti. La lingvon ni devas prezenti

nur kiel lingvon, ĉar per si mem ĝi estas nenio alia. Sed ni ne timu: ĝi senrimarke kunportos kun si internan ideon, kaj ĝia venko ne estos nur lingva!

Sed ĉu tiuj, kiuj deziras ian oficialan reprezentantaron, sin demandis, kiu estus la situacio de tia oficiala *nelingva* Reprezentantaro, se ia registaro postulus de ĝi,—kaj tio ne estas vana supozo,—ke ĝi rifuzu oficiale, t. e. je la nomo de l' Esperantistaro, ĉiun solidarecon kun la agado de aliaj, eble alilandaj Esperantistoj? Kion do ĝi respondus por sin senkulpigi? Ke alian ligilon, ol la lingvon ni ne havas inter ni, ke *Esperanto estas nur lingvo*!

Nu! ĉu tian nelingvan reprezentantaron ni sekve bezonas? Utila ĝi povus esti al kelkaj, kiujn ĝi «*eminentuligus*», sed certe ne al Esperanto mem.

Oni do, laŭ la ekzemplo de la Oka kaj por nia estonta paco, ne plu parolu pri tio, kaj definitiva fariĝu la *sine die*'a Krakova prokrastiĝo.

Sed eble oni demandas: kiamaniere vivos do niaj Oficialaj Institucioj?

Pri la nelingvaj mi preferus ne paroli. Vole, nevole ili restos ĉiam *fakte* privataj institucioj, ĉar nur arta estas ilia oficialeco. Vivrimedojn ili facile trovos, kiam ili konsentos, lasante flanke ĉiun lingvan demandon, ne plu paroli je la nomo de la tutmonda Esperantistaro kaj simple alportos sian memvolan, sindonan helpon al la propagando de nia Esperanto. Liberaj institucioj, ili renkontos, kiel la U.E.A., nenium malamikon inter ni, sed male apogon *laŭ iliaj servoj*.

La lingvaj institucioj ne bezonas la «monan» helpon de l' Esperantistaro. Multaj estas la gazetoj, kiuj volonte pagos difinitan sumon por ricevi la oficialajn komunikaĵojn de l' Akademio kaj multaj la eldonistoj, kiuj volonte aĉetos la privilegion eldoni la akademiajn librojn.

Cetere por la sukceso mem de nia lingvo, dezirinde estas, ke tiuj ĉi lastaj restu maloftaj kaj malmultaj. Neniu eraro estus pli grava, ol la opinio, ke la Akademio, laborante rapide, devas *direkti* la lingvon. Modesta, senbrua, ne elvokante lingvajn diskutojn, estas ĝia plej racia labormetodo. Ĝi ne havas kaŭzon por timi antaŭ la riproĉoj de tiuj, kiuj plendas, ke ĝi nenion faras, pro tio ke ĝi ne alportas ĉiujare novajn vortojn, novajn regulojn kaj eble reformojn.... Ĝi ne altiras sur sin la atenton kaj apenaŭ oni konas ĝian ekziston kaj la nomojn de la Akademianoj!—Des pli bone.—Tio pruvas, ne ke ĝi estas mallaborema, sed ke ĝi komprenas, ke ĉiu vana «lingvistika» agitado povas esti nur malutila, ke grava estas ĝia morala respondeco kaj ke—ĉar Esperanto estas vivanta, por multaj *natura* lingvo—neniun paŝon la Lingva

Komitato devas fari antaŭen tian, ke ĝi poste devus returnen iri. Ne per teoriaj diskutoj, sed per uzo, kvazaŭ instinkta, oni vivigas lingvon.

La tre saĝan raporton de Rektoro Boirac aprobis en Krakovo la L. K. kaj tute prave.

Kaj nun ni ĝoje, sentime, daŭrigu nian propagandon por Esperantismo, per *Esperanto nur lingvo!*

TH. CART.

LA OKA KONGRESO DE ESPERANTO

(Krakovo, 11–18. de Aŭgusto 1912)

Rido estas pli bona, ol ploro.

SOKRATO.

En la antaŭparolo de sia bela libro, «Kiel mi retrovis Livingstone», Stanley rakontas, kiamaniere estis komisiita al li tiu malfacila tasko. Li estis subite vokita al Parizo per telegramo de la Direktoro de «New-York Herald», gazeto, kies *reportero* li estis. Kiam li alvenis en la hotelon, kie loĝis S-ro Gordon Bennett (la dirita direktoro), li trovis ĉi tiun potencon sinjoron ankoraŭ en la lito, kaj tuj okazis la jena interparolo:

—Ĉu vi, Stanley?—Jes, Sinjoro.—Vi scias, ke de kvar jaroj oni ne havas sciigojn pri Livingstone.—Jes, Sinjoro.—Ĉu li mortis aŭ ankoraŭ vivas?—Mi ne scias, Sinjoro.—Vi tuj foriru al Centra Afriko kaj retrovu Livingstone vivan aŭ malvivon.—Bone, Sinjoro!—Jen ĉeko.—Dankon, Sinjoro.—Bonan vojaĝon; ĝis la revido!—Ĝis la revido, Sinjoro!

Kaj Gordon Bennett denove ekdormis.

Tute simila afero okazis dum la unua semajno de Aŭgusto en la domo de la strato Lacépède, centra sidejo de ĉi tiu centra gazeto. Mi estis en la speciala salonego de la redaktoroj, ripozante post laciga laboro. (Mi redaktas la unuan paĝon de l' kovrilo de L. I.). Sidante en remburita seĝego, mi fumis tre longan cigaron kun ringo el orumita papero, kaj nenion pripensante mi rigardis la dube-bluan fumon, kiu supreniris spirale al la plafono. Antaŭ mi, sur tablo, staris grandampleksa glaso kaj multe da boteloj enhavantaj ruĝajn, verdajn, bluajn likvorojn. En mia glaso estis science farita miksaĵo de diversaj alkoholaĵoj, kiun mi trinkis de tempo al tempo per pajlotubeto. (Sed tion ne diru, ĉar mi estas sekretario de sobreca societo). Kun plezuro mi pensis pri la longa

monato de mallaboremo kuŝanta antaŭ mi. (La gazeto ne eliras en Aŭgusto). Ĉirkaŭ mi oni aŭdis la ĉiuspecajn bruojn de laboranta gazetejo. Senĉesa sonorado de telefono (L. I. havas specialan fadenon kun ĉiu ĉefurbo de Esperantujo), pordoj fermataj kaj malfermataj, muziko de la liftoj, kiuj ĉiame alteniĝas kaj malalteniĝas inter la teretaĝo kaj la kvin etaĝoj^[1] de nia granda abelujo, ronkado de la aŭtomobiloj ĉiam pretaj por la foriro en nia vasta korto. Kaj ĉi tiuj multaj bruoj unuiĝis, kunfandiĝis por liveri al la orelo impreson de senĉesa murmurado simila al bruo aŭdata, kiam oni ŝtopas la orelon per mara konko. Ĉi tiu bruo (kaj eble ankaŭ la alkoholaĵoj) igis min unue revema, poste dormema kaj la konscio pri ekstera mondo estis iom post iom neniiganta, kiam subite voĉo min vekis. Antaŭ mi staris malalta viro, senhara, kun blankaj vangharoj, verde vestita, kun arĝentaj galonoj sur ĉiuj kudraĵoj kaj ŝtala ĉeno ĉirkaŭ la kolo. Li estis la propra pedelo de la ĉefredaktoro, terura drako, kiu gardas la pordon de l' sanktejo.

Li faris profundan saluton kaj diris:

—«Lia ĉefredaktora Moŝto petas sinjoron redaktoron, ke li tuj venu en lian skribejon.»

Mi pene leviĝis, tre malkvieta. Plej ofte, kiam lia Moŝto venigas mian malmoŝton, ne estas por min gratuli. Kaj sekvante malrapide la gravmienan pedelon, mi serĉis en la memoro, je kio mi povas esti kulpa. Ĉu mi skribis ion kontraŭfundamentan, ĉu mi uzis iun «Maŭpinaĵon»? Ĉu oni trovis en unu el miaj artikoloj la aĉajn vortojn *heziti*, *konkeri* aŭ *menso*? Cetere mi ne havis multe da tempo por pripensi la aferon. Terure rapida lifto min levas ĝis nivelo de la timinda ĉefredaktorejo. Momente mi staras en vestiblo; apud la muroj atendas sinjoroj kaj sinjorinoj sidantaj sur ledaj benketoj. Unuj junaj, aliaj maljunaj (ne la sinjorinoj); unuj longharaj, aliaj senharaj (ne la sinjorinoj); unuj palaj, aliaj ruĝaj (ne la sinjorinoj); sed ĉiuj, ĉiuj kun paperoj en la mano; ili estas gesinjoroj verkistoj, novelistoj, versistoj, dramistoj, humoristoj alportantaj siajn verkojn al la terura manĝegulo, kiu sidas malantaŭ la malbenita pordo.

Sed ĉi tiu pordo malfermiĝas; du paŝojn antaŭen, mi staras en la sanktejo. Kredeble ĉiuj legantoj jam konas la skribejon de nia ĉefredaktoro. Nur per kelkaj vortoj mi ĝin priskribas por la samideanoj malproksime loĝantaj (Groenlando aŭ Centra Afriko), kiuj tre malofte pasas tra la strato Lacépède.

Funde de l' ĉambro, sur muro, la Fundamento skribita per oraj literoj sur tabulo el marmoro; en anguloj, diversaj aparatoj: kribrilo por vortoj, filtrilo por stilo, pesilo por esprimoj; apud la pordo, kaptilo por Idistoj; fosiloj por fosi nian sulkon; grandega paperkorbego plenigita, ĝis rando, per manuskriptoj ankoraŭ ligitaj de siaj rubandoj (la nepresitajn manuskriptojn ni ne resendas^[2]). En mezo de la ĉambro granda

skribotablo kovrita de amaso da paperaĵoj (atestoj pri fideleco, k. t. p.), kaj ornamita de amikaj portretoj (D-ro Smulders kaj aliaj). Fine, malantaŭ la tablo, lia ĉefredaktora Moŝto mem, kiu min rigardas kun satana rideto sur la lipoj.

—Bonan tagon, li diras per tondra voĉo, kiu tintigas la vitraĵojn.

Mi salutas, murmuretante ion.

—S-ro Corret ankaŭ tiun ĉi jaron ne povos ĉeesti la kongreson.

(Kial li diras tion al mi!)

—S-ro Era ankaŭ ne estas libera.

(Timtremo komencas trakuri mian dorson.)

—Vi iros al la kongreso kaj faros raporton.

(Fulmotondro falanta antaŭ miajn piedojn ne farus al mi pli teruran impreson; mi lin rigardas kun okuloj similaj al radoj de veturilo, ne povante elparoli eĉ unu vorton.)

—Jen mia propra «kongresa Fundamento». Tion dirante, li prezentas al mi belan libron marokene binditan kun arĝentaj fermiloj.

Mi prenas la volumon, kaj tuj revenas mia voĉo.

—Sed, Sinjoro, Krakovo estas en sovaĝa lando.

—Vi havas la Fundamenton.

—Oni diras, ke lupoj kuras en la stratoj.

—Vi ŝirmos vin per la Fundamento.

—Kiam mi devos foriri?

—Tuj.

—Sed... mi ne pretigis mian valizon.

—Sufiĉas la Fundamento.

—Mi ne kisis mian edzinon. (Malvere, mi estas fraŭlo.)

—Kisu la Fundamenton.

—Mi...

—Sufiĉe... silentu... foriru!

Forta pugnobato akompanis tiujn ĉi vortojn. La atestoj pri fideleco saltis en la aeron; la portreto de D-ro Smulders falis teren.

Timegigita mi prenis per unu mano mian ĉapelon, per la dua la tenilon de l' pordo, kaj per la tria... mi forkuris.

En la vestiblo staris la kasisto, kiu plenigis miajn poŝojn per spesmiloj; en la koridoro sidis la ĝenerala sekretario, kiu metis en miajn brakojn dikan paperujon, skribilaron kaj blankan paperon nigrigotan (kompatinda papero!); en la halo kuŝis granda lakeo, kiu maldolĉe min puŝis en aŭtomobilon. Post dek minutoj mi estis en la Norda Stacidomo kaj saltis en kupeon, ĵus kiam la vagonaro ekmoviĝis.

Pene spiranta, duone freneza, malsatega, mi falis kiel sako da karbo sur la benketon, kaj por kvietigi mian plendantan stomakon, mi legis el la Fundamento tiujn ĉi nutrajn frazojn:

«Jen estas pomo.—La patro donis al mi dolĉan pomon.—Lakto estas pli nutra, ol vino.—Mi havas pli freŝan panon, ol vi.—Mi havas cent pomojn.—Trovinte pomon mi ĝin manĝis.—Mi trinkis teon kun kuko kaj konfitaĵo.—Mi manĝis bongustan ovaĵon.»

Jen kial, karaj legantoj, vi, tiun ĉi jaron, ne legos raporton tian, kian vi kutimis legi en L. I. Anstataŭ la precizaj kaj plenaj raportoj de D-ro Corret, anstataŭ la spritaj kaj artaj raportoj de S-ro Era, vi legos nur okazan raportaĉon de okaza raportintaĉo.

Anstataŭ promeni tra bela kamparo kun verdaj herbejoj kaj arbaretoj, vi faros tedan vojaĝon tra senarba stepo. Sed kiu estas kulpa pri tio? Ne mi. Oni ne elektas por fari kongresan raporton la redaktoron de la kovrilo.

(Ne rediru tiujn ĉi miajn vortojn al S-ro Cart, ĉar li povus koleri. Se vi estas diskreta, li tute ne scios, ĉar li neniam legas L. I.; li legas nur aliajn gazetojn.)

LA REVENO DE L' FILO

(Alegorio)

De ANTONI GRABOWSKI.

*Post foresto multejara Venas filo mia kara; El migrado ĉiulanda Venas filo mia,
granda!*

*En kabano mankis pano, Do elmigris li, infano; Nun revenas beljunulo Al
hejmlando, al Vistulo.*

*Kiel volus mi, patrino, Premi lin al mia sino^[3]; Doni volus mi festenon Por saluti la
revenon.*

*Ve! ne mastras mi kabanon Nek liberan havas manon; Mi, en mia propra
domo, Estas kvazaŭ fremda homo.*

*Ĉar al vi, fratin' pli aĝa, Post kamplimo hejmvilaĝa, Brilas, laŭ destino dia, Stel'
alia, pli radia...*

*Do akceptu lin, fratino, Per muziko kaj per vino! Li ne vidu ĉe l' festeno, Kiel
premas min ĉagreno.*

Tiu belega, kortuŝanta poemo de nia esperanta poeto Antoni Grabowski estas la vera prologo de la Oka Kongreso, de la Jubilea Kongreso.

Kia estis ĉi tiu Jubilea Kongreso okazanta post ĉiuj specaj diskutoj por aŭ kontraŭ centra organizaĵo, diskutoj, kiuj bedaŭrinde kelkafoje transiris la limon, kiu disigas la du landojn de kvieteco kaj akreco, de principeco kaj personeco. Mi devas tuj diri, ke ĝi estis la suno post la ventego, paco post iom da malpaco, nova frateco post negrava kolereto.

Ĝi estis tia, kia ĝi devis esti; festo, nur festo, dum kiu ĉiuj koroj unuiĝis por inde kaj ame glori nian Majstron kaj la dudekkvinan jaron de ekzistado de nia kara lingvo.

La Krakova Kongreso ne estis grandioza kongreso per la nombro de la ĉeestantoj, sed ĝi estis grandioza per la fervoro de ĉiuj kongresanoj, per ilia sindonemo al nia sankta afero. Ĝi estis grandioza per la pruvo donita de la Esperantistaro, ke, kiam la demando estas pri la sukceso de nia afero, ĉiu estas preta por oferi al ĝenerala intereso siajn proprajn dezirojn, siajn proprajn preferojn, siajn proprajn opiniojn.

Se oni volas ĝin karakterizi per unu vorto, oni povas diri, ke ĝi estis familia festo, intima festo kaj sekve ĝi estis ankaŭ la plej nacia el niaj internaciaj kongresoj. Kaj tio

donis al ĉi tiu familia kunveno ĉarmon, kiun ne posedis je tia grado niaj aliaj ĉiujaraj festoj.

Certe ĉiu el niaj internaciaj kongresoj havis kaj havos sian propran karakteron, elvenantan ne sole el la konsisto de la internacia kongresanaro, sed ankaŭ el la nacia ĉirkaŭo, el la nacia organiza komitato, el ĉiuj naciaĵoj, kiuj enŝoviĝas en la ĉiutagan vivon de l' kongreso.

Sed neniam kaj nenie ĉi tiuj influoj havis efekton tiel potencan kaj profundan, kiel en Krakovo. Kaj la kaŭzo de ĉi tiu speciala fenomeno estas facile trovebla.

Ĉi tie, en Polujo, ne estis okaza influo de iu ajn medio sur iun ajn estaĵon; inter la estaĵo kaj la medio ekzistis patrujaj rilatoj. Jam antaŭ dudek kvin jaroj naskiĝinta Esperanto spiris la polan aeron, kaj nun ankoraŭ la pola aero facile kaj nature enŝoviĝis en la pulmojn de la beljunulo revenanta hejmlanden.

Dum la tuta Kongreso ni vere baniĝis en pola intelekta atmosfero, atmosfero de ĝojo kaj de plezuro, sed en kiu aŭdiĝis intertempe mallaŭta bruo de senĉesa plendo kaj de kaŝita plorĝemo.

Tuj post elvagoniĝo oni ricevas bonan impreson pri la organizado de l' kongreso. Sur la perono agemaj komitatanoj atendas la alvenantajn kongresanojn. Ĉar la Akceptejo estas iom malproksima de la stacidomo, tial la enloĝiga sekcio havas propran oficejon en la stacidomo mem. Tien oni nin kondukas kaj tie ni ricevas plenajn informojn pri nia loĝejo, la ĉefa afero post longa kaj laciga vojaĝo. En kelkaj minutoj ni estas akceptitaj, enskribitaj, sciigitaj kaj senditaj, ĉu per tramo, ĉu per veturilo al nia kuŝejo. Cetere dum la tagoj de alveno la stacidoma oficejo funkcias tage kaj nokte kaj ni devas danki niajn polajn samideanojn, kiuj tiel sindoneme oferis siajn noktojn al Esperanto. Ĉar mi ne havas pakaĵon (mi havas nur la Fundamenton), kaj, ĉar mi ŝatas piede iri, se vi bonvolos, ni iros kune tra la urbo al la Akceptejo (vi ne estas laca, bone!)

Post kelkaj paŝoj ni ekvidas la «Plantaciojn», tiun ĉi verdan juvelon de Krakovo, kiun ni ofte revidos. Tra la arboj estas videbla bela konstruaĵo, la Nova Teatro, kie oni ludos Mazepa'n.

Sed kio estas?... Ĉu feino per bato de sia magia bastono nin transportis subite en centjaron jam de longe pasintan? Antaŭ ni staras ronda milita konstruaĵo mezepoka kun ogiva pordego, pafturoj kaj ekstera galerio difinita por ĵeti sur la atakantojn bolantan oleon aŭ peĉon; sur alia flanko bela kvadrata turo kaj fortikaj muroj kronitaj per dentegoj. Eble el la tura pordego eliros taĉmento de kavaliroj por akcepti la

fidelajn Esperantistojn kaj forpeli la Idistojn. Sed tute ne; el la pordo eliras... elektra tramveturilo. La ronda konstruaĵo estas la Barbakano, kaj la kvadrata turo la Pordego de Sankta-Floriano, restaĵoj de la antikvaj remparoj de Krakovo.

Ni iru sub la turon, demetante la ĉapelon antaŭ la malgranda kapeleto sub arkaĵo, kie konstante brulas kandeloj. Antaŭ niaj okuloj kuŝas longa strato iom mallarĝa, la Floryanska. Sed kio estas? Sur ambaŭ flankoj la domoj estas ornamitaj per flagoj, kaj ne sole flagoj, sed ankaŭ grandaj banderolegoj ruĝaj kaj blankaj (koloroj de Polujo) aŭ bluaj kaj blankaj (koloroj de Krakovo). Kredeble estas ĉi tie ia festo ĉu urba, ĉu nacia. Sed ankaŭ vidiĝas multaj esperantistaj standardoj. Ne por iu ajn festo estas elmetitaj ĉiuj tiuj ĉi flagoj kaj standardoj, sed por *nia* granda festo: saluto ili estas de Krakovo al la alvenintaj Esperantistoj.

Kaj nun ni eniras la reĝlandon de l' revoj; ni ne plu estas en Krakovo, ni ne plu estas en Galicio, ni estas en iu ajn urbo de la mistera lando Esperantujo. Ĉe ĉiu paŝo, sur ĉiu magazeno, sur ĉiu vendejo, sur ĉiu butikoj staras esperantaj afiŝoj, esperantaj reklamoj, esperantaj surskriboj. Ĉie la verda stelo kun la surskribo: speciale rekomendata; ĉie «oni parolas esperante». Jen la *Sukeraĵejo*, kun desertaj sukeraĵoj kaj krakenoj; jen la Instituto Tajlora de pretaj vestaĵoj; tie ĉi oni rekomendas ĉiuspecajn modaĵojn por sinjorinoj; tie oni vendas veŝtojn stebitajn kaj gantojn Prahajn; alie oni sciigas nin, ke «kiu volas havi blankajn kaj sanajn dentojn, uzados nur la *Perlan Kremon*»; en la «Louvre» vi trovas kravatpuntojn por virinoj; fine *Drogejo* rekomendas kaŭĉukajn higienajn artikolojn por sinjoroj kaj sinjorinoj, radikalajn ekstermilojn de puloj kaj cimoj, plibeligajn kremojn, k. t. p.

Kaj ni paŝu, ni paŝu, post magazenoj aliaj magazenoj, post butikoj aliaj butikoj, sed ĉiam kaj ĉie novaj esperantaj afiŝoj.

Sed mia vido malklariĝas, mi ne plu povas legi; dank' al Dio, finiĝas la strato, kaj antaŭ niaj okuloj etendiĝas la centro kaj la koro de Krakovo, la granda Placo Rynek.

Apud ni la Preĝejo Sankta-Mario, meze de l' placo la Draphalo, granda konstruaĵo, kiu enhavas la Nacian Muzeon, vendejon kaj magazenojn. En angulo de l' placo la antikva preĝejo de Sankta-Adalberto; en alia angulo alta turo, restaĵo de iama urbodomo. Antaŭ la Draphalo la monumento de la plej granda pola poeto, Adam Mickiewicz.

Ĉirkaŭ la placo ankoraŭ multe da butikoj kun flagoj.

Sed kio do vidiĝas apud pordo de Draphalo? Ligita al muro per ĉeno pendas malnova tranĉilo, tute ruĝa pro rusto. Jes, jes, mi memoras, mi legis pri tiu ĉi tranĉilo. Ne estas sole rusto, kiu ĝin ruĝigis (tremu!), estas ankaŭ sango. Jen la historio:

Estis iam du fratoj, kiuj.... Sed pardonu, estas iom malfrue, mi ne rakontos nun la aferon. Ni rapidu al la Akceptejo.

Ankoraŭ unu strato, denove la «Plantacioj», kaj vidu tiun ĉi grandan tabulon sur du fostoj, kun la magia surskribo:

INTERNACIA KONGRESO ESPERANTISTA

AKCEPTEJO — EKSPozICIO — VENDEJO

Jen la Komerca Akademio, jen nia kongresa hejmo.

Antaŭ la pordo jam granda amaso: kongresanoj eniras, kongresanoj eliras, kongresanoj staras kaj kongresanoj babilas.

Ni eniru. Jen—antaŭvestiblo, dekstre nigra tabulo, maldekstre nigra tabulo, la unua por privataj komunikoj, la dua por ĝeneralaj. Dekstre ni legas, ke maljuna, malbela kaj malriĉa samideano serĉas junan, belan kaj riĉan edzinon; maldekstre ni vidas, ke la tutmonda ŝuista asocio kunvenos morgaŭ je la kvara antaŭtagmeze. Sed bedaŭrinde antaŭ tiuj ĉi tabuloj staras benkoj, sur kiuj sidas konstante samideaninoj tiamaniere, ke, kiam oni devas kurbiĝi por legi surskribojn, oni similas dancontojn, kiuj faras inviton al valso.

Post la antaŭvestiblo, la vestiblo. Dekstre bufedo, maldekstre banko. Kien iri? Unue ni iru maldekstren. Afiŝo montras al ni, ke en tiu ĉi oficejo estas monŝanĝejo, enkasigo de ĉekoj kaj elpagigo de kreditleteroj.

Efektive, sorĉa oficisto ŝanĝas markojn en kronojn, rublojn en frankojn, ŝilingojn en florenojn, sed li tute rifuzas ŝanĝi miajn spesmilojn. Mi klarigas al li, ke tiu ĉi mono estas internacia, sekve akceptita nenie; li volas nenion aŭdi. Mi devas foriri kaj trapasi la bufedon, rigardante kun bedaŭro la bonajn manĝaĵojn, la bonajn trinkaĵojn, kiuj estas sur granda tablo. Apud la bankaĉo, afiŝo: Jen Babilejo! kaj sago montranta la ĝardenon. Estus pli bone meti la afiŝon en la strato, montrantan la Komercan Akademion, ĉar la tuta domo estas babilejo. La Akceptejo estas vera abelujo pro la bruoj. Ankoraŭ en la vestiblo leterkesto; la leteroj ĵetitaj en ĉi tiun keston ricevas specialan kongresan stampon.

Sed ni supreniru la ŝtuparon. La muroj estas kovritaj per afiŝoj kaj anoncoj. Per unu oni estas sciigata, ke «Sinjorino Farges ĵus alvenis». Cetere dum ok tagoj Sinjorino Farges estis ĵus alveninta; kredeble ŝi pasigis la tempon inter la stacidomo kaj la Akceptejo. Landokarto de Eŭropo montras al ni la vojon sekvitan de S-ro Parrish dum

sia paroladvojaĝo. Tiu ĉi vojaĝo bone komencita havis teruran finon: en Danujo S-ro Parrish trovis... edzinon. La virto estas ĉiam punita.

Sur la unua etaĝo amaso da babilistoj; pene mi venas ĝis la pordo de la akcepta ĉambro. Sed mi subite haltas, mirigita. Apud la pordo staras tiuj ĉi vortoj skribitaj per grandaj literoj: *Iru for*. Stranga Akceptejo!

Sed feliĉe mi ne legis la tutan afiŝon, kiu estis jena: Faru vian aferon kaj iru for. Efektive la Oficejo estas plenega de samideanoj, kies afero kredeble estas interbabili.

Malantaŭ longa tablo sidas afablaj komitatanoj kaj ĉarmaj komitataninoj, kies oficoj estas montrataj per grandaj surskriboj.

Sinjoro Kartulo prenas mian provizoran karton kaj donas al mi definitivan.

Sinjoro Insignulo donas al mi mian kongresan insignon, ĉarma plateto kun verda rubando. (La verda rubando montras, ke mi estas nek Polo, nek Krakovano; la Poloj havas ruĝa-blankan rubandon kaj la Krakovanoj blua-blankan.)

Mi rigardas la plateton kaj fariĝas tute ruĝa (kvankam ne Polo): sur la plateto estas ĉarma senĉemiza knabino, sidanta sur globo flugilhava kaj tenanta en manoj levitaj brilan stelon. Kredeble tiu ĉi bela virino estas nia kara dudekkvinjara lingvo, kaj ŝin rigardante, mi jam ne miras pri la granda nombro de ŝiaj amantoj, sed tre miras pri la frenezo de tiuj, kiuj volas ŝin plibeligi.

Sed kiuj estas tiuj ĉi rondetoj el kartono, kiuj kuŝas sur la tablo; jen ruĝaj, jen flavaj, jen blankaj; kredeble la ruĝaj estas por la ruĝuloj, la flavaj por edzigitaj kongresanoj kaj la blankaj por la fraŭlinoj. Sed pardonu! Sinjoro Insignulo petas ion de mi.

—Ĉu vi estas Konstanta Komitatano?—Ho, ne, Sinjoro.—Ĉu vi estas Lingva Komitatano?—Tute ne, Sinjoro.—Ĉu Administra Komitatano?—Neniel.—Ĉu Rajtigita Delegito?—Mi ne havas la honoron... mi estas nur Esperantisto.

Sinjoro Insignulo min rigardas kun iom da kompatato, kaj mi trapasas.

Sinsekve mi pasas antaŭ Sinjorino Dramulino, kiu vendas al mi karton por Mazepa, antaŭ Fraŭlino Operulino, kiu liveras al mi sidlokon por Halka, antaŭ Sinjoro Salminejulo, kiu ofertas kontraŭ mono iran-reiran bileton al centro de l' tero, antaŭ mi ne scias kiom da personoj, kiuj vendas biletojn por aŭdi ion, vidi ion, malsupreniri ien; fine tute senmonigita mi alvenas antaŭ lastan sinjoron.... «Dankon, dankon, sinjoro, tiu ĉi valizo ne estas la mia....» Sed ne estas valizo, estas grandega paperujego

el papero, kiu enhavas amasegon da paperaĵoj. Kaj pene portante ĝin per ambaŭ manoj, mi fine eliras kaj fale sidiĝas sur benketon de l' koridoro.

Ni malfermu tiun ĉi trezorujojn kaj trarigardu la juvelojn. Unue jen belega libreto, la Kongresa Libro, elegante presita sur luksa papero, kaj enhavanta interesajn artikolojn pri Krakovo kun multe da ilustraĵoj. Jen grandega folio el papero, la programo de l' Kongreso, speco de dama tabulo kun blankaj kaj nigraj kvadratoj, sed tre malmulte da blankaj. Ha! ni ne estas tie ĉi por amuzo.

Jen dika kajero blanka, la Oficialaj Raportoj de ĉiuj komitatoj kaj komisioj, kaj ĉiuj paperaĵoj de la komisio por ĝenerala organizaĵo: Antaŭklarigoj, Raportoj, Proponoj, Projektoj, Avizoj kaj eĉ Projekto de Aldono al Raporto. Ho mia kapo! mia kapo! Feliĉe mi ne estas Rajtigita delegito kaj ne estas devigata legi ĉi tiujn ĉefverkojn. Ĉar Esperanto estas precipe lingvo, la Raporto de Lingva Komitato tute sufiĉas por mia feliĉo. La ceteron mi legos vespere en lito, por alvoki la dormon.

Jen dika kajero kun verda kovrilo; ni demetu la ĉapelon, estas la leĝaro de Esperanto. Vere, feliĉa estas la esperantista popolo; neniel ĝi povas envii la aliajn popolojn; ĝi havas leĝaron, kiu ĉiujare plidikiĝas kaj komplikiĝas. Baldaŭ estos necese, krei specialan sekcion de Esperantistaj juristoj por klarigi al la simplanimaj popolanoj ĉiujn belaĵojn de niaj leĝoj.

Sed kion mi vidas? Jen granda bildo kun mikrofotografiaĵoj de strangaj estaĵoj ĉiuformaj, unuj rondaj, aliaj longaj, mikroboj kaj bakterioj. Kredeble ili estas la teruraj estaĵoj, kiuj infektas la esperantan organismon. Jen la insida bakterio de centra organizulozo, kiu vivas nur en mona kulturo; jen la avida bakterio de plibonigomanio, kiu sin nutras per novaj sufiksoj; jen la terura bakterio de decimala klasigo kun ĝia stranga formo ∞ (oni ĝin trovas precipe en Parizo en kelkaj domoj kaj oficejoj); sed ankaŭ jen la bonaj kuracaj serumoj de Fideleco, Libereco kaj Frateco. Sed pardonu! mi eraras. Tiuj ĉi bakterioj estas ne moralaj, sed tute fizikaj, kaj la bildo apartenas al interesa scienca verko de D-ro Odo Bujwid, prezidanto de la Loka Komitato de la Oka, «Kvin paroladoj pri Bakterioj», verko malavare donacita al ĉiuj kongresanoj.

Ankoraŭ multe da prospektoj kaj cirkuleroj pri diversaj ekspozicioj, urboj aŭ firmoj, unuj internaciaj, aliaj iom tro naciaj, ekzemple la Ekspozicio de Breslau okaze de la centjarfesto pro la militoj en 1813-1815. Mi opinias, ke la kovrilo oficiale donata de la Kongresa Komitato ne estis tre bona loko por tiaspeca prospekto.

Sed ni daŭrigu nian viziton de l' Akceptejo. Jen pordo, skriboĉambro. Mi malfermas la pordon, sed tuj refermas. Sendube la Komerca Akademio ne ankoraŭ tute finis sian laboron, ĉar mi ekvidis multajn gelernantojn sidantajn antaŭ pupitroj. Sed la pordo denove malfermiĝante, mi konscias mian eraron. La gelernantoj estas samideanoj, kiuj

de mateno ĝis vespero skribas, skribadas centojn kaj centojn da leteroj kaj poŝtkartoj kaj ili skribas des pli facile, ke la malavara komitato disdonas senpage luksan leterpaperon kun bela marko kongresa. Kiom da folioj estis uzataj dum la Kongreso? La Statistika Oficejo ne povis liveri la sciigon, sed mi povas diri, ke ĉiuj tiuj ĉi leteroj estis sekigataj per la sorba papero de L. I., malavare dismetita sur la tabloj.

Alia pordo fermita: Sekretariejo. Kio okazas malantaŭ tiu ĉi pordo? Ni ne serĉu kaj trapasu. Malantaŭ tablo en la koridoro sidas kongresa oficisto. Li disdonas al kelkaj maloftaj personoj blankajn kaj verdajn kuponarojn. Ĉu kuponarojn? Tute ne. La personoj surhavas ruĝajn rondetojn; ili estas Rajtigataj delegitoj laŭleĝaj (paginte po unu spesmilo ĉiu kapo), kaj ricevas siajn voĉdonilojn; la blankaj valoras nur unu voĉon, kaj la verdaj kvin. Kelkaj samideanoj rigardas de malproksime la disdonadon, ili estas delegitoj nenion paginte kaj sekve tute senvoĉaj.

En la fundo de l' koridoro mistera pordo kun surskribo: «Eniro malpermesita al Sinjoroj» kaj sube: «Tualetejo por Sinjorinoj».

Kio okazas en tiu ĉi loko, mi tute ne povas diri (mi estas Sinjoro), sed strangan fenomenon mi konstatas. Eniras en tiun ĉi ejon ĉiuaĝaj sinjorinoj, kelkaj eĉ grizharaj, sed eliras nur junulinoj kun brilaj okuloj, ruĝaj lipoj, freŝaj vangoj. Kiu sorĉisto loĝas en tiu ĉi rebeligejo?

Ne povante trovi la solvon de l' enigmo, ni supreniru ĝis la dua etaĝo, kie kuŝas la ekspozicio kaj la vendejo. La ekspozicio okupis tri ĉambrojn kaj la plej granda parto de la montritaj dokumentoj apartenis al la fama kolekto de S-ro Brzostowski el Varsovio. Tiu ekspozicio similis al ĉiuj aliaj de l' mondo per tio, ke en angulo de ĉiu ĉambro severa gardisto... dormis. Cetere ĉiuj valoraj dokumentoj estis ŝlositaj en vitrita ŝranko. En la vendejo kelkaj vendistoj; librejo de *Pola Esperantisto*, de Esperanto-Instituto de Leipzig, kaj montrejo de S-ino Farges (la ĉiam ĵus alveninta Sinjorino). En la koridoro juna Polino nacie vestita vendas artajn objektojn.

La dua etaĝo estante la lasta, ni malsupreniru. Meze de l' ŝtuparo mi haltas subite kaj frotas miajn okulojn. Ĉu mi vere maldormas? Tien rigardu sur la unua etaĝo, meze de tiu ĉi grupo. Estas neeble! estas revo! sed tute ne! tie, karne kaj oste, vestita laŭ la plej nova modo, staras la imperiestro Napoleono; ne Bonaparte kun kavaj vangoj kaj longaj haroj, sed Napoleono kun jam grasa vizaĝo kaj tondita kapo; Napoleono, kiu jam venkis, nun venkas kaj ankoraŭ venkos. Sed estas nur iluzio; tiu ĉi esperantista Napoleono estas D-ro Leon Rosenstock, la ĝenerala sekretario de la Loka Organiza Komitato, akso de la tuta Kongreso; kiel lia genia samvizaĝulo, li estas ĉiam sur la ĝusta loko en la ĝusta momento. Nuntempe li estas en la Akceptejo, post kvin minutoj li estos en la stacidomo, kaj post dek minutoj aliloke. Ĉiam afabla, ĉiam ridetanta,

ĉiam preta respondi eĉ la plej tedajn demandojn, li estis la vera modelo por ĉiuj estontaj ĝeneralaj sekretarioj.

La Akceptejo estas nun plena, plenega de la tuta kongresanaro, kiu zumas, bruas, bruegas. Ĉie babilantoj, en la ĉambroj, en la koridoro, sur la ŝtuparo, en la ĝardeno. Ne estas la Turo Babela, sed la Turo Babila. Kaj sur ĉiuj vizaĝoj brilas la ĝojo trovi amikojn ne reviditajn de unu jaro, de du jaroj, eĉ kelkafoje de la Bulonja Kongreso. Kaj oni salutas malnovajn konatojn, oni konatiĝas kun novaj samideanoj, tre multenombraj en tiu ĉi Kongreso.

Kaj sidanta sur benketo en angulo mi rigardas, pasantaj kaj repasantaj, la diversajn tipojn de kongresanoj, kiujn oni renkontas en ĉiuj niaj jaraj kunvenoj.—Jen kelkaj el ili:

La *verda kongresano*, esperante vestita, kun verdaj steloj sur la ĉapela rubando, verdaj steloj sur la poŝoj de l' jaketo, verdaj steloj sur la tuta veŝto. Li havas verdajn flagetojn sur la ĉapelo, verdajn flagetojn en ĉiuj butontruoj de la jaketo; li purigas sian nazon (abomeno!) per malgranda esperanta flago. Ĝenerale li estas vegetarano kaj manĝas nur verdajn legomojn.

La *bonhumora kongresano*, ĉiam ridanta, ĉiam kontenta. Li venis al la Kongreso por amuziĝo, kaj li amuziĝas. Li ĝojas, kiam brilas suno, li ankaŭ ĝojas, kiam falas pluvo. Li gratulas ĉiun, aplaŭdas post ĉiuj paroladoj, havas ĉiam saman opinion, kiel lia kunparolanto. Li estas kontenta pri la manĝo, kontenta pri la ĉambro, kontenta pri la puloj (ĉar ekzistas ankaŭ kongresaj puloj).

La *malbonhumora kongresano*, ĉiam malgaja, ĉiam kritikanta. Tuj de la alveno li kritikas kaj plendas. La donitan loĝejon li trovas abomena, li postulas tuj alian. Kiam la ŝanĝo estas farita, li sopiras je la unua. En la kunvenoj li plendas, tial ke lia sidloko estas tro malproksima, ke la oratoroj tro mallaŭte parolas. Se la parolado estas longa, li plendas, tial ke oni diras neutilajn vortojn; se la parolado estas mallonga, li plendas, tial ke la oratoro petis parolon por nenion diri. Ĉiam kaj ĉie la malbonhumora kongresano malfermas la buŝon nur por diri malagrablaĵon. Kaj la lastan tagon li malaperas murmurante, kritikante la faritan elekton pri la sidejo de la venonta kongreso.

La *politika kongresano*, kiu revas nur pri parlamento, partioj, proponoj, k. t. p. Li portas ĉiam sub la brako grandan paperujon kun dokumentoj, projektoj, broŝuroj. Li alkondukas vin en angulon por malkovri al vi grandan sekreton. Li estas aŭtoro de vasta projekto por organizado de Esperantistaro. Ĝis nun oni parolis nur pri Tera Esperantistaro; sed oni scias, ke kredeble oni povos baldaŭ interrilatiĝi kun aliaj planedoj. Tiutempe la propagando estos ne sole nacia, ne sole internacia, sed ankaŭ

interplaneda. Oni do devas nun pensi pri la kreado de centra organizo, por la tuta suna sistemo. Tiu ĉi centra organizo bezonas oficejon, sekretariojn. Sed ekzistas jam tute preta oficejo, la Centra Oficejo, kiu plene konvenas por la rolo de Sunsistema Oficejo, pro la multaj aŭtobusoj pasantaj antaŭ la pordo.

La *mallaborema kongresano*, kiu venis al la kongreso por ripozi kaj... ripozadas. Li leviĝas tre malfrue, bone ĝuas la matenmanĝon, kaj ĉirkaŭ la dekunua iras al la Akceptejo. Li babilas en la koridoroj, skribas kelkajn poŝtkartojn kaj je la unua iras por tagmanĝi kun samideanoj. Li longe babilas, trinkas nigran kafon kaj je la tria akompanas amikojn ĝis la pordo de l' kongresejo. Kelkafoje li eniras la vestiblon por fini babiladon. Li unufoje eĉ malsupreniris la ŝtuparon kaj rigardis scivole tra la pordo en la kongresan salonon. Sed la severaj mienoj de la estradaj sinjoroj lin timigis kaj li tuj malaperis. Dum la kunvenoj li promenas tra la urbo, aŭ, sidanta en publika ĝardeno, legas nacian gazeton. Li konas ĉiujn kafejojn aŭ sukeraĵejojn de la kongresa urbo, japanajn kaj ne japanajn, sed havas nenian ideon pri oficialaj institucioj.

La *ĝenerala specialisto*, ano de ĉiuj societoj, ligoj aŭ asocioj. Li ĉiam kuras kun programo en mano, ŝvitante kaj viŝante la frunton. Li ĉagreniĝas, tial ke okazas samtempe kunvenoj de katolikoj kaj liberpensuloj, bankistoj kaj socialistoj, farmaciistoj kaj juristoj. Li estas en stranga embaraso; ĉu li estas pli socialisto ol bankisto aŭ pli bankisto ol socialisto. Ne trovante solvon de l' problemo, li eniras la kunvenon de maristoj (li neniam vidis maron), kie oni lin enskribas en la Societon de la Amikoj de la Maro.

La *kolektista kongresano*, kiu kolektas ĉiujn librojn, ĉiujn paperojn, ĉiujn afiŝojn rilatantajn Esperanton. Li abonis ĉiujn Esperantajn gazetojn aperintajn kaj malaperintajn. Li havas la solan konatan ekzempleron de la *Groenlanda Esperantisto* presita ĉe la Norda Poluso mem sur foka haŭto. Li posedas ankaŭ la bonan eldonon de la verkaro de Devjatnin, tre maloftan, tiun, kiu enhavas multe da preseraroj en la Antaŭparolo. En ĉi tiu momento li estas tute ĉagrena; li vidis en la mano de samideano prospekton pri iu Esperanta botpoluro, kiu mankas en lia kolekto kaj li nenie povas ĝin trovi. Li petas la maloftaĵon de ĉiu oficisto, de ĉiu vendisto, kaj fine, ho feliĉo! sur la strato li ĵus ekvidas unu iom makulitan de koto. Zorge li ĝin prenas, stampas per sia marko kaj enskribas en la katalogon kun numero 364523.

La *kongresano, kiu elpensis novan vorton*, terura viro, kiu vin prenas per butono de jaketo, vin puŝas en angulon de koridoro, kaj ne volas vin liberigi. Vane vi konstante jesas, vane vi oscedas, vane vi rigardas la poŝhorloĝon. Li daŭrigas malvarme la pruvadon. Esperanto estas perfekta, per ĝi oni povas esprimi ĉiujn nuancojn de l' penso krom unu; Esperanto havas ĉiujn kvalitojn, ĝi estas logika escepte pri unu punkto. Kelkafoje la kongresano, kiu elpensis novan vorton, kaptas alian elpensinton. En tia okazo ambaŭ parolas samtempe ne aŭskultante unu la alian.

Fine, *the last but not the least*, kiel diras niaj britaj samideanoj.

La kongresano, kiu scias nenion pri Esperanto, krom la nomo Esperanto.

Vi ridas, vi diras, ke mi estas ŝerculo, mensogulo. Mi ĵuras, ke ĉi tiu speco ekzistas. Mi vidis la solan ekzempleron ĝis nun konatan per miaj propraj okuloj. Li havas du krurojn, du brakojn, du okulojn kaj unu buŝon, el kiu neniam eliris iu ajn esperanta vorto.

La dirita kongresano kutimas dum sia libertempo ĉeesti ian ajn kongreson por amuziĝo. Li legis en la gazetoj pri la Krakova Kongreso kaj tuj aliĝis. Li alvenis Krakovon kaj estis tute mirigata. En ĉiuj aliaj kongresoj oni parolis diversajn lingvojn kaj li povis kompreni la paroladojn faritajn en sia propra gepatra lingvo. Nun en ĉi tiu esperanta kongreso li povas nenion kompreni, ĉar ĉiuj parolas la saman lingvon, tute nekonatan de li. Kia ridinda kongreso! Li pensis, ke oni faros paroladojn por klarigi, kio estas Esperanto. Sed tute ne, oni nenion klarigas, oni nur uzas la lingvon. Kia stranga kongreso!... Kelkaj samideanoj donas al li ŝlosilon. Li legas la frazon pri artikolo, kritikis la unuecon de ĉi tiu, kritikis kelkajn radikojn de la vortaro, deklaras, ke al Esperanto ĉiam mankos literaturo, kaj malaperas, ĵurante, ke neniam li ĉeestos denove esperantan kongreson.

Sabaton, la 10. de Aŭgusto.

—Antaŭkongresa prezentado en «Teatro de Novaĵoj». La salono estis preskaŭ plena de Esperantistoj altiritaj precipe de la «Esperanta parto» de ĉi tiu prezentado.

Oni komencis per Viena opereto polen tradukita. Ĉar mi tute ne konas la polan lingvon, mi ne povas rakonti precize la temon. Sed la muziko estis ĉarma kaj la dancoj allogaj. Post la malleviĝo de l' kurteno Krakova samideano petis pardonon de la aŭskultantaro, ĉar oni ludis polan teatraĵon nekompreneblan kaj eble enuigan por la nepoloj.

Vivaj protestoj aŭdiĝis. Ne, kara samideano, ni ne enuis, tial ke ni povis ĝui la ĉarmon de via lingvo kantata kaj la poeziecon de viaj dancoj.

Nun la esperanta parto. Kurteno leviĝas; staras sur la scenejo duobla vico de ĉarmaj junulinoj kaj de afablaj junuloj, kiuj hore kantas nian himnon.

Tuj de la komenco la ĉeestantaro leviĝas kaj akompanas solene, religie la kantadon. Eĉ la neesperantistoj ĉeestantaj aŭskultas kun miro kaj respekto, impresataj de la fido kaj seriozeco, kiuj montriĝas sur ĉiuj esperantaj vizaĝoj.

Poste S-ro Felikso Lidor, tenoro, kantas konatan polan kanzonon: «Ho, vi vera anĝelo» kaj ŝereplenan alian «Aeroplano».

S-ino Heleno Palčevska, kantistino, per agrabla voĉo donas al ni tri ĉarmajn kantaĵojn: «Porcelana statueto», «Hej antaŭen!» kaj «Ĉarmoj de la Nokto».

Jen Josefo Karbowski, humoristo, kiu ridigas la tutan ĉeestantaron per spritaj ŝercaĵoj: «Kial la Oka Kongreso okazas en Krakovo?» kaj «Paŭlo kaj Gaŭlo».

Fine, bele vestita Ĥino, kies voĉo multe similis tiun de nia samideano Kriss, faris spritan paroladon: «Kiel okazas kunsido de *Rajtigita Delegitaro*», en kiu li aludis la necescon de Centra Kuirejo^[4] por liveri bonan supon al la Esperantistaro. La ĉeestantaro, figuranta Rajtigitan Delegitaron, estis dividita en tri partoj, kiuj laŭ gesto de la oratoro diris: la dekstra «jes, jes», la maldekstra «ne, ne!», kaj la centra «eble, eble!» Vera figuraĵo de vera parlamento.

Multaj aplaŭdoj rekompencis la oratoron, kiu estis samtempe la organizinto de ĉi tiu esperanta «varietea» parto kaj la tradukinto de la plej multo el la kantaĵoj kaj deklamaĵoj.

Nun la esperanta parto finiĝis; dum la interakto ni eliru momenton por spiri freŝan aeron. Sed kion krias ĉi tiu bubo en la strato; ŝajnas al mi, ke li parolas esperantajn vortojn. Jes, li havas en mano paketon da gazetoj kaj oni aŭdas: «Kongresa Bulteno! dek helerojn!» En daŭro de fulmo la bubo disvendas ĉiujn ekzemplerojn kaj ĉie oni vidas samideanojn, kiuj avida legas la unuan numeron de nia oficiala organo.

La kongresa organo fariĝas nun neceseco de nia kongresa organizado kaj mi opinias, ke ĝia utileco pli kaj pli grandiĝos. Kiam niaj kongresoj okazos en grandaj urboj, ekzemple en Parizo, la nigraj tabuloj de l' Akceptejo, kun siaj paperoj gluitaj laŭhazarde, siaj perkretaj surskriboj tute ne sufiĉos kiel informilo por la kongresanoj. Mi diris informilo, ĉar mi pensas, ke tia devus esti la rolo de la kongresa organo. Ĝi devas paroli ne pri aferoj estintaj (raporto pri kunvenoj aŭ festoj), sed pri aferoj estontaj. Ĉiun tagon ĝi devas enhavi ĉiujn programojn kaj komunikaĵojn pri la morgaŭa tago^[5].

Mi opinias ankaŭ, ke la redaktado de la kongresa organo estas afero de la kongresa estraro mem. Ĝi ne devas transdoni la taskon al gazeto.

La Kongresa Bulteno en Krakovo aperis kiel aldono al pola gazeto; mi bone scias, ke tio estis farita en speciala celo. Dank' al tiu aldoneco, la Bulteno publikigis ĉiutage la lastajn telegramojn de la mondo. Ĉu ĉi tiu novigo estis tre ŝatata de la kongresanoj,

mi ne scias, sed mi ne kredas, ke tio estas vera neceseco pro la deviga mallongeco de la telegramoj.

Alia grava kondiĉo por la gazeto estas, ke ĝi devas esti facile aĉetebla. Ĉi tiu kondiĉo estis mirinde plenumita en Krakovo, ĉar oni vendis ĝin ĉie, en la Akceptejo, en la urbaj vendejoj, sur la stratoj, en la tramvojoj.

Cetere, la bona redaktado de la kongresa organo ne dependas nur de la redaktistaro, sed ankaŭ de ĉiuj estraroj ĝeneralaj kaj fakaj. Se ĉi tiuj ne liveras ĝustajn kaj akuratajn informojn, estas neeble doni al la publiko bonan laboron.

Ŝajnas, ke la redaktanta komitato ne estis ĉiam sufiĉe helpata, ĉar en unu numero oni plendas pri la baroj renkontitaj de la redakcio de l' Bulteno: «Komence mankis esperantaj redaktantoj, la kompostistoj ne konantaj la lingvon ne povis tiel rapide komposti la gazeton kiel en naciaj lingvoj, kaj tial la plibonigado de elpresita teksto postulis pli multe da tempo. La kvar laborantoj estis devigataj samtempe verki, traduki, plibonigi la tekston.»

Do, malgraŭ kelkaj kritiketoj (enpresado de politikaj artikoloj en la gazeto), ni devas esti dankemaj al la redaktanta komitato kaj speciale al S-ro Kronenberg, kiu senlace laboris por plenigi la gazeton.

Kredeble en venontaj jaroj la kongresa gazeto eliros ne kiel privata entrepreno, aŭ entrepreno de la loka komitato, sed kiel oficiala organo de niaj oficialaj institucioj, eble kiel aldono al la *Oficiala Gazeto*.

Dimanĉon, la 11. de Aŭgusto.

—Dum la mateno, privataj kunsidoj en diversaj ĉambroj de la Komerca Akademio por elekto de naciaj delegitoj. Kiel Franco, mi ĉeestis nur la kunsidon de la Francoj, prezidatan de S-ro Rollet de l'Isle, prezidanto de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto. En ĉi tiu kunveno oni elektis kiel vic-prezidanton de la Kongreso, S-ron Rollet de l'Isle, kaj kiel delegiton parolontan en nomo de francaj esperantistoj, S-ron Sergeant, nian konatan Bulonjan samideanon, elokventan advokaton. Responde al demando de S-ro Sergeant pri la nepagintaj delegitoj (nun senvoĉaj), S-ro Bourlet klarigas kiamaniere, ili eble retrovos la voĉon. Sed ŝŝt... mi povas nenion diri, tio estas sekreto, vi vidos morgaŭ.

Alia grava kunveno estis tiu de la Germana Esperanto-Asocio. La G. E. A. venis Krakovon kun milita organizaĵo; en la Komerca Akademio ĝi havis specialan kunvenejon, specialan oficejon, ĉiuspecajn specialajn ejojn. Ĝi estas modelo de

disciplino kaj de ordo. Eble aliaj landoj, en kiuj la Esperanta movado iras laŭhazarde, povus preni kiel ekzemplon ĉi tiun potencon Societon. Volo kaj disciplino ŝajnas esti ĝia devizo. En sia kunveno, la Germanoj elektis kiel vic-prezidanton de la Kongreso S-ron Behrendt kaj kiel naciajn delegitojn D-ron Mybs kaj D-ron Kandt.

Okazis ankaŭ multaj aliaj naciaj kunvenoj; la plej interesa estis tiu de la Turko, mi uzas la ununombron ĉar estis nur unu Turko, S-ro Romano, kiu tute rifuzis sin nomi mem delegito.

La programo anoncis ankaŭ Ekzamenojn de l' Instituto (S-ro Privat); sed en la difinita ĉambro, je la difinita horo, estis nur ekzamenotoj; aperis neniuj ekzamenonto. Post unuhora atendo kaj ne volante sin ekzameni reciproke, la malfeliĉaj kandidatoj iris por tagmanĝi.

Ni imitu ilin; eble ni estos embarasitaj, sed ne por trovi manĝejon, nur por elekti. Ĉie ni trovas bonan kuiradon, ĉie ni trovas manĝokarton en Esperanto, preskaŭ ĉie ni trovas kelnerojn kun kono sufiĉa de Esperanto. Certe ili ne povos paroli kun vi pri la belaĵoj de Mazepa aŭ la arĥitektura stilo de la Draphalo, sed ili komprenas bone, kion vi petas, kiam vi montras per la fingro sur la karto, kaj ili tuj vidas, ke vi deziras trinki, kiam vi tuŝas vian malplenan glason.

Eĉ por la vegetaristoj estas vegetarana restoracio, direktata severe laŭ la vegetaranaj principoj. Efektive, kiam mi diris al la mastrino, ke mi estas bestarano, ŝi tuj proponis al mi viandon.

Oni parolis ankaŭ al mi pri mineralana restoracio (eble en Wielicka), sed mi ĝin ne vidis.

Ĉar ni finis nian tagmanĝon, mi volas daŭrigi la rakonton pri la sanga tranĉilo, vi memoras: la tranĉilo, kiu pendas apud la pordo de la Draphalo. Ĉu vi memoras? Jes. Bone. «...Estis iam du fratoj, masonistoj, al kiuj oni komisiis la gravan taskon konstrui la preĝejon "Sankta-Maria". Unu konstruis....» Sed diablo! nur kvaronhoro antaŭ la tria. Ni rapidu al la Malnova Teatro por la Inaŭguracia Kunsido.

Fine jen nia kongresejo, la Malnova Teatro. Ni eniru. Eble ni eraris, ĉar tie staras pordisto belege vestita, tute simila al preĝeja halebardisto. Sed tute ne; ĉi tiu bela sinjoro kun blua vesto arĝente brodita, kun dupinta ĉapelo, estos dum ok tagoj nia pordisto, la pordisto de l' kongresejo.

Granda vestiblo, bela ŝtuparo. Ambaŭflanke de la ŝtuparo staras lakeo vestita kiel la pordisto, sed nudkapa. Mi volas supreniri; oni min haltigas. Mi montras mian karton; ne, ne, ne estas por karto. Ha! mi komprenas, mi ne povas eniri kun mia pluvombrelo.

Mi iras al oficejo en la vestiblo; tie oni prenas mian ŝirmilon, oni postulas de mi dudek helerojn kaj interŝanĝe de mia bela pluvombrelo kaj de mia bela monero oni donas al mi... malpuran kartoneton; kion mi povos fari kun ĉi tiu kartoneto, se pluvos?

Suprenirinte la belan ŝtuparegon, oni alvenas en altan kaj vastan antaŭsalonon bele ornamitan. Inter du kolonoj el marmoro pendas belega standardo el verda veluro, surhavanta la orebroditajn nomojn de niaj jaraj bataloj:

Boulogne, Genève, Cambridge, Dresden, Barcelona, Washington, Antwerpen, Kraków.

Nur tri lokoj estas malplenaj. Kredeble la brodisto opiniis, ke post tri jaroj la venko estos plena kaj ni ne plu bezonos kongresojn.

Pordo malfermiĝas; en apuda salono mi ekvidas grandan tablon kaj gesinjorojn gaje trinkantajn kaj babilantajn; kredeble estas restoracio en la Malnova Teatro. Sed samideano sciigas min, ke nuntempe okazas matenmanĝo oferita de la Krakova urbestro por honorigo de nia Majstro kaj de nia eminentularo. Ĉirkaŭ cent personoj ĉeestis ĉi tiun festenon; kiom da eminentuloj ni havas! Mi nur povas diri al vi, ke oni flaris tre bonan odoron tra la malfermita pordo.

Jen nia kunvenejo, bela salonego tre diskrete ornamita. Sur la estrado neniu preparo estas ankoraŭ farita; tabloj kaj seĝoj staras disaj; mi serĉas la kutiman tablon difinitan por la gazetistoj, ĝenerale lokitan apude kaj malsupre de la estrado; sed estas nenia tablo. Bone, ni sidiĝu ie ajn.

Iom post iom la salono pleniĝas; jam la tria pasis kaj nenio aperas. La ĉeestantoj tre pacience atendas, ili bone scias, ke se ilia eminentularo kuniĝis ĉirkaŭ tablo kovrita de bonaj manĝaĵoj kaj de bonaj trinkaĵoj, estas nur por la bono kaj la sano de Esperanto.

Sed jen S-ro Ĝenerala Sekretario, kiu tre ekscitita aranĝas mem tablojn kaj seĝojn laŭ protokola ordo. Reprezentanto de registara gazeto, petinte de li tablon por la gazetistaro, estas repuŝita kiel simpla kontraŭorganiza gazetisto.

«La gazetistoj skribu sur siaj genuoj», deklaras Lia Sekretaria Moŝto. Eble ĉi tiuj ĝenantaj sinjoroj konkurencas kun *Oficiala Gazeto*. Fine oni donas al ili malgrandan tablon en angulo de l' estrado. Ni esperu, ke en venontaj kongresoj oni zorgos iom pli pri ĉi tiuj servantoj de l' publiko.

Subite ĉiuj leviĝas; aplaŭdoj, krioj, entute varma ovacio. D-ro Zamenhof aperis sur la estrado. Ŝajnis al mi, ke ĉi tiun jaron la kutima ovacio farita por la unua apero de la Majstro en la Kongreso estis pli serioza, pli decoplana, ni diru la vorton: malpli

histeria, ol en aliaj kongresoj. Oni honoris lin ne kiel iun Azian regnestron, sed kiel viron, certe genian viron, sed viron. Kaj ĉi tiu maniero estas vere pli inda por ambaŭ partoj, la honorato kaj la honorantoj.

La diversaj anoj de la kongresa estraro sidiĝas malantaŭ la verda tapiŝo kaj la kunsido komenciĝas.

S-ro *Bourlet* malfermas la kunsidon, Li diras, ke laŭ la tradicio la prezidanto de la pasinta kongreso devis transdoni siajn povojn al la prezidanto de la nuna. Bedaŭrinde grandan perdon suferis la Esperantistaro sekve de la morto de la organizinto de nia Sepa Kongreso, D-ro Van der Biest. Li mortis post la triumfo de ĉi tiu granda Antverpena elmontrito; li mortis eble pro la tro granda fortuzo, kiun li oferis por la sukceso de nia sepa festo.

Kiel vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, S-ro Bourlet devas anstataŭi la mortintan prezidanton de la Sepa kaj plenumi la transdonon de l' povoj.

Laŭ la Regularo la K. K. K. proponas al la elekto de la Kongreso la jenan estraron:

- *Prezidanto*, S-ro Stefan Mikołajski.
- *Vicprezidantoj*,
 - Britujo: S-ro Bolingbroke Mudie.
 - Francujo: S-ro Rollet de l'Isle.
 - Germanujo: S-ro Behrendt.
 - Polujo: S-ro Grabowski.
 - Rusujo: S-ro Nedošivin.
- *Sekretarioj*: S-ro Chavet, S-ro Rosenstock.

La elekto estas aprobita.

S-ro *Mikołajski* okupas la prezidan lokon. Li tre kore dankas por la honoro, kiun oni faris al li, lin elektante kiel prezidanton de la Jubilea Kongreso, epokfaranta en la historio de l' Esperanta movado. Li havas fidon, ke la nuna kongreso bone sukcesos; siaflanke li faros la eblon por konduki senpartie la diskutojn; li esperas, ke ĉiuj lin helpos por faciligi lian malfacilan taskon, kaj estas certe, ke ordo kaj paco regos en ĉiuj niaj kunvenoj.

Li esprimas la deziron, ke por la venonta Jubilea Kongreso post nova periodo da dudek kvin jaroj Esperanto estos venkinta kaj ke la ĉeestantoj de ĉi tiu kongreso vidos inter si nian Majstron en vivo kaj bonfarto. Li proponas, ke ni donu materialan formon al ĉi tiu deziro, leviĝante de niaj seĝoj.

Ĉiuj leviĝas. Aplauĉoj.

S-ro *Szarski*, vicurbestro de Krakovo, salutas la Kongreson en la nomo de la urbo. Li esprimas sian plej koran dankon al la Antverpena Kongreso, kiu elektis Krakovon kiel sidejon de la Oka. Tie ĉi, en Polujo, dank' al speciala situacio, ni devas interrilati kun multaj popoloj de diversaj kulturoj. Sekve, ni tre bezonas helpajn lingvon, kiu ŝparos tempon en lernado de fremdaj lingvoj, kaj permesos sin dediĉi tute al spirita disvolviĝado de la propra pola kulturo. Fidelaj al la tradicioj, sed fidelaj al la progreso, ni povos tiel akordigi amon al patrujo kaj amon al ĉiuj popoloj. Li petas pardonon pri la multaj strataj kaj konstruaj laboroj faritaj en Krakovo dum tiu ĉi sezono, kaj esperas, ke malgraŭ ĉi tiuj malhelpaĵoj la kongresanoj povas ĝui la ĉarmon de la multaj antikvaĵoj de la urbo. (*Varmaj aplauĉoj.*)

La Prezidanto de la Komerca Ĉambro de Krakovo salutas la Kongreson en pola lingvo. Li estas aplaŭdata precipe de la nepoloj.

La Sekretario de la Ĉambro por Komercio kaj Industrio en Krakovo parolas pri la graveco de internacia komprenigilo por la komercistoj. Li certigas la kongresanojn-komercistojn pri bona akcepto de iliaj Krakovaj kolegoj.

D-ro *Odo Bujwid*, prezidanto de la Loka Organiza Komitato, faras longan kaj gravan paroladon. Li esprimas la ĝojon de ĉiuj polaj esperantistoj kaj speciale de la Krakovaj, akceptante gastojn, samideanojn, venantajn el ĉiuj partoj de l' mondo, kaj kun kiuj ili povas interŝanĝi ideojn, dank' al la mirinda ilo kreita de la genio de D-ro Zamenhof. Neniam kongreso tiel grava okazis en Krakovo, neniam tiel granda kongresanaro kuniĝis en la Malnova Teatro^[6]. Li longe parolas pri la interna ideo de Esperanto; li starigas paralelon inter vera patriotismo, kiu instigas al amo al la propra patrujo, sed ne instigas al la malamo al la aliaj patrujoj, kaj la ŝovinismo, kiu trudas la mortigon de aliaj homoj nur en celo de almilito kaj de superrego, aŭ kiu volas trudi al popolo alian kulturon.

Fine li montras la gravecon de helpan lingvo en scienca rilato. Li aludas la multajn malfacilaĵojn okazantajn en sciencaj kongresoj pro la diverseco de la lingvoj, kaj deziras la baldaŭan venkon de nia lingvo en ĉiuj rondoj de scienculoj.

Ĉi tiu bela parolado de konata scienculo elvokis grandajn aplauĉojn. Neutile estas insisti pri la graveco de aliĝo al Esperanto de famaj personoj, kiel Profesoro Bujwid, disĉiplo de Pasteur kaj de Koch, fondinto de bakteriologiaj Institutoj en Varsovio kaj Krakovo.

D-ro Zamenhof leviĝas por sia kutima ĉiujara parolado.

Tondras aplaŭdoj, leviĝas brakoj, eliĝas krioj.

Kiam la kongresanaro kvietiĝas, nia Majstro eldiras la jenan belan, sed iom malgajan paroladon, per voĉo klara, sed, ŝajnis al mi, kun iomete da momenta emocio:

“La unuaj vortoj, kiujn mi volas hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĝus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam—post longa naska preparado—aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kiu ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

Kion signifas dudek kvin jaroj da laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo, tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre malmultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero de Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience ĵetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! grandegan gravecon havas tia peco da tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu pensas, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun meditas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi

dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ,—ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj—se Esperanto vivos—ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute nenio diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniom diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn,—tia lingvo ne bezonas jam timi ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniuj el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne-eminentuloj, mi citos neniun apartan nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van der Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en la memoro de ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrabloj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via

nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de *ĉiuj* niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari tion tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi «majstron», ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: «tion mi postulas» aŭ «tion mi deziras». Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi—laŭ via deziro—dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉio, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortentas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj ili devas rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinio la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute

libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu «majstro», ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas tute laŭvola, ke la esperantismo kaj la esperantistoj ne povas esti respondaj pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio nenium el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur *privataĵo*, kiu povas esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identita* kun ĝi.

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: «kiu pli laŭte krias, tiu estas prava». Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estimon* kaj *konfidon* por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj «espero, obstino kaj pacienco»; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia

standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: «konkordo».

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable senluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia «kanto de cigno», li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon,—ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havas por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantisman, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi plu ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtrale-homa, sengenta lingva fundamento,—tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento kaj ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenas, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo plej koran dankon. Plej koran dankon ni esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.”

Aplaŭdegoj sekvas la lastan frazon de la parolado, sed en la rigardoj direktataj al nia eks-Majstro oni vidas miksaĵon de respekto kaj de riproĉo. Kio! la Majstro ne plu volas esti Majstro! Ĉu tio estas ebla? Kiel diris sprite nia samideano Belmont, ĉu Dio povas fariĝi eks-Dio?

S-ro *Bourlet* proponas, ke oni kantu «La Esperon».

Ĉiuj leviĝas kaj la gravaj sonoj de nia himno eliĝas el ĉiuj brustoj. Ŝajnas al mi, ke oni kantas iun malgajan, kvazaŭ funebran kanton por enterigo de la majstreco de nia eks-Majstro.

La *Ĝenerala Sekretario* legas diversajn telegramojn de saluto al la Kongreso senditajn de forestantaj samideanoj. La legado de ĉiu telegramo estas sekvata de aplaŭdoj. La sendintoj estas: Generalo Sebert, Rektoro Boirac, Grupo de Charlottenburg, Hungaraj Esperantistoj, S-ro Schröder (el Wien), Fraŭlino Ad. Zamenhof, S-ro Leon Zamenhof, S-ro Edmond Privat, Esperantistoj de Graz, Kapitano Peregordo, S-ino Ranfaing Zabylon d'Her, Ukrainaj Samideanoj, F-ino Lawrence, D-ro Arnholdt, Esperantista Grupo de Shanghai, Möller kaj Borel, Otto Simon, Japanaj Esperantistoj, Pola Societo Paca de Varsovio.

Li legas poste liston de la delegitoj, kiujn diversaj registaroj oficiale sendis al nia Kongreso. Jen tiu listo:

- *Aŭstrujo*: Ministro de la Milito kaj Landa Militistaro: Kapitano Engel.
- Bohema Nacia Konsilantaro: S-ro Adalbert Kraus.
- *Bulgarujo*: Ministro de l' Instruo kaj Asocio Bulgara: S-ro Krestanof.
- *Hungarujo*: Ministro de la Nacia Instruo: S-ro Kanoniko Giesswein.
- *Germanujo*: Urbo Breslau: S-ro Behrendt.
- *Rumanujo*: Agrikultura Ministro kaj Komerca Ĉambro el Galatz: S-ro Henriko Fischer.
- *Rusujo*: S-ro Aleksandro Nedoŝivin, ŝtata konsilanto.
- *Usono*: Ŝtato Pensilvania: S-ro Hitzel.

Ĉiuj siavice salutas la kongreson per afablaj vortoj, kaj deziras sukceson al nia lingvo.

Kapitano Engel rimarkigas, ke la unuan fojon, kiam Esperanta Kongreso okazas en Aŭstrujo, ĝi havas kiel sidejon urbon ĉirkaŭitan de fortikaĵoj. Li esperas, ke Krakovo fariĝos vera kastelo de Esperanto, kiu ĉiam trovos en ĝi protektadon kontraŭ ĉiuj atakantoj.

S-ro *Prezenti Levi*, nia blinda samideano, havas tuj la parolon post la reprezentanto de Aŭstrujo, ĉar li parolas en la nomo de Ŝia Moŝto la reĝino de Rumanujo. Ŝi komisiis

al S-ro Levi la agrablan taskon oferi al D-ro Zamenhof sian portreton kun propra subskribo.

S-ro *Kraus* estas varme aplaŭdata pro la mallongeco de sia parolado.

S-ro *Krestanof* diras, ke Esperanto estos la pli potenca ilo por dissemi la sciencojn kaj unuigi la korojn.

S-ro *Behrendt* parolas pri la utileco de Esperanto en praktikaj celoj. Kiel ekzemplon li citas la ekspozicion de Breslau dum la venonta jaro; ĉi tiu ekspozicio aliĝis al U. E. A. kaj fariĝis esperanta entrepreno. Li invitas la kongresanojn veni multenombraj Breslau'on.

S-ro *Kanoniko Giesswein* faras trafan komparon inter la lingvoj kaj la modernaj komunikiloj. La patraj lingvoj similas la malnovajn transportilojn, ĉevalojn, veturilojn, kiuj ebligis nur la iradon en tre malgranda rondo. La internaciaj lingvoj similas la nunajn transportilojn kaj komunikilojn, fervojojn, telegrafojn, telefonojn, kiuj ebligas la iradon en la tuta mondo kaj la komunikadon kun ĉiuj partoj de l' terglobo. En malnova tempo la rolo de interkomprenilo estis ludata de la lingvoj latina kaj araba. Nuntempe ĉi tiuj lingvoj ne respondas je la stato de la civilizacio. Li salutas la kongreson en la nomo de Hungarujo kaj invitas la kongresanojn al la postkongresaj festoj en Budapeŝto.

S-ro *Fischer*, Delegito de Agrikultura Ministro, de la Komerca Ĉambro de Galatz kaj de la Prefekto de Polico de Rumanujo, petas pardonon pro la multaj delegacioj. Li legas raporteton por ĉiu fako kaj insistas pri la graveco de Esperanto por la policistaro de Rumanujo, kien venas multaj alinaciaj policistoj. Li opinias, ke Esperantistoj devas labori mano en mano kaj ne kontraŭbatali unu la alian. Li aldonas, ke nun ni estas maljunaj (dudekkvinjaraj) kaj sekve ni malobeos al D-ro Zamenhof, daŭrigante lin nomi «patro».

S-ro *Nedoŝivin* alportas la saluton de sia grandega patrujeco, kie estas parolataj tiom da diversaj lingvoj, ne sole en apartaj regionoj, sed kelkafoje eĉ en la sama loko.

S-ro *Hitzel* transiris Atlantikon por alporti gratulojn kaj esperojn de la Amerika Esperantistaro.

S-ro *Mudie* rimarkigas, ke morgaŭ matene okazos la malferma kunsido de U. E. A., sed ankaŭ estas projektita ĝenerala fotografado de la kongresanoj. Li proponas, ke oni fotografu la kongresanaron tuj post la kunsido.

Kaj nun la granda bataliono de la naciaj delegitoj ŝarĝitaj de salutoj, komplimentoj, bondeziroj.... Iu ŝerculo proponis, ke ĉiuj parolu samtempe, por ŝpari tempon; sed en tia okazo la malferma kunsido estus tro mallonga. Cetere dum tiu salutanta kunveno oni ne diskutas, nek disputas, kaj tio estas bona afero. Aliparte ĉi tiu aŭdado de ĉiulingvaj samideanoj estas bona okazo por konvinkiĝi, ke malgraŭ neeviteblaj diferencetoj en elparolado aŭ konstruo de la frazoj, ĉiuj oratoroj estas bone kompreneblaj, kondiĉe ke ili parolu sufiĉe laŭte.

S-ro *Glück* (Aŭstrujo, germana lingvo) diras, ke la Kongreso estos sufiĉe signifa. Ĝi certe estos modelo de paco kaj konkordo; ĝi estos ankaŭ glorigo de la genia elpensinto de Esperanto, kiu restos por ni ĉiam Majstro.

S-ro *Schulhof* (Aŭstrujo, bohema lingvo) salutas la kongreson kaj diras, ke inter la Bohemoj Esperanto faras grandajn progresojn.

S-ro *Jakimĉuk* (Ukrajna) diras, ke lia lando estas tre vasta, sed ke la nombro de la loĝantoj estas malgranda kompare al la areo. La Esperantistoj estas sekve iom disaj; tamen ili estas tre proksimaj per la koro kaj laboras mano en mano por la bono de Esperanto.

D-ro *Ghez* (Aŭstrujo, itala lingvo) parolas pri sia lando baniĝanta en la ondoj de Adriatika maro, vera paradizeto de Esperanto.

D-ro *Loránd* (Hungarujo) invitas la kongresanojn, iri multnombraj al Budapeŝto por la postkongresaj festoj.

S-ro *Ŝpicer* (kroata lingvo) certigas la kongreson, ke malgraŭ la malgrandeco de sia lando la kroataj Esperantistoj tenas alte la verdan standardon. Li finas per la krioj: Vivu la nobla nacio pola! Vivu Krakovo!

S-ro *Ernst* (Belgujo) deziras al la Oka Kongreso la saman sukceson, kiel havis la Sepa.

S-ro *Krestanof* (Bulgarujo) anoncas, ke la Ministro de la Popola Instruado aprobis lian lernolibron por Bulgaroj kaj ĝin rekomendis al ĉiuj lernejoj en la reĝolando. Tio estas la unua paŝo al ĝia enkonduko en la lernejojn. Sed por la definitiva venko estas necesa antaŭ ĉio konkordo inter la Esperantistoj.

D-ro *Schneider* parolas en la nomo de la Turista Ligo de Polujo kaj de la Popola Universitato.

Kolonelo Pollen (Britujo) ... Post voko de la nomo, oni aŭdas voĉon venantan el... la plafono. Ĉiuj kapoj leviĝas kaj oni ekvidas nian gajan samideanon sur alta galerio en fundo de l' salono. Bedaŭrinde nur la pezaj vortoj (multsilabaj) venas ĝis mia orelo, la malpezaj (unu- aŭ dusilabaj) restas en aero kaj ne falas teren. Mi nur aŭdis, ke la Ministro de Edukado faris ion bonan por Esperanto.

S-ro *Harvey* (Skotujo) certigas, ke la skotaj Esperantistoj estas firmaj kiel iliaj montoj. Li esperas, ke post tri jaroj la kongreso okazos en Skotujo. Paco ĉiam regos inter ni. La Skotoj cedos lokon al neniuj pri fervoro.

S-ro *Jameson Johnston* (Irlando) alportas la bondezirojn kaj esperojn de sia lando.

S-ro *Edwards* (Kimrujo) venas de malgranda lando kaj parolas en la nomo de malgranda nacio; ĝi estas ankaŭ aparta nacio pro la lingvo, kio estas bona kaŭzo por fariĝi Esperantistoj.

S-ro *Hansen* (Danujo) esperas ankaŭ, ke oni baldaŭ festos Esperanton en dana lando.

S-ro *Anttila* (Finlando) donas la certigon, ke ĉiuj finnaj Esperantistoj estas firme fidelaj kaj veraj Esperantistoj.

S-ro *Sergeant* (Francujo) diras, ke ne al li persone la Francoj faris la honoron ilin reprezenti, sed oni lin elektis, ĉar li estas urbano de Boulogne, kie la unuan fojon flirtis la verda standardo, kiu nun estas starigita en ĉiuj partoj de l' mondo. Li memoras kun emocio la malgrandan tablon de malgranda butikoj en malgranda strato en Boulogne, sur kiu estis verkita la projekto de flago esperantista, kiun akceptis la unua kongreso, ĉi tiu flago, simbolo ne nur de Esperanto, sed ankaŭ de Esperantismo. Elektante la oratoron, la Francoj volis montri, ke ili estas fidelaj al la Fundamento kaj opinias, ke la plej bona maniero honori la Majstron estas respekti la Fundamenton, tiun veran kaj solan ligilon de ĉiuj Esperantistoj.

D-ro *Mybs* (Germanujo) konstatas, ke de kelka tempo kelkaj nubetoj, eĉ kelkaj nuboj aperis sur la blua ĉielo de Esperantujo. Sed ni ne devas forgesi la gravan parolon, fundamenton de Esperantismo, «ni amu unu la aliajn». Sub ĉi tiu signo ni venkos. Kvankam pluvas sur Krakovo, brilas la suno de samideaneco.

S-ro *Serabji* (Hindujo) petas pardonon pri sia parolado, ĉar li estas nur unujara Esperantisto. En Hindujo la Esperantistoj ne estas multaj, sed ĉiuj estas tre fervoraj.

S-ro *de San Millán* (Hispanujo, kastila lingvo) certigas, ke ĉiuj hispanaj koroj estas tiel varmaj, kiel la radioj de l' suno en lia lando.

S-ro *Sabadell* (Hispanujo, kataluna lingvo) montras la fervoron esperantistan en sia lando per la fakto, ke la urbestroj de du urboj, Terrassa kaj Sabadell donis al stratoj la nomon de D-ro Zamenhof.

S-ro *Allende* (Hispanujo, baska lingvo) diras, ke ĝis nun la parenceco de baska lingvo kun aliaj lingvoj ne estis klare montrita, sed kun unu ĝi rilatiĝas almenaŭ per la koro de ĝiaj parolantoj, nome Esperanto.

D-ro *Stromboli* (Italujo) alportas en Krakovon la saluton de italaj samideanoj, sed esperas, ke la venontan jaron li povos ŝpari la vojaĝon kaj akcepti la Esperantistaron en sian hejmon.

S-ro *X.* (Japanujo): «En la nomo de la japanaj Esperantistoj mi vin salutas». Plena teksto. (*Varmaj aplaŭdoj.*)

S-ro *Bermudez* (Meksikujo) venis Krakovon post malpaca periodo en sia lando. Li estos kontenta retrovi tie ĉi pacon kaj ordon.

S-ro *Bonnevie* (Norvegujo) bedaŭrinde preparis sian paroladon en sia malvarma lando dum la vintro kaj la vortoj frostis en la gorĝo.

S-ro *Grabowski* (Polujo) ĝojas kun ĉiuj samideanoj, ke la Kongreso okazas nun en pola tero, kie estis ĵetitaj la unuaj semoj de Esperanto. Li ĝojas ankaŭ pro tio, ke ni havas ĉi tie mil semantojn de Esperanto, ĉar de ĉi tiu tago Esperanto efektive ekfloros en Polujo. Kaj nun li volas esprimi al nia komuna Majstro sian ĝojon pri la jubileo de nia lingvo:

Feliĉa la semanto estas, Kiu printempe semis grenon, Kaj en aŭtuno ĝoje festas De bonrikolto la solenon.

Feliĉa, kiu en la koro Pri granda verko flame revis, Kaj el la ĉarma flamo-revo Maturan frukton elricevis.

Arbeto, kiun Majstro kara, Vi plantis ĉe Vistul'-rivero, Elkreskis ĝis lazuro klara, Etendas branĉojn ĉirkaŭ tero.

Sub ĝi kolektis terofilojn La jubile' de nova sento, Per kiu frate ligas milojn Neŭtrala lingva fundamento.

Krakovaj muroj ĝojresonas, Dum lernantaro multnacia Dankeme sian Majstron kronas Per la verdaĵo laŭrfolia.

En niaj koroj, granda homo, Stariĝas viaj monumentoj; La gloron de l' benata nomo
Ripetos ĉiuj la jarcentoj.

D-ro *Fiŝer* (Rusujo) parolas en la nomo de la regnantoj kaj en la nomo de Kaŭkaza Societo. Unueco, fideleco kaj paco estu nia devizo.

S-ro *Andonoviĉ* (Serbujo) diras, ke en lia lando oni devas lerni multe da lingvoj; la malgrandaj lingvoj ne povas batali kun la grandaj. Sekve Esperanto havas multe da graveco por la Serboj.

S-ro *Neniulo* (Svedujo) nenion diras kaj ne estas aplaŭdata.

S-ro *Schmid* (Svisujo) proponas, ke oni nomu D-ron Zamenhof «patro de homara konkordo».

Laŭ propono de diversaj samideanoj oni decidas sendi telegramojn al Lia Moŝto la Imperiestro de Aŭstrujo, al Reĝino Elisabeto de Rumanujo, al Generalo Sebert kaj al Rektoro Boirac.

Ĉar ankoraŭ pluvas kaj estas malfrue, oni decidas, ke la fotografado okazos morgaŭ matene je la oka. Kunvena loko: la statuo de Adamo Mickiewicz.

La prezidanto fermas la kunvenon je la sesa.

En la vestiblo, kontraŭ la malpura kartono, oni redonas al mi la pluvombreton, sed oni tute ne redonas la monereton.

Je la naŭa komuna festmanĝo en la salono de «Pafista Societo».

Amiko diris al mi: «Ne venu tro malfrue, por havi bonan lokon ĉe tablo». Kvaronon antaŭ la naŭa mi transiris la stratan pordon. En la vestiblo oni prenas mian pluvombreton (kosto: 20 heleroj). Mi eniras la salonon kaj vidas... neniun tablon. Nur laŭlonge de unu el la muroj, longa, mallarĝa tablo estas kovrita de malvarmaj manĝaĵoj. Kredeble oni ne ankoraŭ dismetis la tabletojn. Ni venis tro frue; ni atendu. Iom post iom la salono pleniĝas, samideanoj en ĵaketo, samideanoj en frako, samideaninoj en simplaj roboj, samideaninoj en festroboj. La babilado komenciĝas kaj la bruo de la konversacioj fariĝas pli kaj pli laŭta, sed neniuj tablo aperas. Subite mi ekvidas sur tablo en antaŭsalono glasetojn da brando kaj ŝinkobulkojn. Bona afero! Estas la antaŭmanĝo, difinita por akriĝi la apetiton; sed mi devas konfesi, ke je ĉi tiu

malfrua horo mia apetito estis jam tre akra. Ni antaŭmanĝu! Mi revenas en la salonon, sed ankoraŭ neniuj tabloj!

Nur la morgaŭan tagon mi legis en la Kongresa Bulteno, ke mi ĉeestis «Raŭton». Ĉu vi konas Raŭton? Estas tre amuza ludo. Por «raŭti», estas necesa granda, kvarangula salono; en ĉi tiu salono vi metas apud unu el la muroj grandan tablon kun diversaj manĝaĵoj. Sur la libera loko staras la ludantoj, kies parto devas esti frake vestita; post signalo (trumpeto aŭ orkestro aŭ krio: antaŭen Esperantistoj!) la ludantaro marŝas al la tablo kaj amase ĝin ĉirkaŭas. Laŭ la regularo oni devas alproksimiĝi al la tablo, preni teleron, meti sur ĝin pecon da viando kaj salaton. Poste oni devas trairi la amason, kiu vin premas kaj vin puŝas, kaj iri al malproksima parto de l' salono, nenion disŝutante, precipe sur la frakulojn dislokitajn en la amaso. Kaj ne estas ĉio: oni devas ankoraŭ iri al alia malproksima parto de l' salono, por preni glason da biero aŭ da siropo, kaj reveni en sian antaŭan lokon nenion disverŝante.

La ludo estas tre amuza, precipe kiam malvarma guto da biero falas sur la nudan kolon de sinjorino aŭ kiam guto da ruĝa siropo venas makuli la blankan ĉemizan antaŭaĵon de sinjoro. En tia okazo la malbonaj ludantoj koleriĝas, sed la bonaj dolĉe ridetas. Precipe la frakuloj havas tre malbonan karakteron, ili faras teruran mienon, kiam oleita salato flugas al ilia frako.

Efektive, post signalo donita de la orkestro, la ludo komenciĝis, kiel dirite. Mi estis tre malbona ludanto, mi ne volis movi mian teleron kaj manĝis sur la tablo, mi ne volis movi mian glason kaj trinkis apud la fonto de biero. Laŭ tio, kion mi aŭdis, la gajninto estis S-ro Bourlet, lerta por ĵongli kun ciferoj kaj ekvilibri buĝetojn; la malgajninto estis iu samideano vestopurigisto, kun kvin frakoj makulitaj, ok ĵaketoj malpurigitaj kaj mi ne scias, kiom da sinjorinoj bierumitaj.

Samtempe oni konstatas, ke la Esperantistaro ne malŝatas la bonan manĝaĵon. En angulo, S-ro Grabowski englutas ĉiuspecajn bonaĵojn. Kaj oni miras, kiam oni pensas, ke ĉi tiuj bonaĵoj aliformiĝos en belajn versojn. Nenio perdiĝas en la naturo. En mezo de la salono, D-ro Zamenhof ĉiam afabla, ĉiam nelacigebla, surskribas subskribojn. Li surskribas sur kajerojn, sur albumojn, sur ventumilojn, sur rubandojn, sur la plej strangajn objektojn. Se li pagigus siajn surskribojn, kia fonto da enspezoj por niaj malriĉaj oficialaj institucioj! Sed nun la stomakoj estas plenaj kaj la bareloj malplenaj. Oni revigliĝis, la kruroj fariĝas agitemaj kaj baldaŭ paroj komencas turniĝi. Balo organiziĝas kaj daŭris ĝis malfrua horo. Kredeble jen la kaŭzo de la netableco.

Lundon, la 12. de Aŭgusto.

—Je la oka kaj kelkaj kvaronoj okazis la ĝenerala fotografado de la kongresanoj, unue apud la statuo de Mickiewicz, poste antaŭ la kastelo Wawel.

Dum la mateno okazis diversaj kunvenoj de istuloj en Komerca Akademio, kaj vagante tra la koridoroj oni vidas la kutiman spektaklon. Sur la pordoj de la ĉambroj, vi legas mirindajn titolojn: «Tutmonda Societo de Rabistoj», «Universala Asocio de Unukruruloj», k. t. p. Se kurioze vi malfermas la pordon, vi ekvidas sur la estrado kelkajn gravmienajn sinjorojn kaj en la ĉambro unu aŭ du samideanojn. La estradaj sinjoroj estas la estraro de la Societo (Prezidanto, Vic-prezidantoj, Ĝenerala sekretario, Sekretarioj neĝeneralaj, k. t. p.); la izolita samideano reprezentas la tutmondan anaron.

Kelkafoje vi ekvidas sur sojlo de pordo du sinjorojn, kiuj vin rigardas kun peteganta mieno. Ili estas la prezidanto kaj la sekretario de «Universala Asocio», kiuj atendas la neekzistantajn membrojn. Se, pro kompatato, vi eniras, oni rapide fermas la pordon por ke vi ne povu eliri kaj la kunsido tuj komenciĝas.

La plej grava okazintaĵo de ĉi tiu mateno estis la malferma kunsido de U. E. A. Ĝi havis lokon en la Kongresejo ĉe la Malnova Teatro. Kiam S-ro *Mudie*, prezidanto, malfermas la kunvenon, deko da personoj estas disaj en la salono. La aliaj estas ankoraŭ en la fotografado.

S-ro *Mudie* diras, ke kredeble niaj fotografotaj samideanoj estis kaptitaj kaj enŝlositaj en la kastelo. Atendante ilin, li legas la programon de la Tria Kongreso de U. E. A. Poste, li insistas pri la granda utileco de U. E. A., aludas la laboron plenumitan de U. E. A. dum la lasta jaro, citas la ĝojigan kreskon de la nombro de la membroj kaj la malpli ĝojigan staton de la financoj, kiuj bezonas specialan atenton kaj finan solvon. Li parolas pri la malfacila tasko de Delegito de U. E. A. en granda urbo, ekzemple en Londono, kiam la Delegito devas kelkafoje dum la semajno iri al iu Londona stacidomo, je la kvina matene, por renkonti samideanon, kiu tute ne scias la anglan lingvon. Li anoncas, ke de nun en Londono speciala sekretario prizorgos la akcepton de samideanoj; sed tio postulas financajn rimedojn. Poste, li tuŝas la ofte priparolitan problemon de «per» kaj «por». Vane klopodas kelkaj personoj disigi ĉi tiujn du movadojn. Ili ne estas praktike tiel apartigeblaj, kiel eble teorie ili ŝajnas. Ili estas multe tro ligitaj unu kun la alia. La plej bona propagando estas la peresperanta. Agante per Esperanto oni agas por Esperanto. Ne la akademiaj demandoj, sed la praktikaj estas interesaj por la plimulto. U. E. A. dum kvin jaroj senbrue iris sian vojon al la nuna sukceso. Ne multe paroli, sed des pli obstine labori; kun ĉi tiu devizo U. E. A. daŭros kaj progresos, kaj neniu povos tion malhelpi.

Varma aplaŭdo sekvis ĉi tiun ĝustan kaj trafan paroladon. Efektive, ĉiufoje, kiam mi provis varbi iun ajn personon, tuj okazis la jena interparolado:

—Jes, mi volonte lernus Esperanton, sed kiam mi estos en fremda lando, ĉu mi povos paroli esperante kun la fervojaj oficistoj?—Ne ankoraŭ.—Ĉu mi povos doni ordonojn al portisto en la stacidomo?—Mi ne kredas.—Ĉu mi povos peti informojn de policano?—Malofte.—Ĉu mi povos paroli kun mia veturigisto?—Kredeble tute ne.—Tiam, kun kiu mi povos paroli?...

Antaŭ la fondo de U. E. A. la respondo al ĉi tiu lasta demando estis: «Eble kun iu samideano post longa duontaga serĉado, se ĉi tiu samideano ne estas forhejme kaj se li havas tempon». Sed nun mi povas venke respondi: «Antaŭ via alveno en la urbon, vi povos peti informojn de speciala delegito, kiu tuj respondos al vi. En la urbo, vi povos iri al difinita loko, kie vi trovos ĉiam samideanon, kiu liveros al vi ĉiujn deziratajn sciigojn aŭ informojn; eĉ se vi deziras, li venos mem al la stacidomo por vin akcepti kaj faciligi al vi la alvenon ĉiam malagrablan, kiam oni ne scias la lingvon de la lando.»

Kaj mi povas certigi, ke ĉi tiu respondo faras pli grandan impreson ol ĉiuj teoriaj argumentoj.

Ĉar la fotografemaj kongresanoj ne ankoraŭ alvenas, S-ro Mudie, bona humoristo, komencas legi iom da statistiko. La efekto estas tuja. Post kvin minutoj la ĉeestantaro foriris al la reĝlando de l' songoj.

Granda bruo de paŝoj malsuprenigas al la tero la songantojn; jen la bataliono de la fotografitoj. La salono pleniĝas kaj oni plu ne parolas pri statistiko.

S-ro *Hodler*, direktoro de U. E. A., havas la parolon. Li metas sur la tablon dikan paketon da paperfolioj, kiun la ĉeestantaro rigardas kun iom da maltrankvileco. Li komencas tre belan paroladon pri la teorio de la praktiko, aŭ la praktiko de la teorio (mi ne scias la ĝustan titolon); li foriras el la tero kun ĝiaj praktikaj bezonoj kaj iom post iom supreniras al pli altaj ideoj, kaj tiam mi observas strangan fenomenon: ju pli leviĝas la ideoj de la oratoro, des pli malleviĝas la kapoj de la ĉeestantoj; eĉ kelkaj personoj de la aŭskultantaro fermas la okulojn kredoble por pli bone ĝui la vortojn aŭdatajn. Kaj simila al majesta rivero, kies glateco estas neniam difektita eĉ per la plej malgranda ondeto, fluas la parolado, kaj folioj sekvas foliojn, frazoj sekvas frazojn, paroladeroj sekvas paroladerojn; eĉ momente oni timis, ke la oratoro senatente relegis la unuajn paĝojn. Pro la ĉesado de l' bruo leviĝas ĉiuj kapoj kaj varmaj aplaŭdoj rekompencas la Direktoron de U. E. A. pro lia senlaca agado.

Sed kial S-ro Hodler, ĉi tiu praktikema viro tiel ŝatas la teorion? Kial li volas (sen aeroplano) flugi al la ĉielo? Restu sur la tero, kara sinjoro, restu kun ni sur la tero!

Poste oni legas la unuan raporton pri la agado de la Centra Oficejo de U. E. A.

S-ro *Lidl* (Poremba-Silezio) aprobas la laboron de U. E. A., sed deziras la disigon de «por» kaj «per».

S-ro *Allende* (Bilbao) rakontas pri la malfacila tasko de la karavanestroj, S-roj Poncet kaj Génarmont, kaj esprimas al ili la koran dankon de la karavananoj.

S-ro *Mahn* (Breslau) bedaŭras la forstrekon de la aprobantoj.

La *Prezidanto* petas lin pritrakti ĉi tiun demandon ĉe la financa raporto, al kiu ĝi pli multe rilatas.

S-ro *Silbernik* (New-York) transdonas la salutojn de la «Usona Esperanto-Asocio». Li ĉeestis la kongreson de ĉi tiu Asocio en Boston kaj raportis al ĝi pri U. E. A. Li petas, tute aprobante la celon de U. E. A., ke oni sin limigu al la per-Esperanta agado.

La *Prezidanto* atentigas denove pri la praktika malebleco de nepra disigo.

S-ro *von Frenckell* (Dresden) transdonas al la Kongreso la salutojn de la G. E. A. kaj de la Dresdenaj samideanoj. Li petas informojn pri la starigo de la Delegitoj kaj deziras por atingi plej grandan fidindecon, la kunlaboradon kun la naciaj societoj.

La *Prezidanto* atentigas lin pri la raporto de S-ro Rousseau, en kiu ĉi tiu demando estas speciale traktita en la senco de kunlaboro. U. E. A. mem deziras tian kunlaboradon.

S-ro *Edwards-Aberystwyth* (Kimrujo) deziras, ke oni evitu la diskutojn de «por kaj per», kaj ke laŭ bona angla uzo ĉe laboraj subskriboj oni agu «por-per».

S-ro *Drtina* (Roznov) deziras, ĉar ĉiuj Delegitoj laboras ankaŭ «por», ke oni enmetu paragrafon pri tio en la statuton.

La *Prezidanto* respondas, ke estas preferinde lasi la nunan staton, ĉar U. E. A. ne deziras fari iun ajn konkurencon al naciaj societoj. La aranĝo de kursoj, k. t. p., devas esti lasata al la naciaj societoj, ankaŭ se la aranĝantoj aŭ instruistoj estas la Delegitoj de U. E. A.

S-ro *Hansen* (Kopenhago) opinias, ke estas necese, diskuti la demandon «por» kaj «per». Sendube la per-Esperanta agado de U. E. A. estas la plej efika por-Esperanta propagandilo. La personoj estas multe pli facile haveblaj por Esperanto per la «pera» agado, ĉar nur ĉi tiu povas promesi profitojn. La uzo de Esperanto ĉe societoj aŭ urboj, kiel ekz. en Breslau, ne okazas por servi al Esperanto, sed por servi al si mem. Ili ne uzas ĝin por propagandi, sed por ricevi palpeblajn profitojn.

S-ro *Mahn* esprimas la opinion, ke U. E. A. kun siaj nunaj celoj estas la plej grava nuna movado kaj ke en estonteco U. E. A. estos la intelekta patrujo de la homa kulturo.

S-ro *Behrendt* (Breslau) atentigas pri la fakto, ke ankaŭ ekster U. E. A. ekzistas fervoraj propagandistoj de Esperanto.

La *Prezidanto* respondas, ke ĉi tiu fakto estas de neniuj kontestataj kaj ke U. E. A. kompreneble ne povas enhavi ĉiujn fervorajn propagandistojn, ĉar multaj personoj tute ne ŝatas eniri asocion.

S-ro *Pazelt* (Bohemujo) diras, ke interne de U. E. A. estu fondata fako simila al la jam ekzistantaj fakoj, kiu sin okupas kun la por-Esperanta propagando.

Tiel finiĝis ĉi tiu batalo de *por* kontraŭ *per*, de *o* kontraŭ *e*, kiun oni povus nomi la Batalo de la Du Vokaloj. Kio rezultis el la diskutado? Nenio. Sed kiel oni diras en iu lando: Estas pli bone, ol iri al la drinkejo.

Cetere, la kunsido estis gajigita de bohema samideano, kiu konkludis sian paroladon ludante mallongan arion sur trumpeteto. Tre bona rimedo por averti la dormantajn neaŭskultantojn, ke la parolado estas finita kaj ke oni devas aplaŭdi.

Je la tria kaj duono posttagmeze, unua labora kunsido de la Kongreso.

Post forlaso de mia pluvombrelo kaj de dudek heleroj, alproksimiĝante de la salono, mi aŭdas gajan arion kaj tra la pordo ekvidas muzikistaron starantan sur la estrado. Ĉu la kunsido jam komenciĝis? Ĉu nia eminentularo aliformiĝis en muzikistaron? Ĉu D-ro Zamenhof fine agordigante aŭ akordigante sian orkestron kondukas majstre per bastono niajn eminentulojn? Mi ĝojas pensante baldaŭ vidi la jenan spektaklon: S-ron Bourlet batantan tamburegon, S-ron Mudie blovantan en fluto kaj D-ron Mybs glitigantan dolĉe arĉon sur violono, ĉiuj farante ĉirkaŭ nia eks-Majstro malgrandan rondon familian. Sed enirante la salonon mi tuj komprenas mian eraron. Nur estas sur la estrado militista muzikistaro, kiu prove ludas por la hodiaŭa Festvespero. Ve! la bela sonĝo vaporigis, sed eble ĝi baldaŭ efektiviĝos. Nun la muziko ĉesas; kvazaŭ sorĉe, pupitroj kaj muzikiloj estas anstataŭataj de tablo kovrita per verda tapiŝo, muzikistaro de severmienaj sinjoroj nigre vestitaj kaj muziko de bruo de paroladoj.

Kun miro mi ne vidas nian eks-Majstron sur la estrado; ĉu li estas malsana? ĉu Idistoj lin forrabis dum la nokto? Sed rigardante la ĉeestantaron, mi ekvidas sur la unua vico malgrandan grizharan sinjoron kun okulvitroj. Laŭ ricevita informo, ĉi tiu sinjoro

estas tute nova Esperantisto, varbita de S-ro Bourlet, iu kuracisto el Varsovio, Doktoro Samenhof aŭ Zamenhof (mi ne konas la ĝustan ortografion). Cetere, dum ĉiuj kunvenoj, li aŭskultis tre atente la oratorojn, sed neniam petis parolon, kredeble pro sia nesperto en uzo de Esperanto.

La *Prezidanto* malfermas la kunsidon kaj diras, ke antaŭ ĉiu diskutado estas necese havi regularon. Li legas projekton de regularo kaj demandas, ĉu iu deziras paroli pri ĉi tiu regularo.

S-ro *Mudie* diras, ke laŭ la artikolo XI la kunsidantaro elektas du kalkulistojn por la kalkulo de la voĉdonoj; ĉi tiu nombro estas eble sufiĉa por la kongresoj, kies partoprenantoj ne estas multnombraj, sed ĝi estos tute nesufiĉa en la okazo, se la kongresanoj venos grandnombre. Li proponas, ke oni ne fiksi la nombron de la kalkulistoj.

Oni voĉdonas per levitaj manoj kun kontraŭprovo. La korekto estas akceptita.

Oni voĉdonas poste pri la tuto de la regularo, kiu estas unuanime aprobita.

S-ro *Chavet*, sekretario de la Kongreso, legas la protokolon de la malferma kunveno, kiu estas akceptita sen rimarkoj.

S-ro *Sharpe* diras, ke en la nuna Kongreso estas duspecaj delegitoj, unuj pagis la kotizaĵon difinitan de la Administra Konsilantaro, aliaj ne pagis ĝin. Ĉu ambaŭ specoj havos saman rajton pri voĉdonado.

S-ro *Bourlet*, vic-prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, respondas, ke, sekve de la neĉeesto de Generalo Sebert, prezidanto de la K. K. K., li estas la reprezentanto de ĉi tiu Komitato kaj devas paroli en ĝia nomo. Li donas la jenajn sciigojn pri la priparolita demando: La K. K. K. ne estas leĝdonanta, sed leĝplenumanta organo, sekve ĝi devas obei la regularon. Laŭ la regularo akceptita de la Antverpena Kongreso estas rajtigitaj delegitoj nur tiuj, kies grupoj pagis la laŭleĝan kotizon. Do, kiel vicprezidanto de la K. K. K. li devas kaj povas akcepti kiel voĉdonantojn nur ĉi tiujn delegitojn.

Sed laŭ sia privata opinio, li devas aldoni, ke en celo de paco kaj konkordo inter Esperantistoj kaj pro speciala karaktero de la nuna kongreso, jubilea kongreso, dum kiu ĉiuj koroj devas bati samtakte, estus tre bone, se la Prezidanto bonvolus demandi la rajtigitajn delegitojn (pagintajn), ĉu ili volas konsenti, ke la nepagintaj partoprenu la voĉdonojn. Ĉiam laŭ privata opinio li pensas, ke la pagintaj devus konsenti, ĉar en la

Krakova Kongreso devas regi paco. Cetere li esperas, ke post la klarigoj, kiuj estos liverataj al la Kongreso, ĉiuj grupoj akceptos la regularon kaj pagos la kotizon dum la venonta jaro.

La *Prezidanto* demandas la Kongreson, ĉu iu rajtigita delegito estas kontraŭ la propono. Neniu mano leviĝas. (*Aplaŭdoj.*)

S-ro *Chavet*, sekretario, petas, ke oni montru al li, kiamaniere li devos disdoni la voĉdonilojn al la nepagintaj delegitoj. La C. O. sendis al la grupoj rajtigilojn; inter la nepagintaj grupoj, unuj resendis la rajtigilojn, aliaj tute ne respondis. La sekretario opinias, ke oni devas doni voĉdonilojn nur al la delegitoj enskribitaj antaŭ la Kongreso.

La *Prezidanto* opinias, ke ĉiuj delegitoj, kiuj enskribiĝos nun, devas ricevi voĉdonilojn.

Laŭ S-ro *Mudie*, nur la jam enskribitaj devas esti konsiderataj kiel rajtigitaj delegitoj.

S-ro *Sergeant* klarigas, ke, ĉar li opiniis, ke laŭ la regularo oni devis pagi antaŭ la enskribo, tial lia grupo neestas enskribita. Ne intencante pagi, li ne sendis aliĝilon.

S-ro *Behrendt* opinias, ke oni devas akcepti ĉiujn delegitojn, kiuj prezentos laŭregularan rajtigilon. Oni devas rifuzi nur tiujn, kiuj povos nenion montri.

S-ro *Bourlet* aprobas la proponon de S-ro Behrendt kaj diras, ke oni devas submeti al la voĉdono de la rajtigitaj delegitoj la sekvantan proponon:

Ricevos voĉdonilojn la nepagintaj delegitoj, kiuj antaŭ mardo tagmeze alportos regulan rajtigilon subskribitan de la estraro de sia grupo.

S-ro *Krestanof* demandas, ĉu enskribante sin nun, oni devos poste pagi la kotizon.

S-ro *von Frenckell* diras, ke la pago aŭ nepago de kotizo estis ne persona, sed principa afero. Li demandas, ĉu la K. K. K. ne povos doni klarigojn, kiuj malaperigos ĉiujn dubojn. Li esperas, ke ĉi tiuj klarigoj estos tiel trafaj, ke, post aŭdado, la delegitoj jam ne rifuzos pagi tuj la kotizon.

S-ro *Bourlet* rimarkigas, ke la propono farita valoros nur por ĉi tiu Kongreso, sed ne por la aliaj. Ni deziras akcepti la nepagintajn delegitojn, sed tute ne postulas, ke ili pagu tuj.

S-ro *Lévi* opinias, ke la deviga pagado de kotizo por akiri rajton de voĉdono estas malbona afero. Oni decidis tion laŭ decido de kongreso, kiu tute ne povis reprezenti la tutan Esperantistaron, ĉar multaj grupoj ne povas sendi delegitojn kaj sekve ne estas reprezentataj.

La *Prezidanto* diras, ke la afero estis jam decidita de la Sepa Kongreso kaj jam ne estas en diskutado.

Li submetas al la voĉdono la tekston de la propono farita de S-ro Bourlet.

La propono estas unuanime aprobita.

Longaj aplaŭdoj sekvas ĉi tiun voĉdonon, kiu certigas pacon por la aliaj kunvenoj de la Kongreso.

La *Prezidanto* donas la parolon al S-ro Bourlet, kiu en la nomo de K. K. K. prezentos al la Kongreso kelkajn klarigojn pri la funkciado de niaj Oficialaj Institucioj.

S-ro *Bourlet* diras, ke laŭ la interna regularo de la kunsidoj la parolantoj povas paroli nur dum dek sinsekvantaj minutoj; ĉi tiu tempo tute ne sufiĉos por elĉerpi la pritraktotan temon.

S-ro *Chavet* rimarkigas, ke la raportantoj povas paroli pli ol dek minutojn.

La *Prezidanto* opinias, ke en la nuna okazo S-ro Bourlet ne estas raportanto kaj demandas la ĉeestantaron, ĉu la parolonto rajtos paroli dum nelimigita tempo.

Neniu kontraŭstaras.

S-ro *Bourlet* komence diras, ke la grizaj nuboj, kiuj lasttempe iom malheligis la esperantistan ĉielon, devas esti forpelataj per lojalaj klarigoj.

La malkonsento pri la organiza punkto estas nur pro principo. Multaj diras: ni ne volas doni monon, nesciante al kio utilos ĉi tiu mono.

La postulo estas tute rajta kaj tiuj, kiuj faris tiun kontraŭdiron estas tute pravaj.

Kiam la Unua Kongreso fondis niajn oficialajn instituciojn, t. e. la Lingvan Komitaton kaj la Konstantan Komitaton de la Kongresoj, ĝi forgesis nur unu aferon, tio estas doni al ili vivrimedojn. Ĉi tiu forgeso estis komprenebla, ĉar en la unua momento de nia komuna vivo, ni estis ankoraŭ tre nespertaj pri la organizado de tiaj institucioj. Tial D-ro Javal kaj Generalo Sebert private fondis la Centran Oficejon por ebligi la funkciadon de la du kreitaj komitatoj.

En Ĝenevo oni oficialigis C. O., sed oni ankoraŭ ne donis al ĝi monan subtenon. Generalo Sebert malavare daŭrigis sian materialan apogon por certigi la vivon de nia C. O. Eble li faris tion laŭ iom tro luksa maniero, sed ni ne povas lin kritiki, ĉar la mono eliris el lia propra poŝo. Ni povas nur lin danki pro ĉi tiuj montroj de malavareco.

La servojn de C. O. oni povas distranĉi en du partojn: la oficialajn, necesajn servojn, kaj la aliajn.

La unuaj konsistas el la servoj faritaj al la Lingva Komitato, la Akademio, la K. K. K.; la konservado de la Arĥivoj; la publikigado de Oficiala Gazeto. Ĉi tiuj servoj devas esti bazitaj sur niaj propagandaj societoj.

La aliaj servoj estas: la Bibliografio, la Statistiko, diversaj eldonaĵoj, kiel ekzemple la Tutmonda Jarlibro, k. t. p.

Ĉi tiuj lastaj servoj estas utilaj, sed ne necesaj. Ili povas esti kelkafoje tre utilaj. Oni povas citi interalie la partoprenadon en ekspozicioj. Dum la Brusela ekspozicio la C. O. starigis konstantan oficejon kun du oficistoj por reprezentado de Esperanto en la diversaj kongresoj. La rezultatoj por la propagando estis tre grandaj.

Sed multaj personoj diras: Vi petas de ĉiu Esperantisto nur 0,040 Sm. Kiel vi povas kun tia malgranda sumo konduki la aferon? Estas guto da akvo en la maro. C. O. ne povos vivi kaj restos en la mano de potencaj personoj.

La oratoro provos, ne per rezonado, sed per faktoj, pruvi ke la afero estas ebla.

Li prezentos projekton de buĝeto de la C. O.; tia projekto ne estas kaj ne povas esti tute firma, kaj en multaj punktoj oni estas devigata fari supozojn.

Oni kalkulos unue la enspezojn:

Estas proksimume 30 000 Esperantistoj enskribitaj en diversaj societoj. (En Antverpeno, 26 000 estis reprezentataj).

Kun kotizo de 0,040 Sm., oni tiel ricevos sumon da 1 200 Sm. Tia estas la tuta sumo enspezota per kotizoj.

Dua fonto de enspezo estos la abonoj al Oficiala Gazeto; nia centra organo entenas ĉiujn oficialajn raportojn kaj sciigojn. Ĉiuj grupoj devas nepre ĝin aboni. Nuntempe la plimulto el la abonantoj estas privatuloj kaj ilia nombro estas 800. En la estonteco, kun abonoj de grupoj kaj societoj, oni povas kalkuli minimume 2 000 abonantojn.

La prezo de la jara abono estante 2 Sm., la enspezoj elvenantaj el ĉi tiu fonto atingos la sumon da 4 000 Sm.

Ambaŭ fontoj kune (kotizoj kaj abonoj) liveros la tutan sumon da 5 200 Sm.

Sed estas prudente, dekalkuli de ĉi tiu sumo procenton da dek, por la diversaj elspezoj farotaj por enkasigo de kotizoj kaj abonoj.

Post dekalkulo restas neta sumo da 4 680 Sm.

Nun la elspezoj:

Por la funkciado de C. O. unu sola oficisto sufiĉos; oni povas taksi je 1 200 Sm. lian jaran salajron.

(*Voĉoj en la salono*: Ne sufiĉe, ne sufiĉe!)

Jes, estas sufiĉe; en Parizo oni povas facile trovi oficiston kun ĉiuj kvalitoj postulotaj de sekretario de C. O. por la dirita prezo. Por la loĝejo, du ĉambroj sufiĉas (unu por la atendejo, alia por la oficejo mem). Por luprezo, lumigado, hejtado kaj poŝtaj elspezoj, ni kalkulu 480 Sm.

Nun la elspezoj por eldonado de Oficiala Gazeto.

Ĝis nun O. G. estis presita ĉe tre bona, sed tre kara Pariza presisto, sed ne estas necese uzi tian presiston. La kosto de presado de 2 000 ekzempleroj, ĉe ordinara presisto, estos 120 Sm. ĉiumonate, sekve por tuta jaro 1 440 Sm. La poŝtaj elspezoj por sendo de la gazeto atingos 520 Sm.

Entute la elspezoj faras tuton da 3 640 Sm.

La diferenco inter la enspezoj kaj la elspezoj estas 1040 Sm., kio donas sufiĉan marĝenon por neantaŭviditaj okazoj.

Jen kion utilos la ricevita mono. Sed alia grava demando stariĝas: Kiu kontrolos la uzon de ĉi tiu mono?

Oni scias, ke en Barcelono estis kreata Internacia Konsilantaro, kiu poste fariĝis Administra Komitato, po unu ano por mil Esperantistoj. Ĝis nun ĉi tiu Komitato nenion faris, ĉar ion fari ĝi ne povis. Ĝi devis zorgi pri la enkasigita mono, sed en la kaso estis nenio. Nun ĝi povos kaj devos labori. La elspezoj faritaj kun via mono estos kontrolitaj de Administra Komitato, kies anoj estos elektitaj de ĉiuj grupoj. Laŭ nia

opinio, ĉi tiu Komitato devas enteni reprezentantojn de ĉiuj gravaj societoj kaj speciale la prezidantojn de niaj grandaj naciaj societoj; ĝi devas esti ĉiujare renovigita.

Resume, je iu difinita dato, ekzemple la 1-an de Januaro 1913, la fondintoj kaj subtenintoj de C. O. diros al la Esperantistaro: Jen institucio tute starigita, en plena funkciado. Prenu en ĝi la fakojn, kiujn vi deziras mem direkti. Ni transdonos ilin al vi kaj de tiam ili estos la propraĵo de la tuta Esperantistaro.

S-ro *von Frenckell* demandas, ĉu la Esperantistaro prenos C. O. kun ŝuldoj aŭ sen ŝuldoj.

S-ro *Bourlet* respondas, ke je la difinita dato C. O. estos transdonita sen ia ajn ŝuldo. Li finas la paroladon dirante, ke post ĉi tiuj klarigoj li pensas, ke ĉiuj duboj pri la mona afero forflugos en la ĉielon, ke ĉiuj grupoj akceptos la regularon, ke ĉiuj Esperantistoj pagos la modestan kotizon jam pagitan de 9000 el ili, kaj ke de nun ĉiama konkordo regos inter ĉiuj Esperantistoj. (*Longaj aplaŭdoj; la oratoro estas varme gratulata de siaj najbaroj.*)

Mi provis raporti senpartie la parolojn de S-ro Bourlet. Sed ĉi tiuj skribitaj vortoj ne povas fidele pentri la veran elokventecon de ĉi tiu lerta advokato de malfacila proceso, la mirindan arton, kun kiu li scias meti en helan lumigon la evidentajn aferojn kaj lasi en saĝa mallumo la dubajn punktojn.

Mi devas konfesi la eksterordinaran efekton sur la aŭskultantaro de ĉi tiuj elegantaj frazoj elirantaj el ora buŝo. Oro vokas oron. Post la parolado de S-ro Bourlet ĉiuj monuoj kvazaŭ sorĉe malfermiĝas kaj ŝilingoj, frankoj, markoj forflugas al la kaso de C. O., por formi en ĝi kvazaŭan moneran internacian kongreson.

S-ro *Sergeant* proklamas, ke li estas kontentega kaj tuj pagos. Li volas senprokraste meti sian kotizon sur la altaron de la konkordo (t. e. la verdan tapiŝon de la kongresa tablo).

Oni estas devigata moderigi lian pageman fervoron kaj lin resendi al la Kasisto.

S-ro *Mudie*, malpli flamiĝema, diras, ke antaŭ ses monatoj, la deviga pago estis tro frua. Oni volis unue nin pagigi kaj poste doni klarigojn. Oni metis la ĉevalon malantaŭ la veturilon. Li raportos al la Komitato de la Brita Asocio pri la nuna stato de l' afero kaj ĉi tiu Komitato decidus pri la sekvota konduto. Nur pro principo la Brita Asocio decidis la nepagon, kaj tute ne pro personaj motivoj. Cetere la postulita mono estas difinita nur por la funkciado de la Oficialaj Institucioj kaj ne por la kongresoj. La kongresoj devas esti memstaraj entreprenoj. Kelkaj el ili lasis profiton, aliaj deficiton.

Ekzistas kongresa kaso, kiu devas servi kiel reguligilo. Li opinias, ke la projekto de buĝeto de S-ro Bourlet estas tro optimista. Kredeble oni havos iom malpli da abonoj.

La *Sekretario* legas diversajn telegramojn, el kiuj unu de S-ino Rosa Junck, nia tipa elparolantino.

La *Prezidanto* fermas la kunsidon je la kvina.

Je la oka kaj duono, Jubilea Festvespero en la Malnova Teatro.

Kiam mi donas mian pluvombreton (kaj dudek helerojn) en la vestejo, la vestiblo estas jam plena de amaso belege vestita: frakoj, festroboj, juveloj; kun mia simpla ĵaketo, inter ĉi tiuj elegantaj gesinjoroj, mi similas kotan makulon sur lakita boto. Tute honta mi supreniras galope ĝis la pli alta galerio kaj min kaŝas en angulo. El ĉi tiu pinto la vido estas belega. La salono estas plena, plenega, superplenega; tra la malfermitaj pordoj la ĉeestantaro elfluas en la koridorojn. Maro da kapoj, unuj senharaj, aliaj multharaj, moviĝas malsupre kaj veraj ondoj trakuras ĉi tiun maron; ankoraŭ el ĝi supreniras senĉesa bruado farita de centoj da interparoladoj.

Subite la bruo mallaŭtiĝas kaj ĉesas. Sur la estrado aperis milita orkestro, kiu komencas la koncerton ludante «Polonezon» de Chopin.

Poste Krakova ĥoro akompanata de orkestro kantas la «Jubilean kantaton» de Grabowski, kiun la aŭtoro deklamis al ni hieraŭ en la fino de sia saluta parolado.

Mi ne bezonas paroli pri la entuziasmo, kiu sekvis la kantadon de ĉi tiu bela poezio, ankoraŭ pli ĉarma sub ĝia muzika vesto. Cetere oni devas rimarkigi, ke preskaŭ ĉiuj versaĵoj kantitaj aŭ deklamitaj dum ĉi tiu vespero estas verkoj aŭ tradukoj de nia amata poeto; la Jubilea Festvespero estis ne sole la festo de nia eks-Majstro, sed ankaŭ la glorigo de unu el niaj plej malnovaj kaj plej talentaj samideanoj, al kiu oni povas nepre doni la nomon de vera eminentulo.

La ĝenerala scivolo estis vekita de la titolo de la tria numero de l' menuo (mi volas diri de l' programo): «Solena parolado», kaj neniu nomo. Kiu parolos? Ne nia eks-Majstro, ĉar li subite mutiĝis. Eble S-ro Bourlet, nia ĉiutema parolanto. Eble S-ro Grabowski faros al ni novan poezian surprizon. Kaj ankaŭ ĉi tiu majesta adjektivo «solena» iom malkvietigas; soleneco kaj gajeco ne ĉiam iras brako ĉe brako. Eble aperos solena sinjoro, kiu el la pinto de sia soleneco solene solenigos ĉi tiun solenaĵon. Sed tute ne, sur la estrado aperas S-ro... Belmont, nia malnova Pola samideano. For la timon! La solena parolado estos solena nur per la nomo. Mi ne

povas detale raporti pri ĉi tiu sprita kaj amuza parolado; nur unu parton mi volas iom pritrakti, en kiu Belmont klarigas al ni, ke D-ro Zamenhof ne prenis laŭhazarde ion de ĉiu lingvo, sed ke tio estis farita laŭ peto de ĉarmaj junulinoj reprezentantaj ilian landon, kaj fine li diras:

«Sur pola tero mi ne povas silenti nur pri unu—kaj mi rajtigita estas aldoni nur unu, kio koncernas Polino.

Kaj fine alvenis PolinoKun larmoj en blua okul'Kaj diris: ĉu vi min forgesis?Pro kio respondu, saĝul'.Servado al landoj potencajNe estas ordono al Vi...Polujo ne estas perditaDum vivas ankoraŭ ja ni!...Kaj Majstro respondis: PolinoNeniam forgesos mi Vin...Mi estas ja filo de teroDe kiu vi estas filin'.Aŭskultu! plej granda en mondoMistero de l' viv' logaritm'Ho! estas batado de l' koroLa sanga akcento—la ritm'.Sur la antaŭlasta silaboLa pola stariĝas akcent',Ĝi estu do en Esperanto!...En ritmo vivadas la sent'...Kaj reĝas akcent' poezion,Ritm' estas la gaj' kaj dolor'...Pro tio en Lingv' EsperantoBatados la pola kor'!Kaj dum Esperanto travivos—En ĝia belsonharmoni'Travivos la pola akcentoLa ritmo de Pol-poezi'!...»

Kaj kredeble alian polan aferon, krom la akcento, D-ro Zamenhof metis en sian lingvon, ĉar Poloj lernas Esperanton kun mirinda facileco. Pri ĉi tiu punkto, mi volas rakonti al vi vojaĝan rememoron. Venante el Parizo, mi vojaĝis kun Pola junulino iranta al Varsovio kaj post kelke da tempo ni interbabilis. (Mi estas grizhara sinjoro tute sendanĝera por la junulinoj). Kompreneble, mi parolis pri Esperanto. Ankaŭ kompreneble, ĉar ŝi estis el Varsovio, ŝi nenion sciis pri Esperanto. (Neniu estas profeto en sia lando!). Mi montris al ŝi la tradukon de «Mazepa»; ŝi malfermis la libron kaj... ho mirego! ŝi komencis legi kun perfekta elparolado. Eble vi diros: ŝi vin mokis. En tia okazo mi estas ĉarmita... Sed pardonu! la najbaroj faras ŝt... ŝt kaj min rigardas kun teruraj okuloj. Ĵus komenciĝis la kantado de S-ino Ada Sari, kiu havas en la gorĝo mi ne scias, kiom da najtingaloj kaj silvioj. Tondrego de aplaŭdoj tradukas la sentojn inspiratajn al la aŭskultantaro de ĉi tiu magiistino.

Sed kio tuj okazos? Junuloj formas duoncirklon sur la scenejo; meze de ili oni metas malaltan kesteton, sur la kesteto stariĝas maljuna sinjoro kun bastono en la mano. Subite la maljunulo kolere levas la bastonon kaj per ĉiuj fortoj batas al la kapoj de la junuloj, kiuj tuj komencas kii. Sed kredeble la doloro ne estis granda, ĉar la krioj estas tre agrablaj, eĉ muzikaj. Kaj la malbona sinjoro sur la kesteto daŭrigas la gestadon. Jen li minacas dekstren, jen li minacas maldekstren, kaj ĉiufoje la minacata flanko krias kaj la ne minacata silentas. Momente li stariĝas sur pinto de la piedoj kaj movas brakojn kiel flugiloj; poste li pene levas imagan ŝarĝon; fine li faras rapidan geston per la manoj kvazaŭ li ĵetus pipron en la okulojn de la malfeliĉuloj; ĉi tiuj

ellasis lastan plendon kaj silentas. La malbonkora publiko aplaŭdas ĉi tiun kruelan sporton, kaj la barbara maljunulo senhonte salutas. La programo klarigas al mi, ke mi ĵus aŭdis la «Krakovan viran ĥoron» kaj ke la direktoro ne estas sinjoro barbara, sed S-ro Barabasz.

Nun jen S-ino Stanisława Wysocka, kiun ni aplaŭdos morgaŭ en «Mazepa». Ŝi deklamas du versaĵojn esperantigitajn de samideano, kies nomon mi ne bone memoras—ĝi komenciĝas per *G* kaj finiĝas per *i*—«Sur Jungfrau» kaj «Mi malĝojas, Sinjoro». Kaj aŭdante ĉi tiun lastan poezion, kiun S-ino Wysocka eldiris kun barelo da larmoj en la voĉo, mi revidas la malgrandan teatron de Boulogne-sur-Mer kaj S-ron Grabowski mem deklamanta la saman poezion. Kiel rapide forflugas la tempo, la iluzioj kaj la haroj!

Grandaj aplaŭdoj revenigas min de Boulogne al Krakovo en centono da sekundo. Vere la penso flugas ne malpli rapide ol la iluzioj.

Denove S-ino Sari ĵetas en ĉiujn angulojn de l' salono la perlojn de sia voĉo.

Sed jen ankoraŭ la batitaj junuloj kaj la batanta maljunulo, kaj dank' al la bastono de S-ro Barabasz la Krakova ĥoro nin ĉarmas per kolekto de polaj popolaj aŭ de popolaj polaj kantoj (laŭplaĉe). Ĉiuj estis esperantigitaj de samideano, kies nomon mi ne konas. Mi nur scias, ke estas *rabo* en la vorto. Unu el ili, titolita «Fajr-eligu hufumetoj» estis tre rimarkita. Oni uzis nian bonan prepozicion *ĝis* por imiti la bruon faritan de la dancantoj frotante la pargeton per la piedoj por preni la takton, laŭ pola kutimo. Kaj la kantistoj elpuŝis terurajn «ĝis, ĝis, ĝis». Atentu, sinjoroj! se vi uzas nian kompatindan prepozicion kun tia forto, vi ĝin eluzos ĝis la vokalo.

La «Espero», rekantata de la tuta ĉeestantaro, markis la finon de ĉi tiu neforgesinda vespero.

En la vestiblo juna studento staranta senmove sur seĝo portas sur la dorso afiŝon, per kiu ni estas sciigataj, ke la kunveno de la studentoj okazos tuj post la festo. Feliĉaj studentoj! Kiel diris poeto, kies nomon *vi* memoras:

Ĝoju, ĝoju ni, kolegoj, Dum ni junaj estas! Post plezura estanteco, Post malgaja maljuneco—Sole tero restas.

Mardon, la 13. de Aŭgusto.

—Hodiaŭ ripozo. Neniu kunveno de neniu Parlamento. Oni ne aŭdos paroladojn, oni ne aŭdos diskutojn, oni ne parolos pri malorganizaĵo centra aŭ organizaĵo malcentra.

Mi ne estos devigata skribi galope tedajn notojn; miaj oreloj ripozos, miaj fingroj ripozos, mia kapo ripozos, sed mia lango ne ripozos, ĉar mi intencas babileti, babili, babilegi kun ĉiu kaj kun ĉiuj. Hodiaŭ oni promenas sub la kamparo; jes, sub la kamparo, ĉar sur la programo montriĝas ĉi tiuj magiaj vortoj: *Ekskurso al salminejoj en Wieliczka*, kio tute ne signifas, ke iam oni faris kurson en la minejoj, sed ke posttagmeze ni promenos sub la tero.

Diversaj nelacigeblaj ist-aroj kunsidiĝis ĉi tiun matenon; la plej taŭga por la tago estis la Internacia Libertempa Asocio, kiu certe preparolis la hodiaŭan libertempon. Ankaŭ la Societo de la Virinoj havis sian unuan kunvenon; bedaŭrinde ĉi tiu interesa Asocio ne sukcesas trovi anojn, ĉar artikolo de ĝia regularo diras, ke la membrinoj devas esti almenaŭ tridekjaraj.

Fine la Lingva Komitato tenis solenan kunsidon.

Tagmezon.—En la stacidomo bruas, bruegas la kongresanoj, kiuj are invadas nian specialan vagonaron; jes, specialan, ĉar specialaj oficistoj nin kondukas al specialaj kupeoj de specialaj vagonoj formantaj specialan vagonaron tiratan de speciala lokomotivo kondukata de speciala meĥanikisto. Nur la reloj ne estas specialaj, ili estas komunaj reloj. Oni ne povas ĉion havi. Baldaŭ la longega vagonaro estas superplenega kaj la malfruintoj devas iri per alia vagonaro. Pli ol 1200 personoj partoprenis la ekskurson al Wieliczka. Ĉirkaŭ la unua la vagonaro pene ekmoviĝas kaj komencas iri al sia celo kun saĝa malrapideco. Atentu, meĥanikisto, vi kondukas Esperanton kaj ĝian sorton, sekvu zorge la vojon celitan: kelkajn metrojn ekster ĉi tiu vojo kaj Esperanto faros malantaŭan salton da dudekkvin jaroj.

Dum ĉi tiu mallonga vojaĝo afabla Polino rakontis al mi legendon pri la eltrovo de la salminejoj kaj ĉi tiu legendo estas tiel ĉarma, ke mi tuj rediros ĝin al vi:

Estis iam, antaŭ multaj, multaj jaroj, hungara reĝo, kiu havis belan, saĝan kaj pian filinon nomitan «Kingo». Kaj ĉi tiu junulino estis tiel virta kaj tiel pia, ke Dio donis al ŝi la povon fari miraklojn. En ĉi tiu tempo la reĝo de Polujo, Boleslavo Hontema, kiu multe aŭdis pri Sankta Kingo, petis de ŝia patro, ke ŝi fariĝu lia edzino. La hungara reĝo konsentis kaj Boleslavo sendis al la junulino multekostan fianĉigan ringon. La patro, kiu tre amis sian filinon, demandis, kion ŝi deziras kunporti kun si kiel doton. Cetere tute preta li estas, donaci al ŝi siajn plej belajn trezorojn. Sed, li miregis, kiam Kingo petis de li la salminejon de Hungarujo; unue li tre ridis pri ĉi tiu stranga peto, sed, ĉar la filino persistis en sia kaprico, li konsentis. Tiam la princino iris al la salminejo, demetis sian fianĉigan ringon kaj ĝin ĵetis en la salan profundegaĵon. Kiam ŝi alvenis Polujon, Boleslavo tre miris, tial ke ŝi plu ne havis la donitan ringon; tiam ŝi kondukis sian edzon en urbeton Wieliczka, kaj en difinita loko ŝi ordonis fosi profundan puton; tagon post tago, nokton post nokto fosis la laboristoj, kaj fine ili

alvenis al blanka tavolo tiel malmola, ke estis neeble daŭrigi la fosadon. Tiam Kingo ordonis alporti al ŝi pecon de la blanka tavolo, kaj la ĉeestantoj konstatis kun miro, ke ĝi estas sala ŝtoneto. La junulino ridetante rompigis la ŝtoneton, kaj—miraklo!—en la mezo kuŝis la fianĉiga ringo. La petita doto magie transportiĝis en Polujon....

«Wielicka! Wielicka! Ĉiuj eliĝu!» Krioj, bruo, muziko. Flagoj ornamas la stacidomon. Sur la perono nin atendas la urbestro; en bona Esperanto la urbestro deziras bonvenon al ĉiuj, D-ro Mikołajski respondas, kaj sekvante la muzikistaron de la salminejoj, la kongresanoj en kvaropaj vicoj sin direktas al la puto. Parto de la kongresanoj devas malsupreniri lifte, alia parto piede. Apud la lifto mineja oficisto diras al mi kelkajn polajn vortojn, mi tuj prezentas al li mian pluvombreton, sed li rifuzas; ne estas vestejo ĉi tie. Kial vi ridas? Ne estas ridinde. Vi mokas min, ĉar mi kunportis pluvombreton por promeni sub la kamparo. Vi diras eble, ke ne pluvas en minejo. Vi tute eraras; pluvis en la minejo kaj eĉ falis sala pluvo. Ne ĉie oni ricevas salan pluvon sur la kapon.

Post unu minuto la lifto nin malsuprenigas sur la unuan etaĝon de la minejo; ankoraŭ du etaĝoj malsuprenirotaj, kaj ve! suprenirotaj. Nun ni iras de mirindaĵo al mirindaĵo, de ĉambrego al ĉambrego, kaj ĉi tiuj ĉambregoj (malplenaj lokoj, en kiuj antaŭe sin trovis la salo), lumigitaj de centoj da lampoj, kies radioj estas resenditaj ĉiufanken de la minejaj ŝtonegoj ĉiukoloraj, oferas spektaklon nenie videblan kaj neniam forgeseblan. Kaj dum ni malsupreniras per galerioj, per ŝtuparoj, sur pontoj, la sonoj de l' muziko, kiu nin akompanas, venas el malproksime, resendita de roko al roko; kaj la arioj foje gajaj, foje malgajaj, akirantaj en ĉi tiu subteraĵo sonorecon tute specialan, faras impreson nedifineblan. Kaj ĉi tiuj lumoj, ĉi tiuj sonoj kuniĝas por formi plenan feston, feston de l' oreloj kaj feston de l' okuloj.

Jen la ĉambrego «Michalowice», la plej vasta el ĉiuj. La plafono subtenata de multaj lignaj pilastroj, havas altecon je 36 metroj. En la mezo pendas lustro el kristala salo. Ĉi tiu kavegaĵo, iluminata per koloraj bengalaj flamoj, liveras korpremantan impreson; la bruo de la konversacioj iom post iom mallaŭtiĝas kaj fine ĉiuj silentas sub mistera influo de la ĉirkaŭanta beleco.

Jen la «ĉambrego de imperiestro Francisko» kun salaj obeliskoj kaj belega sala pordego.

En la sekvanta ĉambrego «Drozdowice» troviĝas marmora tabulo, rememoraĵo de la 500-jara jubileo de la Krakova Universitato.

Jen la «ĉambrego de ĉefduko Frederiko» sur la tria etaĝo, je 135 metroj sub la tera supraĵo. Ĉi tie ni estas vere en la reĝlando de la gnomoj kaj de la koboldoj.... Sed kio moviĝas en fundo de ĉi tiu malluma galerio? Eble koboldoj, kiuj venas por vidi la

Esperantistojn; vi ne timas, ne; ni iru por vidi koboldojn kaj eble varbi ĉi tiujn misterajn estaĵojn.... Haltu! mi ekvidis konfuze blankan robon (robo de koboldo) kaj aŭdis brueton de kisoj.... Ni foriru sur pinto de piedoj, oni ne devas interrompi ĉi tiun koboldan idilion.

Fine, fine ni alvenas al la celo de nia ira vojaĝo, la stacidomo de la grafo Goluchowski. Kia feliĉo! Jen belega bufedo kun multe da bonaĵoj, oni povas manĝi, oni povas trinki, oni povas ripozi. En unua momento oni nur aŭdas bruon de makzeloj kaj de mandibuloj, tintadon de glasoj; sed iom post iom la malsataj satiĝas, la soifaj malsoifiĝas, kaj la babilemeco reprenas siajn rajtojn. La brueto de la konversacioj fariĝas unue bruvo, poste bruego, kaj fine tute kovras la sonojn de la muzikistoj, kiuj vane blovas en siaj muzikiloj per tutaj fortoj.

Ve! ve! oni donis signalon por la suprenirado. Pene kaj sopire la Esperantistaro komencas moviĝi. Malproksime, tre malproksime briletas lumetoj. Tien ni devas iri.

Tra densa mallumo briletas la celo, Al kiu kuraĝe ni iras. Simile al stelo en nokta ĉielo, Al ni la direkton ĝi diras.

Kaj la celo estas belega; ĝi estas la ĉambro de la ĉefduko Rudolfo kaj ĉefdukino Stefano, en kies mezo kuŝas subtera lago. En ĝiaj akvoj rebrilas la multaj lumoj, kiuj estas fiksitaj al la muroj de l' kaverno. El la plafono pendas belaj stalaktitoj de salo kaj el la lago stariĝas sala figuro de Sankta Johano Nepomuceno.

Ni reiru nian vojon; funde de galerioj oni ekvidas misterajn ombrojn; en kelkaj lokoj ne tro lumigitaj ni faletas sur reloj aŭ pecoj da ligno; mokemaj ministoj rigardas la ŝanceliĝe irantan kongresanaron. Ni iru, ni iru;

Ĉar nin ne timigas fantomoj la noktaj, Nek batoj de l' reloj, nek mokoj ministaj, Ĉar klara (?) kaj rekta kaj tre difinita Ĝi estas, la voj' elektita.

Atentu, atentu, sinjoroj! iru nek dekstren, nek maldekstren;

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, Ni iru la vojon celitan.

Jen kapelo de Sankta Kingo, en la preciza loko, kie oni trovis la faman ringon.

Ni iru, ni iru; atentu, gesinjoroj, falas salaj gutoj el la plafono, ne restu ĉi tie.

Eĉ guto malgranda, konstante frapante, Traboras ĉapelon pajlitan.

Ni iru, ni iru; ni paŝas malpli rapide; oni viŝas al si la frunton.

Ni ŝvitas kaj ŝvitas, neniam laciĝas, Pri l' tempo ripoza pensante. Cent paŝoj fariĝas, mil paŝoj fariĝas,—Ni ŝvitas kaj ŝvitas konstante.

Jam ĉarmaj sinjorinoj, lacegaj, pene spirantaj, sidas en ĉiuj anguloj.

«Ho, haltu!» petante virinoj admonas,—«Ne haltu, ne haltu!» en ĥoro resonas: «Obstine antaŭen!»

Jen la bala ĉambrego! sed la kruroj tute ne suferas pro dancaj tikloj.

Ni iru, ni iru; la gorĝoj fariĝas tre sekaj; kia feliĉo! milda aera blovo dolĉe karesas la varmajn vizaĝojn; momente ĉi tiu blovo fariĝas blovego kaj eĉ kunportas artefaritajn foliojn sur ĉapelon de sinjorino.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj Velkantajn foliojn deŝiras, Ni dankas la venton, kaj, repurigita, Ni forton pli freŝan akiras.

Ni iru, ni iru! ankoraŭ kelkaj minutoj de pena marŝado, kaj jen la eliro, jen la lumo, jen la celo.

Ni paŝo post paŝo, post longa laboro, Atingis la celon en ŝvito,—

kaj kun ĝojo la peklita kongresanaro revidas la belan sunon.

Ni reiru rapide al la stacidomo por retrovi nian specialan vagonaron, kiu saĝe nin atendas.

La forira horo estas la sesa; sed kiel okazas por ĉiuj specialaj vagonaroj, je la sesa kaj duono la nia ne forlasis ankoraŭ la stacidomon. Atendante la ekmoviĝon, ni promenu en la koridoro de l' vagonaro. Sed... ĉu estas vere la esperantista transportilo? En ĉi tiu kupeo oni parolas nur la lingvon de Byron, en tiu nur la lingvon de Victor Hugo, en ĉi tiu alia nur la lingvon de Goethe; mi ne sukcesas trovi la kupeon, en kiu oni parolas la lingvon de... Zamenhof. Kiel facile nia granda internacia rondo dispeciĝas en malgrandajn rondetojn naciajn! Samideanoj, samideanoj, en niaj esperantistaj kongresoj forkuru de viaj samlandanoj, kiel de la pesto! Alvenante la kongreson, lasu vian gepatran lingvon en la vestejo (kosto: dudek helerojn); vi ĝin retrovos sendifekta, kiam vi foriros.

Fine ni ekmoviĝas; sed nun la laceco kvietigas la langojn, iom post iom la bruo de la konversacioj malgrandiĝas, kaj estas vera fantoma vagonaro, kiu eniras la stacidomon de Krakovo je la sepa kaj duono.

La bravuloj iris ankoraŭ por ĉeesti Teatran Vesperon en la «Arĥitektura Ekspozicio». La ĉefaĵo de ĉi tiu Vespero estis la prezentado de «Urso», komedio en unu akto de Ĉeĥov, tradukita el la rusa lingvo de Devjatnin, kaj ludata de Germanino, Turko kaj Ruso (la tradukinto mem).

Ĉi tiun vesperon okazis ankaŭ kunveno de la Psikistoj. Oni diskutis pri mediumo, kiu en stato konvena parolas per tute nekonata lingvo. Unue oni kredis, ke ĉi tiu lingvo estis ĥina aŭ japana, sed estis eraro; poste oni pensis pri la lingvo de la libro Zend Avesta, ankaŭ tio ne estis; fine psikisto tre klera pri malnovaj lingvaĵoj eltrovis, ke ĉi tiu stranga idiomo estas Ido... en ĝia stato ĉirkaŭ la 1-a de Julio 1912. Kredeble Idisto tre lerta (povanta paroli sian lingvon), mortis en ĉi tiu epoko, kaj hodiaŭ lia spirito, per buŝo de la mediumo parolas ĉi tiun Idon, hodiaŭ nekompreneblan pro la multaj plibonigoj faritaj de post ĉi tiu malproksima dato.

Merkredon, la 14. de Aŭgusto.

—Dum la mateno, kunsidoj de multaj specialistoj. La plej gravaj estis tiuj de U. E. A. kaj de la kuracistoj. En la kuracista kunveno oni donis esperantaj nomojn al kelkaj nove elpensitaj malsanoj ne ankoraŭ kuraceblaj. Tio estas tre konsola sciigo, ĉar nun vi ne riskas morti per malsano sennoma, okazintaĵo, kiu igus vin tute ridinda.

Posttagmeze kunsidis ankaŭ Scienca Asocio; la plej rimarkinda fakto estis la ĉeesto en ĉi tiu kunsido de... scienculoj (Profesoro Cotton, Doktoro Bujwid, k. t. p.).

Je la tria kaj duono, Dua Labora Kunsido de la Kongreso.

La *Prezidanto* malfermas la kunsidon kaj petas la parolontojn, ke ili estu tre precizaj en siaj konkludoj.

La *Sekretario* legas la protokolon de la antaŭa kunsido, kiu estas akceptata sen rimarkoj.

La Sekretario poste legas la respondon de Lia Moŝto la Imperiestro de Aŭstrujo al la telegramo sendita antaŭhieraŭ. Ĉi tiu respondo, dezirante la sukceson de la laboroj de l' Kongreso, elvokas longan aplaŭdon.

Li legas poste kelkajn telegramojn senditajn al la Kongreso, ĉu de privataj esperantistoj, ĉu de grupoj. Tiu de la Bjelostoka Esperantista Grupo estas varme aplaŭdata.

La *Prezidanto* diras, ke laŭ la tagordo ni alvenas al Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato. Ĉi tiu raporto estas disdonita al ĉiuj kongresanoj, kiuj verŝajne ĝin jam legis. Sekve, kaj por ŝpari tempon, oni povus ne legi ĝin en la kunsido.

La *Sekretario* aldonas, ke la Lingva Komitato kunvenis hieraŭ, ke ĝi aprobis la raporton kaj priparolis diversajn aferojn.

Neniu petas parolon pri la Raporto, kiu estas aprobita.

La *Prezidanto* diras, ke nun ni venas al la raporto de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj donas la parolon al S-ro Bourlet.

S-ro *Bourlet* respondas, ke li jam donis en la lasta kunsido la necesajn klarigojn.

S-ro *Hansen* plene aprobas la antaŭhieraŭan paroladon de S-ro Bourlet kaj diras, ke por doni al ĉi tiu parolado la necesan konkludon, oni devas voĉdoni pri la jena propono:

«De la 1-a de Januaro 1913 la oficialaj fakoj de Centra Oficejo estos apartigataj de la neoficialaj. La unuaj estos transdonitaj sen ŝuldoj al la Esperantistaro, kiu ilin subtenos kaj administros per la Administra Komitato.»

Oni voĉdonas per manoj levitaj kun kontraŭprovo.

La propono estas unuanime akceptita. (*Aplaŭdoj.*)

S-ro *Mudie* konstatas, ke hodiaŭ oni voĉdonis nur per manoj levitaj, kaj, ke la propono estis unuanime voĉdonita.

La *Prezidanto* diras, ke nun oni venas al la Raporto de la Komisio por Ĝenerala Organizaĵo kaj donas la parolon al S-ro Rollet de l'Isle, vicprezidanto de ĉi tiu komisio.

S-ro *Rollet de l'Isle* legas resumon de la raporto de la Prezidanto de la Komisio kaj klarigas, ke pro malfavoraj kaj bedaŭrindaj cirkonstancoj la Subkomisio komisiata por esplori ĉiujn projektojn aŭ proponojn jam prezentitajn aŭ prezentotajn kaj por prepari raporton submetotan al la aprobo de la tuta komisio kaj poste publikigota en *Oficiala Gazeto*, ne povis fini sian laboron sufiĉan tempon antaŭ la Oka Kongreso. Sekve la Kongreso povas, se ĝi deziras, ekzameni kaj diskuti iajn montritajn projektojn, sed oni devas prokrasti ĝis la venonta kongreso ĉiun voĉdonon.

S-ro *von Frenckell* diras, ke kiom da kapoj, tiom da opinioj; kelkafoje kelkaj malsamaj opinioj en la sama kapo. Li opinias, ke oni devas studi la demandon pri ĝenerala organizaĵo de unu komisiono. Sed ĉi tiu komisiono ne povas bone funkciadi, se ĝiaj anoj estas disigitaj en diversaj landoj. Estas necese, ke ĉiuj anoj loĝu en la sama urbo. Eĉ estus pli bone, se oni elektus unu solan homon por fari projekton de ĝenerala organizado. Almenaŭ, se oni ne volas trudi ĉi tiun gravan taskon al sola homo, oni devas elekti komision de samurbanoj.

S-ro *Belmont* rimarkigas, ke la elektita homo povas malsaniĝi; oni devas ankaŭ elekti anstataŭanton.

S-ro *Mudie* proponas, ke oni prokrastu *sine die* la aferon. Cetere en okazo de neprokrastigo li opinias, ke la tasko estas tro peza ŝarĝo por la ŝultroj de sola homo. Oni devas elekti la anojn en diversaj landoj.

S-ro *Bourlet* principe tute konsentas kun S-ro *Mudie*. Ni devas prokrasti almenaŭ dum kelkaj jaroj la demandon pri ĝenerala organizaĵo. Estus pli bone konsideri la komision elektitan en Antverpeno kiel eksigintan. Ni devas atendi, ĝis kiam la demando estos pli matura kaj nuntempe provi la funkciadon de la ekzistantaj institucioj. Jam en Antverpeno ni havis nian *Parlamenton*, konsistantan el rajtigataj delegitoj. Ĉi tiu Parlamento funkciis ankaŭ ĉi tiun jaron kaj jam faris gravan laboron; sed estus bone, se antaŭ ol fari novan paŝon antaŭen, ni vidus, kiamaniere funkcias la kreita organismo. Ni devus fari novan ŝanĝon, se bezone, nur post tri aŭ kvar jaroj. Nia sistemo de institucioj ripozas sur la mona helpo de societoj, sed ni ne scias ankoraŭ, ĉu tiuj ĉi societoj alportos siajn kotizojn.

S-ro *Mudie* konfesas, ke li preferas la paroladon de S-ro *Bourlet* pli ol la sian propran.

S-ro *Heller* opinias, ke oni povas tuj decidi per jes aŭ ne, ĉu oni volas ĝeneralan organizaĵon. Ĉi tiu organizaĵo devus esti sendependa de U. E. A.

S-ro *Pazelt* estas konvinkita, ke ni bezonas ĝeneralan organizaĵon; ni devas havi centran lokon, el kie ni povos ricevi sendubajn informojn pri la ĝenerala movado kaj renkonti, se bezone, aliajn samideanojn. Ĉi tiu centra oficejo devus eldoni poŝlibron entenantan ĉiujn sciigojn necesajn al Esperantisto.

La *Prezidanto* memorigas, ke la diskutata temo estas: ĉu prokrasti aŭ ne la demandon pri ĝenerala organizaĵo?

S-ro *von Lidel* pensas, ke prokrasti la aferon estas la plej bona decido prenata. Se ni havus ĉiam la manon en la poŝo por disdoni propagandilojn, centra organizaĵo estus neutila.

D-ro *Kandt*, sekretario de la Komisiono por ĝenerala organizaĵo, defendas la subkomision. Oni diris, ke la anoj de ĉi tiu subkomisiono estas mallaboremuloj. Sed kelkafoje mallaboremo estas laboro. Nur la atenta tralegado de ĉiuj projektoj pri ĝenerala organizaĵo estis granda tasko. Ju pli da projektoj legis la oratoro, des pli liaj ideoj konfuziĝis. Ne estas eble labori sen buŝa interkomunikado, ĉu kun aŭtoroj de projektoj, ĉu kun aliaj komisionoj. La afero estas solvebla nur per kompromisoj; ne skribe oni povas atingi iun rezulton, sed nur buŝe.

D-ro *Mybs* diras, ke la laboro de la komisiono kredeble kontentigos nek la per-esperantistojn, nek la por-esperantistojn; oni devas daŭrigi la studadon.

La Germana Asocio esprimis la deziron, ke oni starigu ĝeneralan organizaĵon; li opinias, ke ankaŭ la plimulto de la Esperantistoj tion deziras. Oni devas konservi la komision, sed ne fiksi templanon por la fino de ĝia laboro.

S-ro *Mahn* tute kontraŭstaras la proponon de S-ro Bourlet. La daŭrigo de la laboro estas ebla: prokrasti la aferon estas tre danĝere.

S-ro *Anttila* opinias, ke la ekzistanta komisiono devas fini sian laboron. Sen organizo la enkonduko de Esperanto en oficialajn sferojn ne estas efektivebla. Kiu devas reprezenti la Esperantistaron apud la registaroj: ĉu la Lingva Komitato aŭ la K. K. K.?

S-ro *Bourlet* rimarkigas, ke li ne petis la tutan prokraston de la afero, li nur petis, ke oni ŝanĝu nian nunan organizaĵon, se bezone, nur post kelkaj jaroj.

De unu jaro li pripensas la aferon, kaj ju pli li pripensas, des pli ŝajnas al li, ke oni diskutas pri afero jam solvita.

La nuna afero prezentas du flankojn:

- 1-e Subtenado de niaj oficialaj institucioj;
- 2-e Reprezentado de niaj societoj.

Niaj oficialaj institucioj povas esti ordigataj laŭ tri ŝtupoj:

- **1-a ŝtupo:** La Esperantista Parlamento, konsistanta el niaj rajtigitaj delegitoj, demokrata bazo de ĉiuj aliaj institucioj.
- **2-a ŝtupo:** La Lingva Komitato, por la lingvaj demandoj; La Administra Komitato, por la financaj demandoj; La unua por la spiritaĵaj aferoj, la dua por la materialaj.
- **3-a ŝtupo:** La Akademio, elektita de la Lingva Komitato. La Konstanta Komitato de la Kongresoj;

La Centra Oficejo,—
ambaŭ elektitaj de la Administra Komitato.

Ni havas ĉion necesan. Nur mankas, ke ĉi tio funkcias. Ni havis la maŝinon, sed ni ne turnis la turnilon.

Por la dua celo oni volas fari unuiĝon de la Societoj; sed se la societoj ne volas unuiĝi? Ŝajnas, ke ankaŭ en ĉi tiu okazo oni metis la ĉevalon malantaŭ la veturilon. Ne ni, sed la societoj devas fari unuiĝon, se ili volas. Tio ne estas kongresa afero; la kongreso devas sin okupi nur pri la oficialaj institucioj.

S-ro *Mudie* proponas, ke la Kongreso esprimu la deziron, prokrasti la aferon pri ĝenerala organizaĵo kaj ke oni ne reelektu novan komision.

Koncerne la unuiĝon, tio dependas de la societoj; oni povus nur deziri, ke ili interrilatiĝu pli intime.

La *Prezidanto* submetas la antaŭan proponon al voĉdonado per manoj levitaj; la nombro de la levitaj manoj estas tre granda dum la provo kaj la kontraŭprovo. La voĉdono estante duba, oni decidas uzi voĉdonilojn. Oni komencas kolekti bultenojn, sed tuj S-ro *von Frenckell* leviĝas; li diras, ke la Germanoj bezonas interkonsiliĝi pri la propono farita kaj petas paŭzon.

La kunsido estas interrompita dum kvin minutoj. La ĉefoj de la Germana Asocio kuniĝas en apuda ĉambro.

La kunsido estas denove malfermata.

S-ro *von Frenckell* petas klarigojn pri uzo de la voĉdoniloj.

La *Sekretario* klarigas, ke la delegitoj devas voĉdoni per la bulteno 1 de sia voĉdonilo; ke la blankaj voĉdoniloj valoras unu voĉon, la verdaj kvin kaj la ruĝaj dek. Ekzemple, delegito kun sep voĉoj devas meti en bultenujon unu verdan bultenon kaj du blankajn.

S-ro *von Frenckell* petas la parolon por sciigi, ke li kun siaj amikoj voĉdonis kontraŭ la propono de S-ro *Mudie* nur, ĉar ili ne volas, ke oni reelektu novan komision.

La *Sekretario* diras, ke li ne komprenas bone la staton, en kiu ni estas. Ŝajnas, ke kelkaj delegitoj ne bone komprenis la sencon de la propono kaj voĉdonis por tuta prokrasto. Li opinias, ke oni devas bruligi la voĉdonilojn kaj daŭrigi la diskutadon.

S-ro *Mudie* estas preta forstreki la duan parton de la propono, se oni deziras tion.

La *Prezidanto* diras, ke voĉdonado per voĉdoniloj estas malfacila, longa kaj teda afero kaj ke oni devas ĝin uzi kiel eble plej malofte.

Li relegas la unuan parton de la propono kaj submetas ĝin al voĉdono per manoj levitaj. Ĉi tiu parto estas akceptita.

D-ro *Kandt* petas, ke oni ne nuligu la unuan voĉdonadon.

S-ro *von Frenckell* petas, ke en la propono oni forstreu la vortojn «kaj ne reelekti komision».

La propono kun ĉi tiu korekto estas unuanime akceptita^[7].

S-ro *Poncet* diras, ke la okazintaĵo de ĉi tiu kunsido montris gravan mankon en nia nuna kongresa organizacio. Ekzemple la Germanoj, kiuj havas nur unu solan multenombrian Asocion, povis tuj interkonsiliĝi, la Francoj ne povis same fari.

Por forigi ĉi tiun mankon, estus bone alpreni metodon similan al tiu proponita de S-ro Dejean. Ĉar ĉi tiu propono ne estis farita tri monatojn antaŭ la kongreso, oni ne povis ĝin oficiale prezenti.

Jen la aludita paragrafo:

«Dum la kongreso, la Rajtigataj Delegitoj studas la demandojn, ilin diskutas kaj elmetas dezirojn. Sed post la kongreso, tiuj deziroj povas esti submetataj al la aprobo de la grupoj laŭ metodo simila al tiu, kiu estis uzita por la elekto de la membroj de la Administra Komitato. Ili havas tiom da voĉoj, kiom da fojoj ili deklaris 25 membrojn. Oni ne povos apliki la dezirojn esprimitajn en la kongresoj antaŭ tiu ĉi konsulto.»

Ĉi tiu konsulto estus utila, ĉar oni scias, kiom estas malfacile tuj voĉdoni dum la kongreso.

Kolonelo *Pollen* diras, ke en la Kongreso estas nek Francoj, nek Germanoj, sed nur Esperantistoj.

La *Sekretario* legas diversajn telegramojn, inter kiuj unu de la Slava Societo.

S-ro *Mudie* proponas, ke oni aranĝu komunan senceremonian vespermanĝon en la bufedo de la Malnova Teatro antaŭ la balo.

La *Prezidanto* fermas la kunsidon je la kvina kaj duono.

Unu kvarono antaŭ la oka mi sidas en la nova teatro en mia vesto de drama kritikisto. Jes, de drama kritikisto. Vi ridas, sinjorino, des pli bone, ĉar oni vidas viajn belajn dentetojn; vi ridas, sinjoro, des pli malbone, ĉar oni vidas viajn malbelajn dentegojn.

Kial mi ne estus kritikisto? Arto estas malfacila, sed kritiko estas facila. Estas bona metio: neniu scio estas necesa. Cetere oni povas ĝin fari en sia domo; multaj kritikistoj neniam vidis la prezentadon de la recenzitaj teatraĵoj, aŭ kiam ili iras teatron, ili bone dormas sur siaj komfortaj seĝoj. Mi estas tre konscienca, mi ĉeestas la prezentadon kaj tute ne intencas dormi. Mi havas en mano mian kritikilon kaj fariĝas tre severmiena: mi decidis esti senkompata. Tremu, ombro de Słowacki; tremu, realaĵo de Grabowski; tremu, aktoraro; tremu, reĝisoro; tremu, sufloro. Vane la aŭtoro oferos al mi monon por laŭdi lian verkon^[8], mi estos el bronzo; vane la tradukinto petegos min surgenue, mi estos el marmoro; vane la ĉarmaj aktorinoj oferos al mi sian plej allogan rideton, mi estos el ligno^[9].

Iom post iom la salono pleniĝas, kaj kelkajn minutojn antaŭ la oka, ĝi estas plenega.

Ruĝaj libroj vidiĝas en manoj de multaj ĉeestantoj, kiuj intencas sekvi la tragedion sur la teksto. Bedaŭrinde unu minuton antaŭ la leviĝo de l' kurteno, ĉiuj lumoj de l' salono estingiĝas kaj la kompatindaj libruloj devas fermi siajn librojn. La sama afero okazis en Dresdeno. Konkludo: ĉiam legu kaj relegu la ludotaĵon antaŭ la prezentado, precipe kiam ĝi estas versaĵo. En versaĵoj la frazoj estas ofte tre fleksitaj, ne havas ĉiam, pro postulo de la ritmo, aspekton tute naturan, multaj vortoj estas senvostaj kaj ne estas facile sekvi la penson de l' aŭtoro, kiam oni aŭdas la tekston la unuan fojon. La esperantaj prezentadoj ne okazas tre ofte, kaj estas necese sin meti en staton konvenan por eltiri el ili la plej eble grandan profiton. Sed la kurteno leviĝas aŭ pli bone flankeniĝas; *Mazepa* ĵus komenciĝis.

La dramon aŭ tragedion (laŭ la titola esprimo) mi ne rakontos, ĉar ĉiu povas kaj eĉ devas legi tiun ĉi belan verkon.

En sia recenzo de *Kaatje*, teatraĵo ludita dum la Antverpena Kongreso, S-ro Era diris, ke la aŭtoro de *Kaatje* ne estis Goethe, *Kaatje* ne estis *Ifigenio en Taŭrido*, kaj S-ro Van der Biest, la tradukinto, ne estis Zamenhof. Simile mi povos diri, ke Słowacki ne estas Victor Hugo, *Mazepa* ne estas *Hernani* aŭ *Ruy Blas*, sed Grabowski estas preskaŭ Zamenhof. Efektive, konsiderinte la periodon, en kiu estis skribita la dramo, periodo, kiu vidis la aperon de multaj romantikaj verkoj, la nomo de la franca poeto venas nature en la spiriton, kaj liaj dramoj prezentiĝas kiel kompariloj. Ĉiu verkisto metas devige en sian verkon pensmanieron, ideojn, kiuj apartenas al la tempo, en kiu li vivis, al la mondo, kiu lin ĉirkaŭis. Ju pli ĉi tiuj markoj de difinita epoko estas maloftaj, des pli la verko havas signifon sendependan de la jaro de sia naskiĝo. Tre malmultaj estas la aŭtoroj, la poetoj, kiuj prosperis doni al la esprimo de sia penso

formon tiel altan, tiel spiritan, ke ĉi tiu esprimo fariĝis sendependa de la tempo kaj de la nacieco. Malmultaj estas la verkoj, kiuj ĉiam restas junaj kaj ne montras ĉi tie kaj tie simptomojn de velko. Ĉe Victor Hugo ili jam aperas en kelkaj lokoj. Ni devas diri, ke en la dramo de Słowacki ĉi tiuj simptomoj montriĝas tre forte. La verko estas nun sepdekdujara kaj ĝia aĝo estas jam legebla sur ĝia vizaĝo; ĝi ofertas multe da belegaj scenoj, sed la interligo de ĉi tiuj scenoj estas ofte nenatura; la aŭtoro uzis en la konstruo de la tragedio la procedojn de la romantika epoko, sed Słowacki, pli poeto ol dramverkisto, ne ĉiam ilin uzis kun necesa modereco. Iafoje oni tro vidas la ŝnuretojn, per kiuj la aŭtoro movigas siajn heroojn; en aliaj okazoj la personoj agas iom blinde, kvazaŭ iliaj ŝnuretoj estus rompitaĵoj. Sed kiel pentristo de sentoj Słowacki estas nekomparebla kaj enigas nin profunde en la koron de la homoj. Tial la elekto de ĉi tiu klasika dramo de la pola teatro estas tute aprobinda kaj tute akordiĝis kun la ĝenerala karaktero de la Kongreso. Ne rekte ni vidis ĉi tiun artan verkon, sed tra la Grabowski'a vitraĵo; laŭ tio, kion diris niaj polaj amikoj, ĉi tiu estis vere glata vitraĵo kaj ne lenso; la traviditaj objektoj, karakteroj aŭ sentoj ne estis grandigitaj, malgrandigitaj aŭ aliformigitaj. Ni ricevis vere fotografaĵon de la originalo.

Plenan laŭdon sen iu ajn kritiketo ni ŝuldas al S-ro Stanislawski, kiu ludis la rolon de Mazepa. Perfekte elparolanta Esperanton, li estis ĉiam mirinde komprenebla; eĉ en la malfacila sceno, kiam Mazepa rakontas sian aventuron en la alkovo, per voĉo mallaŭta de duone morta viro, ĉiuj vortoj estis aŭdeblaj, neniuj sono perdiĝis. Ludanta laŭ sobra maniero, sen neutilaj gestoj, S-ro Stanislawski tre bone esprimis la karakteron de la paĝio, kiu sub sia ventkapuleco kaŝas kavaliran animon kaj kompateman koron.

S-ro Sosnowski, la vojevodo, havis malfacilan kaj antipatian rolon. Preskaŭ dum kvar aktoj li muĝas, kaj certe la muĝado kaj la terura barbo, kiu ornamis lian mentonon, ne estis tre favoraj kondiĉoj de bona elparolado, tial multe da versoj alvenis iom kripligitaj al la oreloj de la aŭskultantoj; tamen S-ro Sosnowski bone tradukis la sovaĝan karakteron de ĉi tiu maljunulo obstina en sia venĝemo, kiu dissemas ĉirkaŭ si la malfeliĉon kaj la morton.

S-ro Marjanski montris al ni Zbignjev'on senteman, sed kun animo malkvieta, en kiu batalas seninterrompe la pasio kaj la devo, kaj kiu fine serĉas en la morto solvon de la terura dilemo, en kiu li baraktas. En la sceno de la alkovo li mirinde tradukis la sentojn de la vojevodido, kiu sin oferdonas por virino amata, kiun li kredas kulpa. Lia esperanta elparolado, malpli bona ol tiu de S-ro Stanislawski, estis tamen sufiĉa kaj tre komprenebla.

S-ro Jednowski, en rolo de la reĝo, lerte desegnis la egoistan karakteron de Jan Kazimir, kiu, sen malboneco ofertas la honoron, eble la vivon de siaj servantoj al kontentigo de siaj kapricoj.

Sincerajn gratulojn al S-ino Visocka pro ŝia belega interpretado de la rolo de Amelja. Ŝia voĉo varma, emociplena, laŭvice fariĝis gaja, plenda, indigna, malespera kaj en ĉiuj aliformiĝoj restis klara kaj belsona. En multaj scenoj ŝi nin vere kortuŝis kaj montriĝis vera artistino, en la plej alta senco de ĉi tiu vorto. Nur unu kritiketon ni faros; momente S-ino Visocka havas gestojn, sintenadojn iom nenaturajn kaj tro rigardas la plafonon.

Nun venu ĉi tien, sinjoro Reĝisoro, mi tuj «lavos al vi la kapon».

Vi scias (pli bone ol mi), kiom estas delikataj kaj malfacilaj la vere tragediaj scenoj, kiel la lastaj scenoj de *Mazepa*; ĉi tie ni estas en la belegeco, kaj inter la belegeco kaj la... ridindeco estas limo pli maldika, ol la paperfolio, sur kiu mi skribas. Pli ol unu fojon, dum la lasta akto mi tremis, timante, ke oni transpasos ĉi tiun teruran limon. Kaj nur vi, sinjoro Reĝisoro estis kulpa pri tio. Unue, ni vidis dum la unuaj aktoj grandan vivantan Zbignjev, kaj nun vi alportas tute malgrandan ĉerkon, en kiu estas neeble meti pli ol duonon da Zbignjev. Kie oni metis la alian duonon? Kaj ĉi tiun ĉerketon oni kuŝigas en grandega salono tute lumigita, kie ĝi similas forgesitan skatolon da domenoj! Due, la vojevodo faras per ĉi tiu skatolo ĉiuspecajn gimnastikajn ekzercojn, li ĝin metas laŭlarĝe, laŭlonge, oblikve, li ĝin tiras, puŝas; momente mi ne plu sciis, ĉu ni estis en la palaco de la vojevodo aŭ en Krakova stacidomo, ĉambro de la pakaĵoj. Feliĉe vi havis, kiel ĉeestantojn, bravajn Esperantistojn, kiuj nur deziras aŭdi sian karan lingvon kaj ne multe atentis pri materialaj detaloj. Tamen, sinjoro Reĝisoro, grandigu vian ĉerkon, malgrandigu kaj mallumigu vian scenejon kaj iom ŝanĝu la aranĝon de via lasta akto. El Parizo, kie ripozas liaj restaĵoj, Słowacki mem vin benos.

Mi ne povas kritiki la sufloron, ĉar mi lin tute ne aŭdis; kredeble la aktoraro neniam bezonis lian helpon.

La falo de l' kurteno, post la kvina akto, estis sekvita de sennombraj aplaŭdaroj, oni ĝin relevis mi ne scias kiom da fojoj. Fine S-ro Grabowski sur la scenejo, en la nomo de la Esperantistaro, dankis la aktorojn pri la belega spektaklo, kiun ni ĵus ĉeestis. Li diris, ke de nun *Mazepa*, ĉi tiu perlo de la pola dramaro, fariĝis internacia verko, kiun povos ĝui personoj de ĉiuj nacioj, kaj ke ĉi tiu prezentado estas difinitiva glorigo de la jam fama pola poeto.

Lasta konsilo: kiam vi iros teatron en Krakovo, dum la interakto reprenu vian lokon tuj kiam oni sonoriĝas, ĉar kelkajn minutojn antaŭ la leviĝo de l' kurteno oni estingas ĉiujn lumojn en la salono. Se vi malfruas, vi devas reiri vian lokon tra mallumo. Tiu malfeliĉo okazis al mi, kaj mi atingis mian seĝon nur post teruraj aventuroj, palpinte kiel blindulo ĉu la pintan barbon de S-ro Bourlet, kiu murmuris, ĉu la freŝajn vangetojn de fraŭlino, kiu ellasis krion, kaj paŝinte sur nekalkulebla nombro da piedoj.

Ĵaŭdon, la 15. de Aŭgusto.

—Frumatene mi estis vekita per la sonoriloj de la kvardek unu preĝejoj de la «pola Romo», samtempe bruantaj. Momente mi aŭskultis la gajan muzikon de la sonoradoj, kiu rememorigis al mi la faman ĉapitron de la romano de Victor Hugo «Nia Sinjorino Pariza»^[10]. Sed konscio pri la profesiaj devoj tuj revenas, mi saltas el la lito kaj enprofundiĝas en la legon de la oficiala programo. Je la naŭa horo katolika Diservo, je la deka samtempe protestanta kaj hebrea Diservoj; je la dekdua devis okazi manovroj de «Ruĝa Kruco», sed, pro neĉeesto de la direktantoj, ĉi tiuj manovroj estis forigitaj.

Ni rapidu al la preĝejo de Sankta Mario; ĝuste kiam mi alvenas sur la Rynek, estas la naŭa. El unu el la preĝejoj turoj venas sonoj de trumpetoj; efektive, ĉiuhore trumpetisto laŭvice rigardanta la kvar kardinalajn punktojn, aŭdigas melankolian arion, laŭdire la saman, kiun uzis la pola militistaro. Kiam ni eniras la preĝejon, la navo estas jam superplenega de granda amaso, kaj pene oni eniĝas inter la popolanoj pitoreske vestitaj, kaj la kamparaj vendistinoj, kiuj alportis kun si vendotajn legomojn aŭ fruktojn. Tia devis esti en antikvo la aspekto de temploj, kiam la adorantoj alportis la oferojn difinitajn por la Diino. Fine ni sukcesas atingi la fundan kapelon, ĵus kiam komenciĝas la prediko. Devis paroli Lia Episkopa Moŝto pastro Bandurski, vera pola Demosteno, sed pro malhelpo, li estis anstataŭata de pastro, kiu eble ne estis Demosteno, sed certe estis Cicero. Kun flamenco de apostolo li parolis klaran, puran, fluan Esperanton, eĉ momente tiel fluan, ke la supersŭtitaj oreloj ne povis ĉion ensorbi kaj ke multaj vortoj reŝprucis eksteren. Tamen lian elokventecon tre admiris la ĉeestantaj Esperantistoj, katolikaj kaj nekatolikaj.

Ni rapidu al la hebrea sinagogo. La interna aspekto tute malsimilas tiun de la katolika preĝejo. Anstataŭ pitoreska malordo, severa ordo; anstataŭ piuloj en ĉiuj sintenadoj, ĉu starantaj, ĉu genuantaj, ĉu eĉ teren kuŝiĝantaj, sinjoroj en regulaj vicoj kun ĉapelo sur la kapo, sinjorinoj en altaj galerioj. Rabeno Saphra jam komencis esperantan paroladon; li parolas klare, bonege kaj elokvente; li diras, ke Hebreoj disaj sur la tuta terglobo jam havis propran lingvon por komuniki inter si, la hebrean; sed mankis al ili alia por komuniki kun iliaj fratoj, anoj de aliaj religioj. Li ĝojas, vidante unu el ili alporti al la mondo ĉi tiun netakseblan donacon. Profundan impreson sur ĉiujn ĉeestantojn hebreajn aŭ nehebreajn faras ĉi tiu alta parolado. Sed momente Rabeno Saphra parolis strangan, nekompreneblan Esperanton. Ĉu intertempe li fariĝas Idisto? Oni klarigas al mi, ke la strangaj vortoj ne estas idaj citaĵoj de Couturat, sed hebreaj citaĵoj el la Biblio. Elirante el la sinagogo, la popolamaso ĉirkaŭanta la templon, faris al D-ro Zamenhof veran ovacion. La kvartalo Kazimierz, kie staras la sinagogo, estas la hebrea kvartalo de Krakovo; en ĝi la Hebreoj estas pli ol religio, pli ol raso, ili formas preskaŭ nacieton, kaj ĝojis vidante la kreinton de Esperanto, kiun ili salutis kvazaŭ Mesion.

Je la dekunua, sur la Rynek okazis manifestado antaŭ la monumento de la glora pola poeto Mickiewicz. Oni metis sur la monumenton florkronon, kaj en la nomo de la kongresanoj S-ro Hodler esprimis la sentojn de la Esperantistoj pri la plej glora reprezentanto de la pola genio kaj antaŭtempa adepto de la interna ideo de Esperantismo; tiun paroladon polen tradukis D-ro Mikołajski.

Je la tria, manifestado de profesoroj kaj studentoj apud la monumento de Kopernik, en la korto de Jagellona Biblioteko. Atendante la oficialan oratoron (ankoraŭ nekonatan), kiu estas iom malfruinta, la manifestantoj amuziĝas per fotografiĝo. Estas fotografistoj en ĉiuj anguloj, sur la altaj galerioj, sur la korto, en la kelo, kaj oni fotografas la manifestadon ĉiumaniere: superkape, bruste, dorse, flanke, subpiede. Subite bruo; sur la tablo metita kiel paroladejo aperas la oficiala oratoro, kaj ĉi tiu oratoro estas... (vi ne divenu! sinjoro), estas... (vi ne divenu! sinjorino), estas S-ro Bourlet. Oni premas la butonon de la sciencaj paroladoj kaj S-ro Bourlet parolas. Cetere li faras tre lertan kaj tre trafan paralelon inter la vivo de Kopernik kaj la vivo de D-ro Zamenhof, inter la persekutoj, per kiuj estis akceptata la verko de Kopernik, kaj la moko, kiujn renkontis la verko de Zamenhof, inter la fina sukceso de la Kopernikaj ideoj kaj la fina venko de la Zamenhofa Esperanto.

Je la kvara (kia metio! kia metio!), vizitado de la Arĥitektura Ekspozicio. En la ĝardeno de la Ekspozicio, la fotografa manio de la kongresanaro atingas la paroksismon. La oficialaj fotografistoj estas ĉi tie kun ĉiuspecaj fotografiloj, unuj sur altaj tripiedoj (kredeble por fotografi personojn je fenestroj de unua etaĝo), aliaj preskaŭ sur tero (kredeble por fotografi kelistojn je fenestretoj de ilia kelo). Kaj oni fotografas samnacionojn, oni fotografas samprofesiulojn, oni fotografas samkreskulojn, oni fotografas samaĝulojn, oni fotografas sama-nombro-da-harulojn, oni fotografas samulojn elektitajn ĉiumaniere kaj eĉ neniumaniere. Kaj meze de ĉiu grupo sidas la afablega kaj bonega Doktoro, ĉiam ridetanta, ĉiam nemoviĝanta, ĉiam rigardanta rekte la fotografilon. Sinsekve li fariĝas Hungaro, Japano, juristo, poŝtisto, du-metrulo, dekok-jarulo kaj eĉ pacifista sinjorino. Feliĉe je la kvina finiĝas lia turmentigo kaj ĉiuj kongresanoj, fotografitaj aŭ ne fotografitaj, sidiĝas duonrondede ĉirkaŭ la muzika estrado por ĉeesti la Disdonon de Premioj de la «Literatura Konkurso» organizita de nia bonega kolego *Pola Esperantisto*. Ni diru tuj, ke ĉi tiu konkurso mirinde sukcesis, almenaŭ per la nombro de la partoprenantoj. Efektive, la Komitato ricevis: por la beletristika parto, 18 laborojn; por la poezia, 30; por la scienca, 11. S-ro Nedoviŝin prezidas la ceremonion, li diras kelkajn vortojn pri la graveco de tiaj konkursoj kaj iliaj influoj al progresado de nia lingvo.

Pro la neĉeesto de S-ro Cart, raportinto de la beletristika parto, supreniras la estradon por lin anstataŭi sinjoro... (divenu, kara leganto!) sinjoro... (divenu, kara legantino!)... S-ro Bourlet. Oni premas la butonon por literatura parolado kaj S-ro Bourlet ekmovas la lipojn. «Ankoraŭ mi!» li diras. Li petas pardonon, ĉar nun li estas sur kampo, kiun li

ne ordinare plugas. Li estas simpla scienculo kaj time sin riskas en literaturan regionon. Sed eble ĉar li estas direktoro de literatura gazeto, li povis tamen akiri iom da sperto en la beletristika fako. Li ĝojas, ĉar nun Esperanto havas belan kaj riĉan literaturon, kaj povas rebati la kutiman kontraŭdiron, ke ĝi estas nur iu ĵargono de kelnero.

La unua premio estas aljuĝita al la aŭtoro de la verko titolita: «La Genio kaj la Karaktero de Byron»; oni malfermas la koverton, kiu entenas la nomon de la aŭtoro, kaj la ĉeestantaro sciiĝas kun ĝojo, ke ĉi tiu aŭtoro estas aŭtorino: nia bone konata samideanino Adela Schafer (el Londono).

Loko mankas por citi aliajn rekompencitajn laborojn.

S-ro Grabowski, raportinto de la poezia parto, legas raporton (mirinde! ĉi tiu raporto estas en prozo). Li diras, ke esprimo de ideoj sub poezia formo estas vera provilo por lingvo; Esperanto venke sukcesis en ĉi tiu provo. Ni sciiĝas kun bedaŭro, ke ne ankoraŭ naskiĝis esperanta Mickiewicz, kaj sekve oni ne donos unuan premion. La dua premio estas aljuĝita al la aŭtoro de la poemo «Narciso», kaj ĉi tiu aŭtoro estas nia amiko Devjatnin, kies apero sur la estrado estas salutata de longa aplaŭdado.

S-ro Rollet de l'Isle, raportinto de la scienca parto, legas raporton. Kiel Prezidanto de la Societo Franca por Propagando de Esperanto, li malkaŝe montras al ĉiuj sian naciecon, fiere kaj forte metante la tonikan akcenton sur la lastan silabon. Li parolas pri la graveco de Esperanto en sciencaj interrilatoj kaj sciencaj kongresoj.

La unua premio estas aljuĝita al la aŭtoro de la verko: «Pri la absorbo de la pluvo kaj roso per folioj, trunketoj kaj branĉoj». Ĉi tiu aŭtoro estas nia samideano Dreusicke, el Cassel.

Ĉu tiaj konkursoj estas bonaj por la propagando de nia afero? Unuavide ŝajnas, ke la respondo devas esti jesa. Evidente ĝi ne povas esti plene nea; sed ankaŭ, laŭ mia opinio, ĝi ne povas esti plene jesa. Efektive, ni rigardu la nunan staton de nia esperanta literaturo; ĉu ĉi tiu stato estas bona? Ne, nia literaturo suferas de malsano kaj ĉi tiu malsano ne estas manko de verkistoj, ĝi estas manko de... legantoj. Rigardu en magazenoj de eldonistoj.... Sed tuj vi protestas: «Esperanto... sankta afero... bono de homaro... ni ne estas komercistoj... veraj Esperantistoj ne atentigas monan profiton, k. t. p....» Kvietiĝu, sinjoro, kvietiĝu kaj ni interparolu trankvile. Mi ne estas verkisto, mi ne estas eldonisto, mi ne estas presisto kaj ĝis nun Esperanto ne enirigis en mian poŝon eĉ la plej malgrandan parton de spesmilo. Do mi estas tute senpartia. Ĝis nun oni ne trovis la rimedon por publikigi esperantajn librojn sen mono. La fabrikisto de papero ne liveras senpage sian paperon, la presisto ne presas senpage la manuskriptojn. La eldonado de libro estas devige elspezo da mono; kvankam la

eldonantoj de esperantaj libroj estis ĝis nun tre neprofitemaj, ili almenaŭ deziras retrovi la elspezitan monon. Afero neebila, se ĉiuj ekzempleroj restas en la magazeno. Literaturo ne povas ekzisti sen verkistoj; ankaŭ ĝi ne povas ekzisti sen legantoj. Kaj tio estas konstato ĉagrena, sed konstato vera: Esperantistoj ne legas. Sed vi respondos: «Legado de libroj postulas tempon kaj monon, Esperantistoj ĝenerale estas nek senokupuloj, nek riĉuloj». Vi estas prava, sed mi certigas, ke la sumo elspezita de la Esperantistaro por aĉeto de libroj tute ne respondas je la stato de ĝia monujo. Ankoraŭ vi diros: «Estas bonaj libroj, sed ankaŭ aliaj malbonaj; mi timas aĉeti librojn nekorekte skribitajn». Tre vere, sed mi konstatis, ke sufiĉe granda nombro de Esperantistoj tute ne scias eĉ la nomon de jam klasikaj verkoj de nia literaturo. Karaj gesamideanoj, se vi deziras, ke Esperanta literaturo disvolviĝadu, ĝin helpu per viaj tutaj fortoj; kaj por tio la sola rimedo estas: legado kaj legado kaj ankoraŭ legado. Apud la bona konkurso de verkistoj, mi proponas, por la venonta kongreso, konkurson de legantoj.

Je la naŭa kaj duono, Internacia Balo en la Malnova Teatro.

Antaŭ mia foriro, S-ro Ĉefredaktoro estis dirinta al mi: «Vi prenos kiel modelon S-ron Era; kiel li faris, tiel vi faros». Mi malfermis la Raporton pri la Sepa Kongreso kaj pri la balo mi trovis la jenan paragrafon:

«Ĉiuj estas pretaj je la naŭa, kaj la dancoj tuj komenciĝas. Ili daŭris ĝis la unua matene, laŭ tio, kion oni diris al mi, ĉar je tiu malfrua horo, mi jam de longe dormegadis.»

... Leginte ĉi tiujn liniojn, mi tuj iris kuŝiĝi.

Sed la morgaŭan tagon mi «intervjuis» eminentulojn, kiuj ĉeestis la ceremonion.

Jen kion diris al mi kelnero de la bufedo:

«Je la sepa okazis komuna manĝeto organizita de tre moviĝema sinjoro, kies nomon mi ne memoras; mi nur scias, ke por elparoli ĉi tiun nomon oni devas «miaŭi». Oni manĝis barĉon, kolbason polan kaj tortojn. Kelkaj personoj ne tre ŝatis nian kolbason; eĉ germana sinjorino faris veran grimacon. La ĉeestantoj multe bruegis, ili faris ĉiuspecajn ŝercojn, kantis kaj deklamis. La nombro de la ĉeestantoj estis ĉirkaŭe 200, la nombro de la purigotaj teleroj estis...»

—Sufiĉe; sufiĉe, kelnero, mi ne ŝatas la statistikon.

Jen kion rakontis al mi sinjorino de la vestejo, vi scias, la terura rabistino de pluvombreloj:

«Ha! sinjoro, kiom da manteloj! kiom da kaptukoj! kiom da pluv... (mi scias, mi scias)... kaj kiaj belaj kostumoj de sinjorinoj kaj de sinjoroj! Hungarinoj kaj Hungaroj, Bohemoj, Rusoj, Bulgaroj, k. t. p.^[11] kaj precipe niaj Polaj kostumoj, tiel ĉarmaj. Sed la plej bela rememoro de ĉi tiu vespero kaj eĉ de mia tuta vivo estos la gardo de la mantelo de la Imperiestro Napoleono. (Kion vi diras, sinjorino! Eble la laceco pro maldormo.) Jes, la Imperiestro ĉeestis la balon; li portis la kutiman veston, blankan mallongan pantalonon, verdan veŝton, epoletojn kaj la tufeton sur la frunto. (Se li havis la tufeton, oni ne povas plu dubi.) La ekzakta nombro de la objektoj deponitaj en la vestejo estas...»

—Sufiĉe, sufiĉe, sinjorino, mi ne ŝatas la statistikon.

Jen kion rakontis al mi muzikisto de l' orkestro:

«Ha! sinjoro! en kia stato ni estas hodiaŭ. La violonistoj kuŝas en lito kun paralizitaj brakoj, la violonĉelisto pro lacego falis hieraŭ sub sian instrumenton kaj estis tute kontuzita, la klarnetisto englutis parton de sia muzikilo, la hoboĵisto ne plu havas pulmojn, la tamburegisto faris truon en la haŭton de sia ilo kaj la kuracistoj ne povas haltigi la brakon de la muzikestro, kiu daŭrigas montri la takton. La preciza nombro de la notoj...»

—Sufiĉe, sufiĉe, muzikisto, mi ne ŝatas la statistikon.

Jen kion murmuretis en mian orelon la servistino de la sinjorina tualetejo...

—Kio! sinjoro, vi alproksimiĝas kun scivolema mieno kaj brila rigardo? Fi! estas honte!—vi tute ne scios, kion murmuretis al mi en la orelon la servistino de la sinjorina tualetejo.

Vendredon, la 16. de Aŭgusto.

—Je la tria kaj duono, Tria labora kunsido de la Kongreso.

La *Prezidanto* malfermas la kunvenon kaj donas la parolon al S-ro Sekretario.

La *Sekretario* legas la protokolon de la lasta kunsido, kiu estas unuanime aprobita; li ankaŭ legas diversajn telegramojn.

S-ro *von Frenckell* legas sian raporton pri fondo de por-esperanta Internacia Esperanto-Asocio.

D-ro *Kandt* post kelkaj klarigoj pri la tasko de la Komisio pri ĝenerala organizaĵo, proponas la jenan tekston:

«La rajtigita delegitoj de la propagandaj societoj en la Oka Kongreso decidis:

1-e Ke la Komisio elektita en Antverpeno por studi la demandon pri ĝenerala organizaĵo daŭru funkcii;

2-e Ke ĝi prezentu al la Naŭa Kongreso raporton pri la nun ekzistantaj institucioj, pri ilia funkciado kaj pri rimedoj por ilin kunordigi;

3-e Ke oni publikigu tiun raporton tri monatojn antaŭ la Kongreso kaj ke oni proponu pri ĝenerala organizaĵo.»

S-ro *Bourlet* principe konsentas kun S-ro *von Frenckell* kaj D-ro *Kandt*, ĉar li estas partiano de ĝenerala organizaĵo. Sed la sperto montris, ke ne estas saĝe doni tro da laboro al la Komisio. La subkomisio kaj D-ro *Kandt* faris ĉion eblan, ni ŝuldas al ili multajn dankojn. Vere la afero estas tro komplika. Pli bone estos iri paŝon post paŝo; la unua paŝo estas la dua paragrafo: Raporto pri la nunaj institucioj; meti ordon en la aferojn. Antaŭ ol scii, kion oni povos fari, oni devas scii, kion oni faris; tiam oni scios, kion oni devos fari. Ni ne donu al la Komisio tro da laboro deviga. Li do faras la jenan proponon aŭ korekton: forstreki en la 3-a paragrafo la vortojn «kaj ke oni proponu pri ĝenerala organizaĵo».

D-ro *Kandt* akceptas la proponon de S-ro *Bourlet*.

S-ro *Mudie* estas subtenanto de la propono de S-ro *Bourlet*. Li ne volis fari riproĉon al iu ajn en sia hieraŭa propono.

La propono de S-ro *Kandt* kun korekto de S-ro *Bourlet* estas unuanime akceptata.

S-ro *Mudie* parolas pri la prezento de kandidatoj al la diversaj postenoj en la komitatoj. Li diras, ke oni devas havi almenaŭ liston da 13 kandidatoj por 10 postenoj, se oni volas havi veran elekton.

La afero estas lasata al la Komisio.

S-ro *Bourlet* diras, ke estas ankoraŭ du proponoj senditaj al la K. K. K.:

1-e Propono, por ke oni nomu la kongresojn universalaj anstataŭ internaciaj.

2-e Propono, ke la kongresoj okazu nur ĉiudujare.

La proponoj estas resenditaj al la Komitato.

S-ro *Bourlet* esprimas sian grandan feliĉon, ke, kiam por la unua fojo kunvenis la rajtigita delegitaro, ĝi tiel bone funkciis. Ĉiuj proponoj estis voĉdonitaj unuanime. Esperantujo estas loko interfrata kaj la ĉeestantoj donis al la tuta Esperantistaro spektaklon de vera konkordo. (*Aplaŭdoj.*)

La *Prezidanto* diras, ke nun oni venas al la demando pri la sidejo de la venonta kongreso.

S-ro *Stromboli* petas parolon, kaj lia apero sur la estrado estas signalo de longa aplaŭdado^[12]. En la nomo de Italaj Esperantistoj li petas la Kongreson, ke la Naŭa Kongreso okazos en Genova. Li jam faris la inviton dum la malferma kunsido kaj ĝin faras denove, aldonante kelkajn detalojn. Italujo, lando de l' arto, lando de la poezio, deziras kaj estas inda, ricevi sur sian teron la tutmondan Esperantistaron. La Italoj kredas, ke Esperanto estas simila al itala lingvo kaj sekve estas malfacila por aliaj popoloj. Ni montru al ili per nedubinda fakto, ke Esperanto estas same facile ellernebla por ĉiuj lingvanoj. Genova estas bone elektita loko por internacia kongreso, ĉar ĝi havas facilajn komunikaĵojn kun ĉiuj landoj de Eŭropo; rapidaj vagonaroj kaj rektaj vagonoj venas al Genova de multaj grandaj urboj. Aliparte, ĝi estas ankaŭ granda haveno, kun ŝiplinioj al ĉiuj partoj de l' terglobo. Fine, ĝi estas granda kaj bela urbo; la amantoj de la pasinto trovas en ĝi antikvajn monumentojn kaj historiajn rememorojn; la amantoj de la naturo povos viziti en ĉirkaŭaĵo ĉiuspecajn naturajn belaĵojn; la amantoj de la civilizado vidos tre interesajn industriajn aferojn. Sub la blua ĉielo, rigardante la bluan maron, la kongresanoj povos gaje resonigi nian karan lingvon, kies belsoneco agrable miksiĝos kun la belsoneco de la itala lingvo. (*Ĉiumanaj aplaŭdoj.*)

S-ro *Lederman* (Holando), en nomo de la grupo «Estonto estas nia», protestas kontraŭ la diro dissemita, ke la Holandaj Esperantistoj proponis ne fari kongreson en Italujo pro la milito. Tio estas malvera.

S-ro *Behrendt* bone scias, ke la Esperantistoj estos altirataj de la multaj ĉarmoj de Genova kaj kredeble voĉdonos por Italujo, sed li estas komisiita de la urbestro de Breslau por inviti la kongreson en Breslau la venontan jaron kaj li devas fari la inviton. Almenaŭ li esperas, ke multaj kongresanoj sur la vojo al Italujo haltos en Breslau. Li proponas sendi dankleteron al la urbestro de Breslau por ĝia kora invito.

S-ro *Mudie* aprobas la proponon de S-ro Stromboli, sed parolante pri komunikaĵoj kun aliaj landoj, nia itala samideano forgesis Britujon. Lasttempe la oratoro legis pri itala

militŝipo nomita «Stromboli». Li proponas, ke oni petu Lian Moŝton la Reĝon de Italujo, ke li sendu la ŝipon «Stromboli» por transporti Britojn al Genova. (*Ridoj kaj aplaŭdoj.*)

S-ro *Lévy* invitas la kongreson en nomo de la Rumanaj Esperantistoj. Li diras, ke Bukarest estas centro por nia movado en la Balkanoj.

S-ro *** bohema laboristo diras, ke en nomo de laboristoj li devas protesti kontraŭ la elekto de Italujo, ĉi tiu lando, kiu sovaĝe sin ĵetis.... (*Brueto, bruo, bruego. La oratoro malaperas meze de protestoj*)^[13].

La *Prezidanto* rimarkigas, ke laŭ la regularo oni devas tuŝi en kongresaj kunsidoj nek religiajn, nek politikajn, nek socialajn demandojn. Li esperas, ke la ekzemplo donita de la ĵus parolinta oratoro ne estos sekvita.

S-ro *Iu ajn* (de ie ajn) proponas, ke oni faru ĉiujare du kongresojn, unu por amuzo kaj la dua por laboro.

La *Prezidanto* voĉdonigas pri ĉi tiu stranga propono, kiu tamen akiras du voĉojn.

Oni poste voĉdonas pri la sidejo de la venonta kongreso.

Genova estas elektita kun frakasa plimulto.

Oni ankaŭ sendas dankojn al Breslau por ĝia senlaca invito.

S-ro *Bourlet* diras, ke kvankam la kutimo estas elekti nur la sidejon de la venonta kongreso, li petas, ke oni faru escepton kaj ke oni tuj decidu por 1914. Li venas oficiale inviti la kongreson al Parizo en 1914.

S-ro *Rollet de l'Isle*, prezidanto de la S. F. P. E., certigas la ĉeestantaron, ke ili ricevos bonegan akcepton ne sole de la Parizaj Esperantistoj, sed ankaŭ de la tuta Franca Esperantistaro kunigita en Parizo. Ĉi tiu grava okazintaĵo faros profundan impreson en tuta Francujo.

Parizo estas elektita kiel sidejo de la Deko Kongreso.

S-ro *Warden* (Skotlando) invitas la kongreson ĉe Edinburg por 1915.

La *Sekretario* diras, ke la K. K. K. ricevis oficialan inviton de la urbo San Francisco por elekti ĉi tiun urbon kiel sidejon de la dekunua Kongreso, okaze de la inaŭguracio de la Kanalo de Panama.

S-ro *Schmidt* proponas, ke la kongreso de 1915 okazu en Berno.

S-ro *Krestanof* diras, ke la centro de la Balkanoj estas ne Bukarest, sed Sofio. Li invitas la kongreson al Sofio.

S-ro *Hansen* invitas la kongreson al Kopenhago.

S-ro *Bourlet* rememorigas, ke en la K. K. K. devas esti du personoj de la lando, en kiu okazos la kongreso. Li proponas:

Por la naŭa kongreso:

- D-ro Stromboli
- S-ro Benova.

Por la deka kongreso:

- S-ro Rollet de l'Isle
- S-ro Chaussegros.

Neniu kontraŭstaras.

S-ro *Soriano* proponas sendi dankojn al la Ĥina Ministro de Edukado, kiu oficiale enkondukis Esperanton en la normalajn lernejojn.

S-ro *Bourlet* proponas, sendi dankojn al la du urboj Terrasa kaj Sabadell, kiuj donis la nomon de D-ro Zamenhof al stratoj.

S-ro *Ferter*, rajtigita delegito por Katalunujo, dankas por la gratuloj senditaj.

S-ro *Hansen* proponas, ke oni danku S-ron Michelin por lia belega donaco al Esperanto.

S-ro *Bourlet* rakontas, ke S-ro Michelin ricevis leteron de ĉef-idisto, kiu lin riproĉis pro la mono donita al Esperanto kaj kiu diris, ke Esperanto tute ne ekzistas. Li proponas, ke ĉiu kongresano sendu al S-ro Michelin poŝtkarton kun kelkaj dankaj vortoj.

S-ro *Mudie* proponas danki la Biblian Societon, kiu ĵus eldonis tradukon de la Biblio en Esperanto.

S-ro *Sergeant* proponas, ke oni danku la Aŭstran Ministron de la Fervojoj por eldonado de la belaj gvidlibroj disdonitaj al la kongresanoj kaj por la rabato konsentita.

S-ro *Claudius Colas*, de la C. O., donas klarigojn pri la lasta verko de ĉi tiu oficiala Institucio. La produktaĵo estas la Tutmonda Jarlibro Esperantista, enhavanta kolekton de niaj leĝoj kaj liston de ĉiuj grupoj de l' mondo. Post ĉiu geografia nomo staras interkrampoj misteraj ciferoj, kiuj (laŭ la antaŭparolo) estas bibliografiaj indeksoj de la decimala klasifiko. Kaj vidu la utilecon de ĉi tiuj ciferoj: dank' al ili oni tute solvis la gravan demandon pri skribado kaj elparolado de la propraj nomoj. Ekzemple mi povas sciigi vin, ke por iri al la Kongreso, mi foriris de la ĉefurbo de 44.362, iris al la ĉefurbo de 44.361 kaj tie uzis la vagonaron al ĉefurbo de 43.12. Dum la vojaĝo, mi trapasis la landojn 493 kaj 43. De la ĉefurbo de 43.12, mi rekte iris al la kongresurbo, ĉefurbo de 43.74 en la lando 43.6. Ĉiuj popoloj same elparolas ĉi tiujn geografiajn nomojn. Cetere, se vi deziras mendi la libron de via libristo, vi nur bezonos doni al li tiun sciigon: 412 (058) (∞) «1912» 12. Li tuj komprenos.

La *Prezidanto* proponas, ke pro la Esperantistoj, kiuj deziras forveturi morgaŭ tuj post la kunsido, oni fiksas la komencon de la kunveno je la tria anstataŭ la tria kaj duono.

Li fermas la nunan kunsidon je la sesa.

Je la sepa kaj duono, mi sidis en la Nova Teatro en mia vesto de muzika kritikisto. Jes, de muzika kritikisto. Vi ridegas, sinjorino? des pli bone, ĉar oni vidas vian beletan langeton; vi ridegas, sinjoro? des pli malbone, ĉar oni vidas vian malbelegan langegon. Kial mi ne estus muzika kritikisto? Tial ke mi nenion scias pri muziko? Bela afero! Mi legis la muzikan terminaron de S-ro de Ménil. Estas sufiĉe.

Mi havas en mano mian aŭdigan kornon. (En Francujo, mi estas surda kiel potu, en Anglujo kiel fosto, en Italujo kiel kloŝo, en Hungarujo kiel pafilego, en Polujo... mi ne scias.)

Iom post iom la salono pleniĝas. Ĉi tiu vespero devas esti epokfaranta en la historio de Esperanto. «Halka» estos la unua esperanta opero kaj Moniuszko la unua komponisto, kies verko ricevos esperantan maskon. Ĉu tiu privata entrepreno de la direktoro de Krakova teatro sukcesos? Respondo la teatra kasisto. Ŝajnis al mi, ke la aŭskultantaro kvankam ne tiel granda, kiel ĉe «Mazepa», estis tamen sufiĉe grava. Mi devas aldoni, ke du pagaj prezentadoj dum unu kongreso, estas ŝarĝo iom peza por la monujo de multaj el la kongresanoj. Tamen la nuna entrepreno estas interesa kaj subteninda.

Sed la orkestro iras al sia loko, la ĉefo levas la bastonon, «Halka» komenciĝas. (Vere la muzikistoj estas strangaj personoj, ili laboras nur, kiam ilin minacas bastono.)

La libreto de «Halka», kiel la plej multo el la libretoj de operoj, estas tre simpla kaj estas entenata en unu linio: Halka, kamparanino, forlasita de sia amanto, kiu edziĝas kun riĉa fraŭlino, sin ĵetas en riveron.

Sur ĉi tiu temo Moniuszko^[14]

Post la prezentado, la talenta tradukinto, nia senlaca poeto Grabowski, venis sur la scenejon por danki la gekantistojn de la unua esperanta opero. Sennombraj ovacioj kaj bruegaj aplaŭdoj rekompencis samtempe tradukinton kaj aktorojn por ilia kuraĝa provo.

Sabaton, la 17. de Aŭgusto.

—Je la tria, Ferma kunsido de la Kongreso.

La *Sekretario* legas respondan telegramon de S-ro Boirac.

La nova Esperantisto Zamenhof petas la parolon kaj suriras la estradon. Li anoncas, ke li ĵus legis pri la morto de Abato Schleyer. Jam la pasintan jaron la famo pri lia morto disvastiĝis en Antverpeno, sed feliĉe estis malvera. Hodiaŭ oni ne povas dubi pri la sciigo. Kelkafoje en la pasintaj kongresoj li parolis pri la graveco de la verko farita de ĉi tiu pioniro de lingvo internacia.

Li proponas al la ĉeestantaro honori lian memoron per leviĝo de la seĝoj. (*Ĉiuj leviĝas.*)

S-ro *Pazelt* en nomo de la german-bohema Esperantista Ligo oferas al D-ro Zamenhof belan albumon, kiel memoraĵon de la Jubileo. Li aldonas dezirojn de vivo kaj feliĉo.

S-ro *Lévy* (blindulo) parolas pri esperanta movado inter blinduloj. Li esprimas la dankemon de ĉiuj siaj blindaj gefratoj por la sindonemaj personoj, kiuj penetrigis Esperanton en la blindulan mondon. Ili faris multekostan donacon. Li memorigas la nomojn de F-ino Zabilon d'Her (S-ino Ranfaing), Profesoro Cart, k. t. p. Li deziras prezenti al la naŭa Kongreso raporton pri la du jenaj punktoj:

1-e Ĉu la kongresoj povas interesiĝi je la blinduloj;

2-e En kia maniero estas eble, ke ili faru ion.

La blinduloj estas disaj en ĉiuj urboj de siaj landoj, en ĉiuj landoj de l' mondo; Esperanto estas vera ligilo inter ĉiuj loĝantoj de la blindula mondo.

Ĝis nun nur privataj personoj starigis specialan fakon por la blinduloj. Profesoro Cart fondis *Esperanta Ligilo*, kio estis granda helpo farita al ĝiaj uzantoj. (*Aplaŭdoj*). Sed la publikigo de gazeto kaj libroj por blinduloj estas peza ŝarĝo. Malgraŭ sia bonvolo, la subtenantoj havas aliajn gravajn okupojn kaj ne povas ĉiam private daŭrigi sian verkon. Eble oni povos oficiale helpi al ili, ekzemple per kreado de Centra Biblioteko por la blinduloj.

La afero estas resendita al la K. K. K.

S-ro *Belmont* parolas pri Abato Schleyer. Li rememorigas, ke ĉi tiu viro faris tre gravan verkon en la kampo de lingvo internacia. Li estis vera amiko de la homaro.

La oratoro proponas sendi al la urbestro de Konstanz funebran telegramon. (*Akceptita de la Kongreso.*)

S-ro *Ernst* anoncas Esperantan semajnon, kiu okazos en Gento dum la tiea ekspozicio.

S-ro *Bourlet* aldonas, ke la ekspozicia estraro de Gento voĉdonis gravan monhelpon por la Esperanta semajno.

S-ro *Devjatnin*, kiu, nova Homero, venis piede el Paris, transdonas la salutojn de la Esperantistaj grupoj vizititaj dum lia vojaĝo.

S-ro *Salomea Pattowa* salutas la Kongreson en la nomo de la Krakovaninoj kaj de la Pacifistinoj.

S-ro *Kandt* dankas la ĉi tiean Komercon Ĉambron. Li petas, ke Esperanto estu reprezentata de Varsovia samideano en la Kongreso de la Komercistoj okazonta en Bostono kaj parolas pri ĝenerala organizado de la komercistoj.

S-ro *Nedoŝivin* diras, ke oni ne devas forgesi la neĉeestantojn, el kiuj konsistas la plej granda parto de la Esperantistaro. Li invitas ĉiujn kongresanojn vojaĝi tra Rusujo. (S-ro Nedoviŝin forgesinte alporti pasporton por via humila servanto, ĉi tiu ne povis akcepti la afablan inviton.)

S-ro *Schmidt* avertas la Esperantistojn, ke ili ne aliĝu al la Mondlingva Oficejo en Berno, kiu havas nur ŝajnan neŭtralecon, sed estas efektive Idista entrepreno, pri kies sukceso dubas la prezidanto mem.

Li proponas aranĝi antaŭkongreson en Berno.

S-ro *Behrendt* parolas pri la enkonduko de Esperanto ĉe la poŝtistoj kaj petas adresojn de poŝtoficiistoj.

S-ro *Pazelt* atentigas pri gvidlibro de Franzensbad kaj la tie okazonta postkongreso, dum kiu oni povos sin bani senpage.

S-ro *Mudie* diras, ke oni ne fonografis la voĉon de nia Majstro dum ĉi tiu Kongreso; li opinias, ke oni devas tuj ripari ĉi tiun mankon.

La *Prezidanto* ĝojas, ĉar dum la tuta semajno regis inter ni simpatio frata. Kredeble en estonteco:

La popoloj faros en konsentoUnu grandan rondon familian,—

sed atendante la Esperantistoj mem devas komenci ĉi tiun rondon. Li pensas, ke de nun ĉesos ĉiuj diskutoj. Li dankas al ĉiuj, kiuj helpis al la Kongreso: urbeŝtraro, registaro, loĝantoj de Krakovo.

Ĝis revido en Genova! (*Longa aklamado.*)

S-ro *Glück* (el Wien) laŭdas la aranĝon de l' Kongreso; ĝi estis la kongreso de l' amo, de la paco kaj de la konkordo; ĝi havis kiel devizon: unueco kun ordo. Ni memoru, ke la dua parto de l' Fundamento estas la sankta konkordo. En la historio de Esperanto la nomo Krakovo estos enskribita per oraj literoj. Li ofertas al la Loka Komitato albumon subskribitan de ĉiuj kongresanoj kaj atestantan pri ilia dankado pro la aranĝo de tiel grandioza kaj sukcesplena manifestado.

Napoleono... pardonu! S-ro Rosenstock petas la parolon meze de varmega ovacio. Li diras, ke hieraŭ sur la nigra tabulo oni afiŝis, ke estas promesite, rekompenci tiun, kiu retrovos la perditan voĉon de S-ro Rosenstock. Li meritas la rekompencon, ĉar li mem retrovis la voĉon. Li estimos sin alte repagata por siaj klopodoj, se ĉiuj kongresanoj foriras kun bona rememoro de Polujo. Poloj estis ĉiam gastamaj al fremduloj; kiom pli ili devas esti gastamaj, kiam ĉi tiuj fremduloj estas tiaj nur per la nomo, kiam ili estas Esperantistoj, kiuj ĉie estas en sia lando. Ĉu en ĉi tiu direkto la Poloj faris sian devon? Al tio respondos la kongresanaro.

D-ro *Bujwid* dankas la kongresanojn en la nomo de la Loka Komitato.

S-ro *Mudie* dankas S-ron Mikołajski pro la lerta kondukado de l' Kongreso kaj gratulas la Lokan Komitaton pro la bona organizado de l' Kongreso.

S-ro *Kronenberg* diras, ke Esperantisto estas ĉiu homo kiu uzas Esperanton, sed Esperantisto estas ankaŭ tiu, kiu propagandas la internan ideon, kiu nin unuigas.

Oni devas propagandi ĉie kaj ĉiam kaj precipe inter la junularo; kiu havas la junularon havas la estontecon. Vivu la Esperantismo inter la Esperantistoj.

(Ĉiuj leviĝas kaj laŭ la kutimo, oni kantas nian esperantan himnon.)

D-ro *Zamenhof* deziras al ĉiuj kongresanoj bonan reiran vojaĝon al sia hejmo. Li diras, ke ni eniras duan periodon de nia movado; li estas certa, ke de nun ĉiu malpaco malaperos el nia tendaro kaj ke ni iros trankvile nian vojon.

La *Prezidanto* fermas la Okan Kongreson de Esperanto.

En la vestiblo bruas por la lasta fojo la tuta kongresanaro. Oni adiaŭas, oni manpremas, kaj ĉiuflanke resonas la krioj: «Ĝis la revido! ĝis la revido en Genova!» Kaj tuj poste okazas stranga fenomeno. Kiel se feino tuŝus la kongresejon per sia bastono, Esperantistoj malaperas el Krakovo. Unuj tuj foriras al Budapeŝto, kie komenciĝos la dimanĉon mem Katolika Esperantista Kongreso; aliaj preparas sian valizon por foriri morgaŭ frumatene al Zakopane, en kiu okazos tritaga ekskurso. Kaj nur restas en la urbo la esperantaj flagoj kaj la esperantaj afiŝoj, kiel postsignoj de nia trapaso. Sed ne sole materialajn postsignojn lasos en Krakovo la Esperanta Kongreso, la ĵetitaj semoj fruktiĝos kaj la bonaj Krakovaj ĝardenistoj, kiuj sciis krei la «Plantaciojn», ankaŭ scios kreskigi Esperantan arbon branĉoriĉan kaj fruktodonan.

Apud Krakovo staras artefarita monteto konstruita de la Krakovanoj por honori la memoron de Kościuszko, la heroon de Pola sendependeco. Oni rakontas, ke ĉiuj loĝantoj, riĉaj aŭ malriĉaj, potencaj aŭ humilaj, konsideris kiel honoron labori por ĉi tiu konstruado. Studentoj manumis ŝovelilojn kaj profesoroj puŝis radportilojn. Eĉ la plej nobelaj sinjorinoj, la plej junaj infanoj alportis sian pecon da tero, simbolon de amo kaj sindono al la komuna patrujo.

Similaj al ĉi tiuj Polaj patriotoj, ni, Esperantistoj, alportu ĉiuj nian pecon da tero al la konstruaĵo, kiun ni penas starigi por la estonta progreso de la homaro. Ĉiuj, riĉaj aŭ malriĉaj, potencaj aŭ humilaj, maljunaj aŭ junaj, virinoj kaj infanoj, ni laboru laŭ nia povo, laŭ niaj fortoj. Tia estas la instruado, kiun kunportos el Krakovo tiuj, kiuj havis la honoron resonigi Esperanton, vivantan lingvon en vivanta Polujo.



Reklamoj

Kongresaj Raportoj

aparte presitaj
eltiritaj el *Lingvo Internacia*.

Oficiala Protokolaro de la unua Kongreso, en Boulogne » 30

Raporto pri la unua Kongreso de Esperanto (*elvendita*)

Raporto pri la dua Kongreso de Esperanto » 75
(nur kelkaj ekzempleroj estas vendeblaj)

Raporto pri la tria Kongreso de Esperanto » 75

Raporto pri la kvara Kongreso de Esperanto » 75

Raporto pri la kvina Kongreso de Esperanto » 75

Raporto pri la sesa Kongreso de Esperanto » 75

Raporto pri la sepa Kongreso de Esperanto » 75

Raporto pri la oka Kongreso de Esperanto 1 »

Presa Esperantista Societo
33, rue Lacépède, Paris.

Juna Esperantisto

Monata Gazeto Beletristika
por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-Lernantoj

Jara abono: **2 fr. 50 (1 Sm).**

Specimena numero por unu respondkuponon.

Lingvo Internacia kaj Juna Esperantisto kune
jara abono **6 fr. 25 (2,50 Sm).**

Post la 1. Januaro 1913, la jarabono al «Juna Esperantisto» estos 3 Fr. (Sm. 1,200), kaj «Lingvo Internacia» kaj «Juna Esp.» kune: 7 Fr. (Sm. 2,800).

La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj gazetoj, fondita en 1895

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ
eliranta post la 15. de ĉiu monato.

Ĉefredaktoro: TH. CART

Jara abono: **5 fr. (2 Sm.)**

OPINIO DE LA GAZETARO:

THE BRITISH ESPERANTIST (*Sept. 1912*): Mi volas atentigi la multajn novajn gesamideanojn, kiuj lastatempe eniras niajn vicojn, pri tiu ĉi ĵurnalo, eldonata en Presa Esperantista Societo, Paris, 33, rue Lacépède, kun kiu, kvankam ĝi estas la plej malnova en la Esperantista mondo, ili eble ne persone konatiĝis. Ĝi havas la

respektindan aĝon de dek ok jaroj, kaj spite de tio, ĝi tute ne maljuniĝas. Ho ne! Ĝi ĉiam pliboniĝas, kaj estas nuntempe tre fortika kaj vigla. Oni rimarku, ke ĉe la homoj ne estas la kutimo aldoni la titolon «sinjoro» al tiu, kiu fariĝis eminenta; ekzemple, oni ne diras «*Sinjoro Shakespeare*», «*Sinjoro Molière*», sed uzas nur la simplan nomon. «Lingvo Internacia» do devas esti eminenta ĵurnalo, ĉar estas samideana kutimo, nomi ĝin «Lingvo». Ĉiu, kiu volas akurate informiĝi pri ĉio aktuala en la Esperantista agado, kaj volas senpartie juĝi pri la oftaj gravaj aferoj internaciaj, aŭ lingvaj, organizaj aŭ propagandaj, ne povas sin turni al pli bona informilo, ol tiu ĉi ĵurnalo. Ĝia literatura fako ĉiam liveras ion, kio riĉigas la internacian penson. En ĝi troviĝas interesaj elĉerpaĵoj el la Esperantistaj gazetoj: problema fako estrata de nia malnova samideano, Paul de Lengyel; tre spritaj «flugfolioj» de «Era», kiu ĉiam akre kritikas diversajn aferojn per tre milda maniero! Sed precipe estas ŝatataj la redakciaj ĉefartikoloj, verkitaj de P-ro Th. Cart: li ĉiam prezentas al la leganto la plej saĝan kaj klarvidan konsilon. Entute, L. I., kiu estas kvazaŭ la *Review of Reviews* de nia movado, havas tonon pure «fundamentan» kaj stilon la plej bonan; ĝi egale taŭgas por la grupo aŭ la izolita studanto. Ampleksante 40 paĝojn ĉiumonate, ĝi estas abonebla per la B. E. A. po 2 Sm. por jaro.

AMIKOJ DE *LINGVO INTERNACIA*

La titolon «Amiko de *Lingvo Internacia*» oni akiras per unufoja donaco de sumo de 40 Sm. (100 fr.) al la revuo *Lingvo Internacia*.

La «Amikoj de *Lingvo Internacia*» ricevas senpage kaj dumvive la diritan revuon.

Jam estas Amikoj:

S-roj BASTIEN, CL. BICKNELL, H. HODLER, NIÉGER, LINARÈS, ROLLET DE L'ISLE, BOBIN, WARDEN, ERA, CART, FRÉCOT, F-ino ROYER, S-roj D-ro SERVIN, LETENNEUR, GRISIER, CHAUSSEGROS, S-ino TIARD, D-ro P. CORRET, F-ino HUGUENIN, S-roj D-ro NOEL, V. POLGAR, BLANGARIN, F-ino PELLETIER, S-roj P. DE LENGYEL, D-ro DOR, J. DE LUCZENBACHER, BOLINGBROKE-MUDIE, J. M. PICARD, L. LAMANT, R. BOLLACK, EM. ROBERT, BACQUET, BASTIÉ, k. t. p.

Tiuj, kiuj donacas 200 fr., ricevas plie, laŭ samaj kondiĉoj, *Juna Esperantisto* kaj ĉiujn eldonaĵojn de la Firma *Presa Esperantista Societo*.

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ĴUS APERIS:

PLENA Klasika Libro de Esperanto

Tiu ĉi verketo, dediĉita al la gloro de l' genia aŭtoro de l' Fundamento okaze de l' dudek-kvinjara jubileo de Esperanto, enhavas la dek ses oficialajn regulojn de l' gramatiko kaj ĉiujn radikojn ĉu de l' *Fundamento* (Antaŭparolo, Ekzercaro, Universala Vortaro), ĉu de l' *Oficiala Aldono*, kun franca, angla kaj germana tradukoj.

Plej konscience ellaborita de S-roj Th. Cart kaj Em. Robert, kaj kun granda zorgo presita de S-ro V. Polgar, ĝi estas vera **juvelo**, kiun ĉiu Fundamentisto, t. e. ĉiu Esperantisto volos posedi.

Pli ol iam, en la nuna periodo, necese estas, ke ni pruvu nian amon al la lingvo, kiun donis al ni D-ro Zamenhof, severe respektante ĝin, t. e. skribante ĉiuj kiel eble plej **klasike**. Grandan helpon por tio alportos la ĵus eldonita libreto.

Formato 9 × 6 × 0,5 cm. Paĝoj 160. Pezo 30 gram.

Prezo: Kun eleganta fleksebla tolbindaĵo: Fr. **1** (Sm. 0,400);
La sama en firma kartona ingo: Fr. **1,25** (Sm. 0,500).

Tiu ĉi verketo estas vendata sen ingo, **nur** kiam oni ĝin aĉetas **en nia magazeno**, aŭ aĉetas almenaŭ **dek** ekzemplerojn.

| | | |
|-----------------|--------------------------|-------|
| 10 ekzempleroj | sen ingo, aŭfrankite Fr. | 9.50 |
| | kun ingo, » » | 11.50 |
| 25 ekzempleroj | sen ingo, » » | 22.50 |
| | kun ingo, » » | 27.50 |
| 50 ekzempleroj | sen ingo, » » | 43.— |
| | kun ingo, » » | 51.50 |
| 100 ekzempleroj | sen ingo, » » | 84.— |
| | kun ingo, » » | 100.— |

Piednotoj

[1] Nia raportanto vere iom trograndigas. Ĝis nun nur la unuan etaĝon ni konstruis, sed se niaj amikoj varbos al ni multegajn abonantojn, ni penos konstrui la ceterajn antaŭ la Pariza Kongreso en 1914. (*N. d. l. R.*)

[2] Ne ligitaj, ho ne! Ĉiujn manuskriptojn zorge tralegas la Redakcio kaj klasigas. (*N. d. l. R.*)

[3] *Sino* = brusto.

[4] En kuirejo oni ofte pretigas bonegajn saŭcojn por envolvi la dubajn manĝaĵojn.

[5] Ankaŭ ĝi povas fari gravan servon publikigante la nomojn kaj kongresajn adresojn de la kongresanoj alvenintaj dum la tago. En Krakova Kongreso oni publikigis neniun liston de kongresanoj, kaj tio estis grava manko kaj ĝeno, pri kiu plendis multaj kongresanoj.

[6] Efektive, por la Inaŭguracia kunsido la salono estis superplenega kaj estis kongresanoj eĉ en la vestiblo. Ĉu tio okazis, tial ke la salono estis tro malgranda, aŭ tial ke la ĉeestantaro estis tro granda? Mi lasas la solvon de ĉi tiu enigmo al S-ro P. de Lengyel.

[7] Jen difinita teksto:

1) *ke la demando pri ĝenerala organizaĵo estu prokrastita;*

2) *ke koncerne la demandon pri unuiĝo de naciaj societoj, la kongreso opinias, ke tiu dependas de la societoj mem, kaj sekve decidas ne diskuti ĝin, sed nur rekomendas, ke la diritaj societoj studu la oficialajn raportojn kaj faru ĉion eblan por interkonsiliĝi kaj tiel pli bone antaŭenpuŝi nian propagandon tra la tuta mondo.*

[8] Kredeble li nenion oferos, ĉar li mortis en la jaro 1849. (*N. d. l. R.*)

[9] Ne estas granda merito, ĉar la raportinto estas, laŭ sia diro, naŭdekkvinjara. (*N. d. l. R.*)

[10] T. e. la Sankta Virgulino.

[11] La forgesitaj kostumoj estas entenataj en k. t. p.

[12] Oni legis en unua numero de *Kongresa Bulteno*:

«Oni sciigas nin el Messina, ke vulkano Stromboli estas tre aktiva. El kratero eliĝas densa fumo kaj grandaj masoj da lafo. Oni aŭdas subteran bruegon.»

[13] Kredeble li konfuzis *Esperanto* kaj *Esperantismo*.

[14]Ni ne presigos la dekpaĝan muzikan recenzon de nia surda recenzisto, recenzon tute senvaloran. Abonantoj, kiuj tamen interesiĝas je ĉi-tiu fantaziaĵo, ĝin trovos en la paperkorbo de la ĉefredaktoro de L. I., 33, strato Lacépède, Parizo. (*N. d. l. R.*)

Noto de transskribanto:

Mi samigis literumado de kelkaj nomoj, kiuj malsimilis en la originalo. Mi registris kelkajn aliajn ŝanĝetojn kontraŭ la originalo per html-aj komentoj. Mi movis ĉiujn la reklamojn al la fino, kaj ankaŭ originalajn paĝkomencojn mi simile registris.

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK RAPORTO PRI LA OKA KONGRESO DE
ESPERANTISTOJ (KRAKOVO 1912) ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE